

# THORA GOLDSCHMIDT:


*FREMDLINGVA INSTRUADO HELPE DE BILDOJ*



## ESPERANTO PER INSTRUAJ BILDOJ



*FERDINAND HIRT & SOHN IN LEIPZIG*



229443

*Lingva instruado [laŭ Thora Goldschmidt] sur la fundamento de bildotabuloj*

# THORA GOLDSCHMIDT

## Bildotabuloj por la instruado de ESPERANTO

36 bildoj kun klariganta teksto, ekzercoj, ekzemploj kaj gravaj  
aldonoj (fundamenta gramatiko kaj ekzercaro de D<sup>ro</sup> Zamen-  
hof, monsystemaj tabeloj kaj esperantaj dokumentoj)

prilaboritaj de

**PROF. D<sup>RO</sup> JOH. DIETTERLE**

direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig

3a, korektita eldono



**FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG**  
**ESPERANTO-FAKO**

1923


Ĉinaj rajtoj rezervitaj.

Copyright 1919, 1921 by Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig



480801

H. 172/2000



*L. L. Zamenhof*

nask. la 15an de decembro 1859, mort. la 14an de aprilo 1917.

### LA AŬTORO DE LA INTERNACIA MONDHELPLINGVO ESPERANTO.

Esperanto estas kreita de la kuracisto D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof, por ke la homoj de la diversaj nacioj povu interŝanĝi siajn pensojn sen ia malfacilaĵo. Esperanto volas nur ebligi, ke en la tuta mondo ĉiu povas esprimi tion, kion li pensas, per lingvo facile ellernebla de ĉiuj anoj de la diversaj popoloj en malmultaj semajnoj. Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole praktikan solvon de lingvo internacia; ĉar, facile por homoj bone edukitaj, Esperanto estas preskaŭ sen peno ankaŭ komprenata de la personoj nemulte instruitaj. Mil faktoj atestas la meriton multspecan de la mondhelpingvo.

## ANTAŬPAROLO.

---

La rapida sukceso de la diversaj eldonoj de miaj „bildotabuloj“ pravas sufiĉe la avantaĝojn de mia metodo. Per la helpo de bildoj ĝi volas servi la okulojn al la pensado tiamaniere, ke oni lernu la novan lingvon nur per tiu ĉi lingvo mem, ne uzante la gepatran lingvon. Ke mi estas prava, aplikante mian metodon, oni povas konstati el la cirkonstanco, ke la plej eminentaj lingvistoj kaj pedagogoj, volintaj plibonigi la fremdlingvan instruadon, elektis la saman vojon.

Post mallonga instruado de la ĉefaj reguloj de la internacia helplingvo Esperanto oni certe sukcesos tre baldaŭ uzante mian libron. Ĝi servos kaj al ili, kiuj deziras, sen helpo de instruisto, daŭrigi sian studadon, kaj al ili, kiuj volas kompletigi tion, kion ili lernis dum antaŭa instruado.

La uzado de miaj bildotabuloj, ĉiam kreskinta dum la lastaj jaroj, decidigis min, pli grandigi ĉi tiun eldonon per vico da novaj bildoj, por fari la libron kiel eble plej kompleta. Krom tio, por formi la instruadon vere fruktodona, mi skribos kelke da vortoj pri la uzado de mia libro.

---

## UZADO DE LA LIBRO.

La libro volas liveri la materialon por la Esperanta konversacio inter la instruisto kaj la lernanto, aŭ inter du aŭ tri lernantoj. Mi ne intencas, ke oni uzu la tekston de ĉiu bildo laŭvorte. Ĝi nur volas esti la fundamento por la kompreno kaj alproprigo de la bildoj kaj de tiaj lingvaj signifoj, kiajn kaŭzas la bildo senpere aŭ pere, kaj ĝi volas helpi la memoron de la lernantoj. Oni demandu kaj respondu nepre nur parolante Esperanton! Ĉiam — aŭ demandante aŭ priparolante la taskon aŭ farante skribajn ekzercojn — oni interrilatigu la pritraktatan temon kun propraj cirkonstancoj kaj observoj.

La plimulto de la bildoj estas akompanata per kiel eble plej granda nombro da vortoj, por ke la libro servu ankaŭ kiel ilustrita vortaro. Sed certe ne estas necese lerni parkere ĉiujn vortojn; aŭ, se oni volas lerni ĉiujn, oni ne lernu ilin sen interna interrilatigo kaj ankaŭ ne sen kritiko; ĉiu Esperantisto havas ja la rajton anstataŭigi la proponitajn vortojn per pli bonaj, se li konas tiajn!

La vortoj ankaŭ nepre ne estu legataj seninterilate. La instruisto klarigu la signifon Esperante per kompletaj frazoj, kaj dum sia parolado li uzu ekzemplojn tiel klarajn, ke la lernanto sciu perfekte la sencon de ĉiuj vortoj.

La lernanto ne ripetu la lernitajn vortojn kvazaŭ maŝine; antaŭ ĉio estas necese, ke li apliku la vortojn ĉiam en kompleta frazo, kiun li mem elpensis kaj formis.

Kopenhagen.

Thora Goldschmidt.

Estas treege dezirinde, ke la lernanto, leginte la ciferojn en la teksto, serĉu ilin unue nur sur la bildo kaj pripensu pri la ĝusta vorto, kaj ne serĉu tuj en la substaranta tabelo.

Al tiuj, kiuj volas uzi la libron por infanoj kaj junuloj, mi konsilas, ke ili ne priparolu la bildojn laŭ la ordo de tiu ĉi libro, sed komencu per la plej facilaj, ekz. la lerneĵambro ktp.

Komisiite prizorgi la Esperanto-eldonon de la bildotabuloj mi faris aldonon al ili, kiu espereble kontentigos la anojn de nia internacia helpplingvo, ĉar en tiu ĉi aldono ili trovos la fundamentan gramatikon (esperantigitan) kaj la ekzercaron de Zamenhof, kelkajn gramatikajn helpilojn, la Bulonjan deklaron, monvalorajn tabelojn, tri poemojn de la majstro, t. e. Esperantaĵojn, kiuj bonege helpos la instruadon.


Leipzig. Marto 1921.

Prof. D<sup>ro</sup> Dietterle.

## ENHAVO.

	paĝo		paĝo
1. Stacidomo . . . . .	6—7	25. Metiistoj kaj profesiistoj. III. . . . .	56—57
2. Urbo . . . . .	8—9	(Tanisto. — Ŝuistlaborejo. — Peltisto. —	
3. Hotelo . . . . .	10—11	Presejo. — Librobindejo. — Librovendejo.	
4. Poŝtejo. — Telegrafejo. — Paketoficejo	12—13	— Frizejo. — Apoteko. — Florvendejo.)	
5. Preĝejo . . . . .	14—15	26. Metiistoj. — Komercistoj. — Negoc-	
6. Teatro. — Muzeo . . . . .	16—17	istoj . . . . .	58—59
7. Foirejo . . . . .	18—19	(Venta muelilo. — Bakejo. — Kukovend-	
8. Fajrobrigado. — Stratpurigado . . . . .	20—21	ejo. — Buĉistejo. — Vendejo de bon-	
9. Aŭtomobiloj. — Aerveturiloj . . . . .	22—23	gustaĵoj. — Magazeno. — Bierveturilo. —	
10. Ŝipoj kaj haveno. — Kompaso . . . . .	24—27	Vendejo de feraj komercaĵoj. — Juvel-	
11. Armeo. — Soldatoj . . . . .	28—30	vendejo.)	
12. Ŝiparo. — Maristaro . . . . .	31	27. Kontoro . . . . .	60—61
13. Horloĝo. — Artistlaborejo . . . . .	32—33	28. Vintro. — Malsanulejo. — Tombejo . . . . .	62—63
14. Lerneĵambro . . . . .	34—35	29. Farmobieno . . . . .	64—65
15. Domo . . . . .	36—37	30. Ĝardeno . . . . .	66—67
16. Familia ĉambro . . . . .	38—39	31. Ludiloj. — Ludoj. — Muziko . . . . .	68—69
17. Manĝoĉambro . . . . .	40—41	32. Birdoj . . . . .	70—71
18. Dormĉambro . . . . .	42—43	33. Mambestoj . . . . .	72—73
19. Kuirejo . . . . .	44—45	34. Fiŝoj. — Reptilioj. — Krustacoj . . . . .	74—75
20. Homa korpo . . . . .	46—47	35. Arbaro . . . . .	76—77
21. Virina vestaro . . . . .	48—49	36. Naturo . . . . .	78—79
22. Vira vestaro . . . . .	50—51	Fundamenta Gramatiko . . . . .	80—83
23. Metiistoj kaj profesiistoj. I. . . . .	52—53	Helpiloj por la gramatika instruado . . . . .	83—85
(Ĉarpentisto. — Masonisto. — Murpentristo.		Ekzercaro . . . . .	86—97
— Lignaĵisto. — Vitristo. — Ladisto. —		Tri poemoj de L. Zamenhof. (1. La espero.	
Pavimisto. — Forĝisto. — Kaldronisto.)		— 2. La vojo. — 3. Preĝo.) . . . . .	98—99
24. Metiistoj kaj profesiistoj. II. . . . .	54—55	Pri la genezo de nia lingvo. (Eltiro el	
(Barelisto. — Tornisto. — Horloĝisto. —		letero de L. Zamenhof.) . . . . .	100—102
Tinkturisto. — Teksisto. — Tajloro. —		La internacia sistemo por monaj valoroj.	
Tajlorino. — Ĉapelisto. — Selisto.)		(Kun 2 tabeloj.) . . . . .	103—104

# LA STACIDOMO.



- |                               |                              |                              |                                     |
|-------------------------------|------------------------------|------------------------------|-------------------------------------|
| 1. vagonaro, trajno           | 19. biletdonejo, biletejo    | 37. vojaĝkorbo               | 55. omnibuso                        |
| 2. lokomotivo (maŝino)        | 20. pakajoficejo             | 38. fiakro                   | 56. antaŭa perono (estrado)         |
| 3. vagono                     | 21. portisto                 | 39. fiakra ferdeko (kovrilo) | 57. tegmenta seĝo                   |
| 4. kupeo                      | 22. pakajbileto              | 40. lanterno                 | 58. interno                         |
| 5. vagona pordo               | 23. kofro, valizo            | 41. veturigista seĝo         | 59. malantaŭa perono (es-<br>trado) |
| 6. fenestro                   | 24. vojaĝkovrilo             | 42. veturigisto (fiakristo)  | 60. tramo, tramvojo (trado)         |
| 7. seĝo, benko                | 25. ĉapelujo                 | 43. vipo                     | 61. konduktoro                      |
| 8. bufro                      | 26. vojaĝsako, valizo        | 44. kondukilo                | 62. tintilo                         |
| 9. konduktoro                 | 27. stacidoma horloĝo        | 45. jungilaro                | 63. relo                            |
| 10. perono                    | 28. elektra lampo            | 46. enbuŝaĵo                 | 64. trotuaro                        |
| 11. stacidomestro             | 29. vitra tegmento           | 47. timono                   | 65. rifuĝa placo                    |
| 12. vojaĝanto                 | 30. fumo                     | 48. ĉevalo                   | 66. policisto                       |
| 13. biciklisto                | 31. vaporo                   | 49. hufo                     | 67. hotelservisto                   |
| 14. biciklo                   | 32. telegrafaj fadenoj       | 50. risorto                  | 68. lanternfosto                    |
| 15. bileto                    | 33. veturtabelo, trajntabelo | 51. piedbreto                | 69. aŭtomobilo                      |
| 16. fervoja oficisto          | 34. vestiblo                 | 52. rado                     | 70. ŝoforo                          |
| 17. gazetportisto [legaĵoj]   | 35. leterkesto, poŝta kesto  | 53. radradio                 | 71. motoro                          |
| 18. gazetoj, ĵurnaloj, vojaĝ- | 36. ŝtuparo                  | 54. akso                     | 72. pneŭmatiko                      |



# LA STACIDOMO.

## DIALOGO.

- Sinjoro:** Kiam vi veturos, sinjorino S.?  
**Sinjorino:** Kvardek minutojn post la sesa. —  
Ĉu vi venigis <sup>21\*</sup>?)  
**S<sup>o</sup>:** Mi preferis lui <sup>38</sup>, por ke via <sup>37</sup> estu transportata samtempe.  
**Sino:** Mi tuj estos preta; kie estas mia <sup>26</sup>, en kiu mi havas mian monujon?  
**S<sup>o</sup>:** Tie ĉi ĝi estas, sinjorino! Mi tuj vokos la <sup>42</sup>, kiu devas helpi por malsupren porti la pakaĵon.  
**Sino:** Veturigisto, veturu al la stacidomo!  
**S<sup>o</sup>:** Ĉu vi volas, ke mi aĉetu <sup>15</sup>?
- Sino:** Mi petas. Tie estas la <sup>19</sup>.  
**S<sup>o</sup>:** <sup>15</sup> por la unua (dua, tria) klaso al Lyon!  
— Tie ĉi estas via <sup>22</sup>; mi ankaŭ ekspedigis vian <sup>25</sup> en la <sup>20</sup>. — Nun vi devas pagi al la <sup>21</sup>; li portos la <sup>26</sup> kaj la <sup>24</sup> en vian <sup>4</sup>.  
**Sino:** Mi dankas! (Al la konduktoro:) Ĉu la vagonaro veturas rekte al L.?  
**Konduktoro:** Ne, sinjorino, estas necese ŝanĝi la vagonon en G.!  
**Sino:** Nun la vagonaro tuj toriros. Estas jam tridek ses minutoj post la sesa. Bonvolu malfermi la <sup>5</sup>, mi petas.

\*) Atentu ĉiam la akuzativon! Mi pripense ne atentigas pri ĝi, por ke la lernantoj mem estu atentaj!

## KION ONI DEVAS FARI KAJ DIRI.

### *Antaŭ la forveturo.*

- Veturigisto, rapidu al la stacidomo!  
Portisto, ekspedigu mian pakaĵon al L.; tie ĉi estas mia bileto por la dua klaso. Ĉu oni postulos superpezan transportpagon? En kiu perono la rapidvagonaro staras?  
Konduktoro, kie la vagono al L. haltas? Tie ĉi mia seĝkartoj!  
Portisto, metu mian manpakaĵon en la reton!

### *Dum la veturado.*

- Konduktoro, ĉu manĝovagono estas en la vagonaro? Kie ĝi estas? Ĉu la vagonaro enhavas dormovagonon? Ĉu seĝo estas vaka? Kiam ni alvenos en L.? Ĉu estas permesate fumi en la manĝovagono?

### *Dum la alveno.*

- Portisto, rapidu! Tie ĉi estas la pakaĵbileto. Mi luos aŭtomobilon. Kie la fiakra haltejo estas? (Apud la stacidoma poŝtejo.)  
Kie mi povas forsendi fervojtelegramon? (Fervoja poŝtejo.)  
Mi volas veturi en la urbon je malalta prezo, ĉu mi povas uzi omnibuson aŭ tramon?  
Kiom da aldonpago estas necesa por mia pakaĵo en taksometro aŭ aŭtomobilo? (Laŭ la zonoj.)  
Kie la mono estas ŝanĝata? (Monsanĝejo.)

- Kie mi povas aĉeti vojaĝkusenon? (Ĉe la komercisto sur la perono.)  
En kiu stacio estas limdepago? Ĉu dum ĝi oni povas resti en la vagonaro, aŭ ĉu estas necese eliri?  
Kion mi devas fari, por uzi la rapidvagonaron? Mi nur havas biletan por ordinara vagonaro. (Oni aĉetas aldonan biletan.)  
Kie mi ricevos peronbiletan, por konduki iun al la vagonaro? (Ĉe la aŭtomato por 10 centimoj)  
Kien mi devas min turni, perdinte mian monujon aŭ forgesinte miajn pakaĵojn? (Al la oficejo por trovitaĵoj.)  
Kien, semi volas plendi pri io? (Al la plendoficejo.)  
Kien, se mi volas havi akuratajn informojn kaj rondvojaĝbiletojn aŭ kombineblajn biletojn? (Al la informoficejo.)  
Kiaj funkcias en la stacidomo kaj en la haltejoj? (La stacidomestro, la relŝanĝilisto, la maŝinisto, la hejtigisto, la vagonarestro, la konduktoro.)  
Kiaj vagonaroj ekzistas? (Interkunigitaj vagonaroj, rapideg-, rapidvagonaroj, luksovagonaroj, ordinara vagonaroj, komercaj vagonaroj, transportvagonaroj ktp.)  
Kiaj fervojoj ekzistas? (Simplaj fervojoj, elektraj fervojoj, dentradaj fervojoj, pendaj fervojoj, vaportramvojoj.)

# LA URBO.



- |                        |                             |                                       |                              |
|------------------------|-----------------------------|---------------------------------------|------------------------------|
| 1. strato              | 21. gastoj                  | 40. sinjorino                         | 59. magazeno                 |
| 2. asfalto, pavimo     | 22. markezo                 | 41. knabineto                         | 60. teatro                   |
| 3. trotuaro            | 23. hotelo                  | 42. policisto                         | 61. borso                    |
| 4. ŝirmŝtono, puŝŝtono | 24. balkono                 | 43. leterkesto, poŝtkesto             | 62. magistrata domo          |
| 5. defluilo, defluejo  | 25. firmŝildo, elpendaĵo    | 44. studento                          | 63. poŝt(oficejo)            |
| 6. angulo              | 26. blazono                 | 45. ekleziulo, pastro                 | 64. kastelo                  |
| 7. lanternfosto        | 27. enirejo                 | 46. triciklo                          | 65. foirejo                  |
| 8. arklampo            | 28. pordisto                | 47. ciklisto                          | 66. kajo                     |
| 9. benko               | 29. hotelservisto           | 48. biciklo                           | 67. ponto                    |
| 10. viadukto           | 30. gasto                   | 49. direktilo                         | 68. balustrado               |
| 11. fervoja vagonaro   | 31. pakaĵo                  | 50. rado                              | 69. kanalo                   |
| 12. ŝtupoj             | 32. veturilo, fiakro        | 51. knabeto                           | 70. monumento                |
| 13. arbo               | 33. infanistino, nutristino | 52. fruktovendejo                     | 71. kupolo (de l' katedralo) |
| 14. viro               | 34. infanveturilo           | 53. kabrioletto                       | 72. muzeo                    |
| 15. virino             |                             | 35. kiosko                            | 54. veturigisto              |
| 16. aŭtobuso           | 36. gazeto                  | 55. ĉevalo                            | 73. universitato             |
| 17. ŝoforo, kondukanto | 37. afiŝkolono              | 56. ombro                             | 74. fontano                  |
| 18. hundo              | 38. afiŝo                   | 57. purigisto de l' stratoj, balaisto | 75. preĝejo                  |
| 19. restoracio         | 39. sinjoro                 | 58. vojiranto, pasanto                | 76. turo                     |
| 20. kelnero            |                             |                                       | 77. turpinto                 |

# LA URBO.

Nia bildo montras al ni la centran parton de granda urbo. Estas somertago; oni mal-suprenigis la <sup>22</sup>, la homoj antaŭ la <sup>23</sup> estas vestitaj somere. Antaŭ domo sub <sup>22</sup> fruktovendistino vendas fruktojn en la <sup>52</sup>. Diversaj veturiloj estas sur la strato. Dekstre <sup>53</sup> veturas; ĝi estas en danĝero, karamboli kun la <sup>16</sup>, <sup>42</sup> levas la manon, <sup>30</sup> ĵus alvenis. En la antaŭaĵo oni vidas du <sup>47</sup>, la unu sur <sup>48</sup>, la alia sur <sup>46</sup>. Maldekstre <sup>33</sup> sidas sur la <sup>9</sup> kaj puŝas la <sup>34</sup> tien kaj reen. Ŝi rigardas la <sup>39</sup>, kiu enmetas leteron en la <sup>43</sup>. Ties malgranda <sup>18</sup> staras apude kaj atendas. Alia sinjoro legas antaŭ la <sup>35</sup> la <sup>36</sup>; ĝi ŝajnas enhavi gravajn anoncojn. Apud la <sup>37</sup>, <sup>40</sup> kaj malgranda <sup>41</sup> renkontas <sup>39</sup>; <sup>44</sup> kaj <sup>45</sup> preteriras ilin. En la fundo de l' bildo la <sup>11</sup> iras trans la <sup>10</sup>, kiu estas konstruita pro la granda komunikigo.

## DIALOGO.

**Sro** : Bonan tagon, sinjorino, kiel vi fartas?

**Sino** : Mi dankas, tre bone. Hieraŭ mi venis kun mia filineto el B., por viziti mian patron. Li transloĝiĝis tien ĉi nur antaŭ nelonge.

**Sro** : Kiel plaĉas al sinjoro via patro en B.?

**Sino** : Mi tre dankas, li baldaŭ al kutimiĝos. Hodiaŭ vespere ni volas viziti la <sup>60</sup>. La reĝan <sup>64</sup>, la <sup>71</sup>, la <sup>72</sup>, kaj la <sup>62</sup>

ni vizitis hodiaŭ matene. Precipe la <sup>62</sup> plaĉas al mi. Pardonu, ni devas foriri, ni estas sur la vojo al la al-borda ponto, por fari kun mia patro boatveturadon.

**Sro** : Adiaŭ sinjorino; se vi havos la tempon, viziti nin, ni tre ĝojos pri via vizito.

**Sino** : Tre volonte, sinjoro, salutu, mi petas, sinjorinon vian edzinon.

En la urbego ni vidas ankaŭ <sup>60</sup>, ĉiuvespere tre vizitatan, la <sup>61</sup> kaj la <sup>62</sup>; la nova <sup>63</sup> estas tre impona konstruaĵo; ĉar la malnova ne korespondis al la bezonoj de la publika interkomunikigo, oni antaŭ nelonge konstruis tiun novan. La <sup>73</sup> estas treege vizitata. Antaŭ ĝi vi vidas grandan <sup>74</sup>. Unu el la <sup>75</sup> estas konstruita laŭ gota stilo; ĝia <sup>76</sup> estas unu el la plej altaj de la tuta ĉirkaŭaĵo. En la urbo estas krom tio kelkaj burĝ- kaj popollernejoj, gimnazio, liceo por knabinoj. La monumentoj estas belegaj, ili montras princojn kaj famajn politikistojn, scienculojn kaj esploristojn.

## KION ONI DEVAS FARI KAJ DIRI.

*Se vi volas farsendi leteron aŭ poŝtkarton:* Vi metu ilin en bluan <sup>43</sup>, kiun vi preteriras.

*Ekzemple vi demandas en iu pli granda urbo la konduktoron de l' tramo:* Kiu tramo veturas de tie ĉi al tiu aŭ alia strato, tiu aŭ alia placo? Kiom ofte venas vagono? Al kiom da personoj estas permesate stari sur la antaŭa perono, al kiom sur la malantaŭa? Kiom kostas la veturo? Ĉu estas necese, ŝanĝi la vagonon?

*Se vi volas veturi per la aŭtobuso:* Vi iru al la haltejo, kiun vi ekkonas facile, ĉar ĝi estas markita per ŝildo; tie vi atendu ĝis la alveno de la vagono montranta per ŝildo la veturdirekton. Vi eniru; la konduktoro krias: neniŭ spaco! eliru, mi petas.

**Pasaĝero** : Kiam alvenos la sekvonta vagono?

**Konduktoro** : Post dek minutoj! (Vi atendas la sekvontan vagonon kaj eniras.)

**Pasaĝero** : Ĉu ankoraŭ spaco estas en la vagono aŭ sur la perono?

**Konduktoro** : Nur du seĝoj sur la ferdeko. Bonvolu supreniri!

**Pasaĝero** : Mi dankas. Diru, mi petas, al mi, kiam mi devas eliri; mi volas iri al la . . . . strato.

*Kion vi faros, volante uzi fiakron, taksameton aŭ aŭtomobilon?* Vi iros al la <sup>42</sup>, demandos pri la haltejo, eniros kaj pagos je la fino de la veturado.

*Kion vi faros perdinte vian monujon, multekostan ornameton aŭ vian peltkolomon?* Vi parolos kun la <sup>42</sup>, kiu montros al vi la plej proksiman policejon; tie la <sup>42</sup> donos al vi informojn.

*Kion vi faras lacigita per la rondiro tra la stratoj?* Vi sidiĝas sur <sup>9</sup> sub <sup>13</sup>.

*Kion vi demandas, volante aĉeti fruktojn ĉe la fruktovendisto?*

**Aĉetanto** : Kiom kostas la vinberoj, pomoj, piroj, persikoj, bananoj ktp.?

**Vendisto** : La funto kostas 35 centimojn.

**Aĉetanto** : Bonvolu doni al mi funton de tiuj ĉi fruktoj; duonan funton de tiuj.

*Kion vi diros volante aĉeti gazeton?*

**Aĉetanto** : Donu, mi petas, la „Esperon“, la „Germanan Esperantiston“ la „Revuon“ ktp., ankaŭ unu el la ĉi

**Vendisto** : Ĉu la matenan aŭ la vesperan eldonon?

[tieaj ĵurnaloj]

**Aĉetanto** : La vesperan eldonon.

*Kiamaniere oni heligas la urbon?* Per elektraj arklampoj, en pli malgranda urbo per gaso.

# LA HOTELO.



- |                                    |                                   |                           |                             |
|------------------------------------|-----------------------------------|---------------------------|-----------------------------|
| 1. vestiblo                        | 18. turistbastono                 | 34. kufeto                | 52. ŝtuparstango            |
| 2. koridoro                        | 19. turistŝuoj, botoj             | 35. polvotuko             | 53. telefonujo, telefonĉelo |
| 3. ŝtonplataro                     | 20. gamaŝoj                       | 36. polvoviŝilo           | 54. telefono                |
| 4. planko                          | 21. lornopoŝo, lornujo            | 37. banĉambro             | 55. aŭdilo                  |
| 5. irtapiŝo                        | 22. rimeno                        | 38. banujo, bankuvo       | 56. hoko                    |
| 6. tapiŝtenilo                     | 23. monujo                        | 39. sapujo                | 57. ŝnuro                   |
| 7. lifto                           | 24. monbileto, papera<br>mono     | 40. akvokrano             | 58. lampo                   |
| 8. tintilo                         | 25. kalkulo                       | 41. duŝo                  | 59. eklumigilo              |
| 9. liftkondukanto                  | 26. fotografaparato               | 42. tubo                  | 60. muro                    |
| 10. pordisto                       | 27. gastotabelo, gastro-<br>listo | 43. hejtil(ar)o           | 61. kraĉujo                 |
| 11. ĉefkelnero, kelnero            | 28. avertilo, signalilo           | 44. tualettuko            | 62. notlibreto              |
| 12. mastro, hotelisto              | 29. fera krado                    | 45. bantuko               | 63. ŝtuparo                 |
| 13. direktoro de l' hotelo         | 30. ŝovebla pordo                 | 46. spegulo               | 64. ŝtupo                   |
| 14. servisto                       | 31. arklampo                      | 47. tableto               | 65. valizo, vojaĝsako       |
| 15. servistino, ĉambristino        | 32. pentraĵo                      | 48. tapiŝo, mato          | 66. prenilo, tenilo, anso   |
| 16. sinjorino                      | 33. ŝlosilaro                     | 49. korbseĝo              | 67. kofro                   |
| 17. sinjoro. vojaĝanto,<br>turisto |                                   | 50. forno de l' banĉambro | 68. vojaĝkorbo              |
|                                    |                                   | 51. pordfermilo, anso     | 69. seruro                  |

# LA HOTELO.

Sur nia bildo ni vidas la internajon de granda, distingita hotelo kun la <sup>1</sup>, en kiu estas vigla interkomunikigo. <sup>17</sup> kaj <sup>16</sup> malsupreniras la <sup>63</sup>, dum la <sup>14</sup> portas la kofrojn kaj <sup>15</sup> postrigardas la vojaĝantojn, tenante la <sup>36</sup> kaj <sup>35</sup> en la mano. Ŝi havas sur la kapo <sup>34</sup>, kaj al ŝia zono <sup>33</sup> estas fiksita. La <sup>17</sup> volas vojaĝi al Svisujo; li havas <sup>18</sup> en la mano, la <sup>19</sup> kaj <sup>20</sup> je la piedoj. Per <sup>22</sup> li portas la <sup>21</sup>. Malfermite la <sup>23</sup> li elprenas <sup>24</sup> kaj pagas per <sup>24</sup> la <sup>25</sup>, kiun la <sup>11</sup> prezentas al li. La turistino sekvas lin, portante la <sup>26</sup>. Ĵus enirinta <sup>17</sup> volas lui ĉambron en la hotelo; li tenas per la <sup>66</sup> la <sup>65</sup> en la mano kaj montras sur la <sup>27</sup>. La <sup>13</sup> kontrolas laŭ sia <sup>62</sup>, kiuj ĉambroj estas neokupitaj. Ruĝa <sup>5</sup> kuŝas sur la <sup>64</sup> de la <sup>63</sup> kaj sur la <sup>3</sup> kaj la <sup>4</sup>. Ĝi estas fiksita per <sup>6</sup>. La <sup>63</sup> estas heligita per la <sup>31</sup>. La <sup>60</sup> estas ornamita per <sup>32</sup>. Malantaŭ la <sup>9</sup> la <sup>7</sup> sin trovas, antaŭ ĝi la <sup>30</sup>. La <sup>9</sup> atendas la sonon de la <sup>8</sup>, por suprenigi la <sup>17</sup> kun liaj <sup>67</sup> kaj <sup>68</sup>. Sur la <sup>2</sup> la <sup>10</sup> staras ĉe la <sup>60</sup>. Lia mastro, la <sup>12</sup>, staras en la <sup>53</sup>. Li tenas la <sup>55</sup>, ligitan al <sup>57</sup>, al sia orelo, kaj li telefonas kun sia liveranto. Li estas lumiginta la malgrandan elektran lampon, uzinte <sup>59</sup>. La <sup>37</sup> kun la <sup>38</sup> kaj kun la <sup>39</sup> estas al la dispono de la vojaĝantoj, kiuj estas malpurigitaj kaj lacigitaj per la fervoja veturado. En la <sup>50</sup> la akvo estas varmigata per la <sup>43</sup> kaj fluas unue tra la <sup>42</sup> kaj poste per la <sup>40</sup> el la <sup>41</sup>. La <sup>48</sup> kovras la malvarman <sup>3</sup>; apud la <sup>47</sup> staras la <sup>49</sup> kun la <sup>45</sup>. Post la bano oni bezonas <sup>44</sup> kaj <sup>46</sup>.

## KION ONI DEVAS FARI AŬ DIRI.

a) *Post la alveno*: Pordisto, ĉu alvenis mia telegramo, per kiu mi mendis ĉambron por la hodiaŭa nokto? En kiu etaĝo ĝi estas? Ĉu ĝiaj fenestroj estas je la flanko de la strato aŭ de la korto? Ĉu vi havas lifton? Kiom kostas la ĉambro? Bonvolu zorgi pri mia pakajo!

b) *En la manĝoĉambro aŭ en la refreŝigejo dum la matenmanĝo*: Kelnero, alportu kiel eble plej rapide tason da buljono kun ovo, buterpanon kun rostaĵo, ŝinkon aŭ fromaĝon, glason da teo, glason da biero, tason da kafe, pasteĉon.

c) *Dum la tagmanĝo*: Kelnero, la karton, mi petas. Alportu printempan supon, unu porcion da spinaco kun ovo, poste sandron kun butero, ŝafrostajon kun verdaj fazeoloj, terpomoj kaj saŭco, stufitajn pomojn kaj rekomendu al mi botelon da ruĝa vino. — Mi volas pagi; kiom mi devas pagi? — La menuo kostas 3 frankojn, la vino 2 frankojn.

d) *Antaŭ la forvojaĝo*: Sinjoro direktoro, mi volas forvojaĝi. Mi petas, zorgu, ke miaj kofroj estu ekspedataj ĝustatempe al la stacidomo. Mi mem volas veturi per la hotelveturilo post duona horo. Donu al mi la kalkulon por la ĉambro kaj lumo; mi prenis ankaŭ du banojn. Dufoje la manĝo estis alportita en mian ĉambron

## DEMANDOJ.

Kiu purigas la hotelĉambrojn, ordigas la liton, prizorgas freŝan akvon, brosas la vestojn, alportas purajn mantukojn, servas la gastojn? Kiu purigas la ŝuojn kaj botojn? Kiu alportas la pakajojn? Kiu alportas la gazetojn en la manĝoĉambron? Kiu informas la alvenantajn kaj forirantajn gastojn? Kie mi povas korespondi? Kie mi trovas gazetojn kaj diversajn legaĵojn? Kie oni matenmanĝas? Ĉu ekzistas aparta ĉambro por sinjorinoj? Kie mi povas pagi la kalkulon? Ĉu vi havas telefonon en via domo? Kie ĝi estas?

## TELEFONA INTERPAROLADO.

Tie ĉi M. . . . Ĉu mi povas havi ĉambron en via hotelo?

Jes; en la 1a, 2a kaj 3a etaĝo kelkaj ĉambroj estas neokupitaj.

Rezervu, mi petas, ĉambron kun du litoj en la 2a etaĝo; ĉu oni povas esti tie sen bruoj, ĉu oni povas veni tien rapide?

Mi rekomendas al vi senbruan ĉambron, kie vi ne aŭdos la bruon de la tramo.

Kiam vi fermos vian hotelon nokte? Ĉu la manĝaĵoj estas bonaj?

Nia domo estas malfermita ĝis noktmezo; ni havas ankaŭ dumnoktan pordiston, kaj vi estos kontenta rilate la manĝaĵojn.

Ĉu la litoj estas bonaj? Bedaŭrinde la litoj en la hoteloj tre ofte estas malbonaj!

La litoj estas bonegaj; banĉambro estas apud via ĉambro.

Bone, sendu al mi la portiston por la vespera vagonaro 20 minutojn antaŭ la 8a.

# POŝTEJO. – TELEGRAFEJO. – PAKETOFICEJO.



- |   |                                 |                                     |                          |
|---|---------------------------------|-------------------------------------|--------------------------|
| 1 poŝt(office)ejo   | 5. sendat(ist)o                 | poŝtmarko de 10 centi-              | 26. levilo               |
| a) telegrafejo, leterpoŝt-<br>ejo, ĉefpoŝtejo, ĉek-<br>poŝtejo, | 6. leterportisto, poŝtisto      | moj ktp.                            | 27. paperkorbo           |
| b) paketoŝtejo  | 7. poŝtpoŝo                     | 14. a) sigelo                       | 28. klavo                |
| 2. poŝt(office)cisto  | 8. letero                       | b) sigelilo                         | 29. presrubando          |
| 3. telegraf(office)cisto  | a) enskribita, rekomen-<br>dita | 15. sigelvakso                      | 30. landkarto, geografia |
| 4. fenestreto, giceto   | b) poŝtrestanta                 | 16. dato                            | 31. stratkarto [karto]   |
| a) por poŝtmarkoj, valo-<br>raj sendaĵoj, monsen-<br>daĵoj      | c) valorajo                     | 17. subskribo                       | 32. vualo                |
| b) poŝtrestantaj leteroj,<br>presaĵoj                           | 9. letero afrankita             | 18. formularo (por telegra-<br>moj) | 33. vojaĝpoŝo            |
| c) poŝtpaketoj  | 10. adreso                      | 19. kalendaro                       | 34. ĉapo                 |
| d) telegramoj   | 11. koverto,                    | 20. skribotablo, pupitro            | 35. viziero              |
| e) informejo  | 12. poŝtkarto                   | 21. inkujo                          | 36. muro                 |
|   | a) por la eksterlando,          | 22. poŝtpaketo                      | 37. gamaŝo               |
|   | b) ilustrita karto              | 23. laĉo, ŝnureto                   | 38. arklampo             |
|   | 13. poŝtmarko de 5centimoj,     | 24. ĉapelujo                        | 39. vilaĝanino           |
|   |                                 | 25. pesilo                          | 40. kaptuko              |
|   |                                 |                                     | 41. antaŭtuko            |

# POŝTEJO. — TELEGRAFEJO. — PAKETOFICEJO.

Nia bildo montras al ni <sup>1</sup> kun ĝiaj diversaj <sup>4</sup>. Por heligi la oficejon elektra <sup>38</sup> meze pendas; sur la muroj <sup>30</sup> kaj <sup>31</sup> estas alpendigitaj. Dekstre kaj maldekstre de la <sup>4</sup> por la paketoj estas du <sup>19</sup>. En la angulo <sup>27</sup> staras. Sinjorino vojaĝe vestita staras antaŭ la <sup>20</sup> kaj skribas telegramon; ŝi donas la pretigitan <sup>18</sup> al la <sup>3</sup>, kiu estas telegrafanta. Antaŭ la paketĝiĉeto <sup>5</sup> staras kun kelkaj <sup>22</sup> kaj unu <sup>24</sup>. La <sup>2</sup> metas la <sup>22</sup> unu post la alia sur la <sup>25</sup>, kies <sup>26</sup> li malsuprenigas. Estas necese, ke la <sup>22</sup> estu bone pakitaj kaj laĉitaj per solida <sup>23</sup>. Ĉe la maldekstra <sup>4</sup> sinjoro demandas pri <sup>4b</sup>. Bele vestita <sup>39</sup> kun <sup>40</sup> kaj <sup>41</sup> aĉetas poŝtmarkojn. Apud ŝi la <sup>6</sup> prenas <sup>8</sup> el sia <sup>7</sup> kaj legas la <sup>10</sup>. La pretan <sup>8</sup> oni metas en <sup>11</sup> kaj sigelas ĝin per <sup>15</sup> kaj <sup>14</sup>. Poste oni afrankas ĝin per diversvaloraj <sup>13</sup>.

## DIALOGO.

Fraŭlino: Kion vi alportas hodiaŭ al mi?

Postisto: Mi alportas poŝtmandaton; bonvolu subskribi. Vi ricevos 100 frankojn.

Fino: Mi dankas.

Pŝto: Krom tio mi havas por vi leteron neafrankitan; vi devas pagi punpagon. Ĉu vi volas rifuzi la akcepton?

Fino: Ne! de kie ĝi venas? Mi vidas, ke ĝi estas sigelita.

Pŝto: El V., pro tio ĝi kostas 20 centimojn.

Fino: Bonvolu diri al mi, kiamaniere mi povas forsendi karton kiel eble plej rapide?

Pŝto: Per la pneŭmatika poŝto. Estas necese, ke vi afranku la karton per 25 centimoj. La letero kostas ĉe la pneŭmatika poŝto 35 centimojn.

Fino: Ĉu estas necese, alporti ĝin al la proksima poŝtofiĉejo?

Pŝto: Ne, ĵetu ĝin en la leterkeston; tio sufiĉas. La letero alvenos post duonhoro.

Fino: Kiel oni povas sendi sciigojn precipe rapidajn ekster la urbon?

Pŝto: Vi povas telegrafi aŭ sendi letertelegramon aŭ rapidleteron. Ĉiuj tiaj sendaĵoj estos disdonataj per ekspresaj senditoj.

## DEMANDOJ.

Kiaj poŝtaĵoj ekzistas? Kiom telegramoj ĝis dek vortoj kostas enlande? Kiom kostas paketo ĝis 5 kg. en la unua, en la dua zono? Kiom kostas letero ĝis 20 gr? Ĝis kioma horo la poŝtofiĉejo estas malfermita? Kiam en la paketpoŝtejo la servado de la oficistoj urĝas? Kiam en la leterpoŝtejo? Kia estas la koloro de la poŝtveturiloj? Kiu fondis la internacian poŝtunuigon? (Stephan.) Kion montras poŝtstampo? Kiu alportas la mensendaĵojn? Kiu la paketojn? Kiu la telegramojn kaj rapidsendaĵojn?

## KION ONI DEVAS FARI KAJ DIRI.

Mi metas la leteron en la koverton (la leterkovrilon); sur la koverton mi skribas la precizan adreson, mi afrankas la leteron per poŝtmarko kaj metas ĝin en la leter- aŭ poŝtkeston. Tiu ĉi estas malplenigata ĉiam duonhore aŭ hore. Mi metas banderolon ĉirkaŭ la presaĵon. Mi bezonas poŝtkarton por eksterlanda sendado.

Mi volas forsendi paketon; tiam mi prenas kartonon aŭ keston, mi pakas ĝin en pakpaperon aŭ paktolon, laĉas ĝin per solida laĉo, mi surskribas la adreson kaj aldonas paketadreson. Se oni volas sendi paketon trans la limon, estas necese aldoni deklaron pri la valoro kaj enhavo, skribi limdepagdeklaron kaj sigeli la ŝnuraron.

Forsendante mensendaĵon mi uzas poŝtmandatan karton aŭ pagkarton, mi pagas la monon je la poŝtĝiĉeto kaj ricevas kvitancon. Se la mensendo urĝas, mi sendas la mandaton telegrafe.

Pli longaj urĝaj sciigoj povas esti sendataj per letertelegramoj.

En ĉiu poŝtejo de la pli grandaj urboj staras aŭtomatoj por poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj, krom tio telefonaŭtomatoj.

# LA PREĜEJO.



- |  |                                     |                                     |
|--|-------------------------------------|-------------------------------------|
| 1. pastro, paroĥestro                    | 18. mozaiko                         | 31. kadro                           |
| 2. ministranto, akolito                  | 19a. ĉefa navo                      | 35. kurteno                         |
| 3. monaĥo                                | 19b. flanka navo                    | 36. kruco, krucifikso               |
| 4. mantelo, kuto, monaĥa robo            | 19c. transversa navo, transepto     | 37. altarkrado                      |
| 5. sutano                                | 20. marmortavolo                    | 38. vizitanto, fremdulo             |
| 6. surpliso                              | 21. kolono                          | 39. lornopoŝo                       |
| 7. mesvestaĵo, talaro                    | 22. kapitelo                        | 40. ofermonujo                      |
| 8. kapuĉo                                | 23. bazo, plinto                    | 41. vilaĝanino                      |
| 9. altaro                                | 24. predika seĝo, katedro           | 42. genufleksanta virino            |
| 10. skulptaĵo                            | 25. baldakeno                       | 43. pentraĵo de krucportanta kristo |
| 11. kandelo                              | 26. baptujo                         | 44. pilastro                        |
| 12. kaliko                               | 27. sanktakvujo                     |                                     |
| 13. ciborio                              | 28. tomba ŝtono                     |                                     |
| 14. fenestro                             | 29. eterna lampeto, preĝeja lucerno |                                     |
| 15. arkaĵo                               | 30. niĉo                            |                                     |
| 16. alfreskpentraĵo, fresko              | 31. konfesejo                       |                                     |
| 17. emporo, ĉirkaŭirejo, preĝeja balkono | 32. kapelo                          |                                     |
|  | 33. oleopentraĵo                    |                                     |



## LA PREĜEJO.

---

Nia bildo montras la internajon de preĝejo kun kelkaj navoj. Antaŭ la <sup>9</sup>, la <sup>1</sup> funkcias. Dum la solena agado de la meso li portas multvaloran <sup>7</sup>; flanke de li staras tri <sup>2</sup> kun brulantaj <sup>11</sup> en la manoj. Ili <sup>5</sup> estas ruĝaj, super tiuj ili portas blankajn <sup>6</sup>. La <sup>9</sup> estas riĉe ornamita per <sup>10</sup>, dekstre kaj maldekstre de ĝi ni vidas kelkajn <sup>11</sup>, kiuj dum la diservo heligas la altarspacon. Sur la <sup>9</sup> staras la <sup>12</sup> kaj la <sup>13</sup>. <sup>37</sup> baras la aliron al la <sup>9</sup>. Super la <sup>9</sup> estas tri <sup>14</sup> kun belaj pentraĵoj, kiuj montras sanktulojn aŭ scenojn el la biblio. Antaŭ la <sup>9</sup> staras la <sup>26</sup>, kie oni baptas la infanojn; dekstre de ĝi oni vidas la <sup>24</sup>, kiun la <sup>1</sup> supreniras, kiam li volas prediki; ĝi baziĝas sur <sup>44</sup> kaj havas <sup>25</sup> kiel tegmenton. Sur <sup>21</sup>, proksime de la <sup>24</sup>, pendas <sup>43</sup>; sub ĝi <sup>40</sup> estas fiksita, en kiun <sup>41</sup> metas ofermoneron. — En <sup>19c</sup> staras <sup>31</sup>; tie la pastro aŭdas la sekretan konfesion. Al <sup>44</sup> oni pendigis <sup>29</sup> kaj <sup>36</sup>. En niĉo <sup>3</sup> montras al <sup>38</sup> belan <sup>33</sup>, duonkovritan per <sup>35</sup>; versaĵne ĝi estas tre multvalora. Tiu ĉi niĉo estas fermebla per alta <sup>37</sup>. La <sup>19a, b</sup> kaj <sup>c</sup> estas plankitaj per <sup>20</sup>; en la plintaron oni metis <sup>28</sup>, kiu kovras la tombon de iu mezepoka heroo. — Supre de la <sup>21</sup>, kiuj estas ligitaj per gotikaj arkoj, oni rimarkas <sup>17</sup>, kies malantaŭaj muroj estas ornamitaj per kelkaj <sup>16</sup>. —

---

## DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ.



Kiajn preĝejojn vi konas? (Katolikajn, protestantajn, hebreajn [sinagogojn].) Kiajn stilojn oni diferencigas? (Romanan, gotikan, renesancan.) Kiam la diservo okazas? (En katolikaj preĝejoj ĉiutage de la 6a ĝis la 11a [meso], en la protestantaj dimanĉe kaj festotage antaŭkaj posttagmeze.) Kiel oni nomas la pastrojn? (Ekleziulojn, pastrojn, pastorojn, predikistojn.) Kiu helpas ilin dum la diservo? (La pedelo, kiu funkcias kiel ministranto, la preĝejservisto, kiu kolektas la ofermonerojn, la orgenisto, kiu akompanas la kantojn de la komunumo, ludante la orgenon aŭ harmoniumon.) Kie la infanoj estas baptataj? (Ĉe la <sup>26</sup>.) Kiel oni nomas la atestantojn de la baptado? (Baptogepatrojn.) Ĉu vi konas aliajn kultajn agadojn krom la diservo? (Konfirmo, edziĝa soleno, soleno por mortinto [rekviemo].) Kie oni kantas la liturgion? (Sur la ŝtupetaro de la altaro.) Kie oni predikas? (En la predikeja seĝo.) Kiom da pastroj funkcias en via preĝejo? Kiam ĝi estas konstruita? Kiuj artistoj laboris por ĝin ornami? (La lignoskulptisto starigis la <sup>9</sup>, la ŝtonisto skulptis diligente la <sup>22</sup>, la pentristo pentris la <sup>16, 33</sup> kaj <sup>43</sup>.) Kiu verkis tiun ĉi malnovan pentraĵon? Kiuj iloj estas uzataj pro la soleno de la komunio (eŭkaristio)? (Kaliko, vinkruĉo, pateno.) Ĉu ili estas pure oraj aŭ arĝentaj? (Plej multe.) Ĉu la edziĝsoleneno okazas antaŭ la ĉefaltaro? Kiu kondukas la gefianĉojn? Al kiu servas la altarbenko? Ĉu la sonoriloj estas movataj elektre? Ĉu oni povas supreniri la turon? Ĉu de tie oni havas belan vidon de la urbo? Kiom kostas la vizito al la preĝejtrezoro?

---

## SONORILAROJ.

La turoj de kelke da preĝejoj enhavas sonorilaron. Tiu ĉi estas movebla per meĥanismo kaj sonoras ĉiuhore aŭ ĉiuduonhore. Malgrandaj marteloj frapas la sonorilojn tiamaniere, ke sankta aŭ popola kanto resonas. Depost la 16a jarcento oni trovas ilin en la turoj de la preĝejoj kaj en publikaj konstruaĵoj, precipe en Holando kaj Belgujo. En Germanujo ili estas maloftaj. (Tre konata estas la sonorilaro de la garnizonpreĝejo en Potsdam.) Oni nomas ilin „Carillons“.

# LA TEATRO. - LA MUZEO.



## La teatro.

- |                              |                        |                            |
|------------------------------|------------------------|----------------------------|
| 1. rigardantejo              | 15. ĉefo de l'orkestro | 31. vestejo                |
| 2. rigardanto                | 16. taktilo            | 32. vestejservistino       |
| 3. scenejo                   | 17. muzikisto          | 33. antaŭsalono, promenejo |
| 4. kurteno                   | 18. pargeto            | 34. bufedo.                |
| 5. antaŭscenejo, lampa linio | 19. partero            |                            |
| 6. antaŭaĵo                  | 20. loĝio              |                            |
| 7. malantaŭaĵo, fundo        | 21. unua rango         |                            |
| 8. kuliso                    | 22. proscenia loĝio    |                            |
| 9. aktoro, kantisto          | 23. galerio            |                            |
| 10. aktorino, kantistino     | 24. lustrejo           |                            |
| 11. ĥoristo, statisto        | 25. vitra kloŝo        |                            |
| 12. suflorkesto              | 26. kolono             |                            |
| 13. lumigila vico            | 27. elirejo            |                            |
| 14. orkestro                 | 28. loĝistino          |                            |
|                              | 29. bileto             |                            |
|                              | 30. programo           |                            |

## La muzeo.

- |                |                                      |
|----------------|--------------------------------------|
| 1. gardisto    | 11. desegnaĵo                        |
| 2. katalogo    | 12. akvarelo                         |
| 3. vizitanto   | 13. piedestalo                       |
| 4. lorno       | 14. bronza statuo                    |
| 5. vitra kesto | 15. reliefo                          |
| 6. manuskripto | 16. statuo kun ĉevalo, rajdantstatuo |
| 7. vazo        | 17. portreta busto                   |
| 8. kaliko      | 18. tapiŝo, tapiŝa bildo             |
| 9. kadro       | 19. ŝtonĉerko, sarkofago             |
| 10. pentraĵo   | 20. marmora busto                    |
|                | 21. marmora statuo                   |
|                | 22. soklo                            |
|                | 23. niĉo                             |
|                | 24. krado                            |
|                | 25. mozaika planko                   |

# LA TEATRO. — LA MUZEO.

Hodiaŭ oni ludas novan operon. La <sup>2</sup> sidas atendantaj en la <sup>1</sup>. La <sup>4</sup> mallevigas. En la <sup>7</sup> aro da <sup>11</sup> aperas; en la <sup>6</sup>, <sup>10</sup> genuas antaŭ <sup>9</sup>. En la <sup>14</sup> la <sup>15</sup> staras sur la podio, levante la <sup>16</sup>; la muzikistoj tuj komencos. Hodiaŭ multaj seĝoj en la <sup>18</sup> kaj <sup>19</sup> estas neokupitaj; la <sup>21</sup> estas pli okupita. En unu <sup>20</sup> neniu sidas. La <sup>28</sup> donas la <sup>30</sup> al sinjorino kaj malfermas la pordon, por montri al ŝi la seĝon. Ŝia edzo ankoraŭ pagas la monon por la konservo de vestoj al la <sup>32</sup>. La <sup>2</sup> atentis la ludon kun granda intereso. La <sup>30</sup> plaĉis al ili; pro tio ili vikle aplaŭdas.

## DIALOGO.

### *Apud la teatra kasejo.*

Sinjoro : Bonvolu montri al mi la repertuaron!  
Oficisto : Jen, mi petas; morgaŭ vespere kantos la fama kantisto N.  
Sinjoro : Donu al mi du biletojn por la pargeto por tiu ĉi reprezentado.  
Oficisto : Elektu, mi petas, mem pere de la plano. Mi rekomendas tiujn. Ili estas ne malproksimaj de la <sup>3</sup>.  
Sinjoro : Mi dankas, donu al mi la biletojn.

### *En la muzeo.*

Sinjoro : Kiom kostas la eniro?  
Gardisto : Unu frankon po persono; marde kaj ĵaŭde la eniro estas senpaga.  
Sinjoro : Kie mi povas lasi mian ombrelon?  
Gardisto : Donu ĝin al mi: mi konservos ĝin.  
Sinjoro : En kiu salono mi povas vidi la buston de Beethoven? (Kie la nova pentraĵo de R. estas?  
Ĉu vi havas katalogon?)

## DEMANDOJ.

*Kiajn teatraĵojn vi konas?* Mi konas komediojn, kiuj estas plenaj de bonhumoro kaj sprito, kaj tragediojn, en kiuj la heroo, la plej eminenta persono, mortas pro sia propra kulpo aŭ per kulpo de aliaj.

*Kien oni iras dum la paŭzoj de la reprezentado?* Inter la diversaj aktoj okazas paŭzoj grandaj kaj malgrandaj. Dum la grandaj paŭzoj la vizitantoj, kiuj ne volas resti en la rigardejo, iras en la refreŝigejon al la <sup>34</sup>. Tie oni povas preni bulkojn kun rostajo aŭ fromaĝo, glason da biero aŭ vino, glaciaĵon aŭ konfitaĵon. Post la tria signo de la tintilo la reprezentado estas daŭrigata, kaj estas necese, ke la rigardantoj revenu al siaj seĝoj.

*Kiel oni povas kritiki teatraĵon?* La opero (dramo, komedio, tragedio, la ludaĵo) plaĉis al mi, kontentigis min, malplaĉis al mi; enuigis min, ne faris impreson al mi. La teatraĵo estis tro terura, tro frivola, tro malmulte serioza.

*Kion oni povas vidi en la muzeoj?* En la etnologiaj muzeoj oni vidas la laborojn de la diversaj rasoj; la natursciencaj muzeoj entenas ĉiuspecajn formitaĵojn el la zoologia, botanika, mineralogia sciencoj. Ni vizitas la arthistoriajn muzeojn, por rigardi <sup>10</sup>, <sup>14</sup> ktp. La koloniaj muzeoj montras la produktojn de niaj kolonioj. — La estro de muzeo estas nomata muzeodirektoro kaj lia helpanto muzeoasistanto.

## KION ONI DEVAS FARI ANTAŬ LA VIZITO DE TEATRA REPRESENTADO.

Oni demandas la <sup>26</sup> pri la <sup>31</sup> kaj demetas tie la ĉapelon kaj la mantelon. Tiam oni ricevas markon, kiu signifas la numeron, kun kiu la <sup>32</sup> konservas la demetitajn vestaĵojn. Antaŭ la eniro en la <sup>30</sup> oni aĉetas programon. Tiu, kiu ne povas vidi bone, pruntas lornon de la <sup>26</sup>. Dum la paŭzoj oni promenas en la <sup>33</sup> de la teatro; oni ankaŭ povas ricevi refreŝigilojn ĉe la <sup>34</sup>.

## JUĜOJ PRI LA TREZOROJ DE MUZEO.

Tiu <sup>6</sup> estas valorega. Tiu <sup>7</sup> estas antikva. La <sup>8</sup> estas tro malgracia. La <sup>10</sup> estas kortuŝanta, nur la <sup>9</sup> estas tro pezece. La <sup>12</sup> estas tro multkolora. La figuroj de la <sup>15</sup> ne estas plastikaj. La <sup>18</sup> montras tre penplenan laboron. La ornamoj sur la <sup>19</sup> havas tre bonan efikon. La <sup>23</sup> pligrandigas la efikon de la <sup>21</sup>.

## DEMANDOJ.

El kiuj seĝoj de la teatro oni povas rigardi la reprezentaĵojn plej bone? (Balkono, pargeto.) Kiu estras la orkestron? (La estro de la orkestro.) Ĉu vi havas vian vestejbileton? En kiu vico estas nia seĝo? Ĉu la muzeo plaĉis al vi? (Ne, ĝi ne estas sufiĉe ampleksa.) Kiujn artajn speciaĵojn ni vidas sur nia bildo? (Statuojn, bildojn, reliefojn ktp.) Kial tiuj objektoj estas en vitra kesto? (Por ŝirmi ilin kontraŭ polvo kaj malseko.) De kie devenis tiu ĉi busto? (El Romo, Grekujo.) Kiujn la du statuoj reprezentas? (Diana, Pallas Athene.) Kiun libron la sinjoro tenas en la mano? (Katalogon, gvidlibron.)

# LA FOIREJO.



- |                         |  |   |                    |
|-------------------------|--|---|--------------------|
| 1. foiro                | 14. karoto                             | 27. pesilo                              | 39. akriĝisto      |
| 2. florvendistino       | 15. fazeolo                            | 28. ŝarĝilo, pezilo                     | 40. akriĝilo       |
| 3. florvendejo          | 16. terpomo                            | 29. fiŝvendejo                          | 41. kamentubisto   |
| 4. potfloro             | 17. bulbo                              | 30. elpendaĵo                           | 42. ŝtupetaro      |
| 5. krono                | 18. benketo                            | 31. tendotegmento                       | 43. balailo        |
| 6. aĉetanto, kliento    | 19. fruktvendistino                    | 32. fiŝvendistino                       | 44. faskbalailo    |
| 7. ombrelego            | 20. pomo                               | 33. pesila telero                       | 45. ŝupurigisto    |
| 8. legomvendistino      | 21. piro                               | 34. angilo                              | 46. sinjorino      |
| 9. monujo               | 22. oranĝo                             | 35. fiŝoj (vivantaj kaj fu-<br>maĵitaj) | 47. broso          |
| 10. lignet(plekt)korboj | 23. kesto                              | 36. fiŝkuvo                             | 48. ŝuo            |
| 11. salik(plekt)korboj  | 24. banano                             | 37. barelo                              | 49. pluvombrelo    |
| 12. kukumo              | 25. klientino, kuiristino              | 38. fiŝreto                             | 50. boto           |
| 13. florbrasiko         | 26. foiroreto (reteto por<br>provizoj) |   | 51. magistratdomo. |

## LA FOIREJO.

Sur la granda <sup>1</sup> antaŭ la <sup>51</sup> ĉiusemajne oni foiras unu- aŭ dufoje. La loĝantoj de la urbo tie povas aĉeti tion, kion ili bezonas por la kuirejo, ĉe la vendistoj, kiuj venas el la vilaĝo kun siaj freŝaj nutraĵoj. Kiom kontente la <sup>8</sup> sidas sur sia <sup>18</sup>! Certe ŝi havas tre bonajn aĵojn, kiujn ŝi laŭdas laŭtvoĉe. Kontraŭ la suno kaj pluvo ŝi estas ŝirmata per <sup>7</sup>, de kiu dependas kelke da ĉenoj de <sup>17</sup>. La plej diversaj specoj de freŝa legomo staras antaŭ ŝi en <sup>10</sup> kaj <sup>11</sup>. Ŝi metas la monon, kiun ŝi enkasigas, en sian grandan <sup>9</sup>. Apud la <sup>8</sup> ni vidas <sup>19</sup>. Ŝajnas esti la plej bela sezono, ĉar estas la tempo de freŝaj <sup>22</sup>, kaj en grandaj <sup>11</sup> kuŝas <sup>20</sup>, <sup>21</sup> kaj aliaj specoj de fruktoj. La <sup>19</sup> pesas siajn fruktojn sur la <sup>27</sup>; antaŭ ŝi staras la <sup>25</sup>, kiu jam ĉe la najbara vendejo aĉetis nutraĵojn por porti ilin hejmen en <sup>26</sup>. — De la <sup>7</sup> dependas branĉeto kun <sup>24</sup>. Malantaŭ la <sup>8</sup> kaj <sup>19</sup>, <sup>3</sup> estas starigitaj. La floroj estas en plena florado. Oni rimarkas inter ili petuniojn kaj geraniojn, kiuj en la

somero ornamas la ĝardenojn kaj balkonojn, krom tio dantojn, fuksiojn ktp. La<sup>2</sup> ĝuste prezentas<sup>4</sup> al<sup>6</sup>; desur la tablo pendas<sup>5</sup>. Ne malproksime de la<sup>51</sup> ni rimarkas<sup>29</sup>, kies<sup>31</sup> montras<sup>30</sup>. Ĉiu vidas, ke tie oni vendas<sup>35</sup>, ekzemple<sup>34</sup>. La<sup>32</sup> staras malantaŭ la tablo, sur kiu diversaj fumajitaj<sup>35</sup> estas elmetitaj en diversaj<sup>23</sup>; sia edzo sin okupas pri<sup>37</sup>, el kiu li elprenas la vivantajn<sup>35</sup> per<sup>38</sup>, dum sia edzino metas ilin sur la<sup>33</sup>.<sup>39</sup> alvenis sur la foirejo; ĉiuj<sup>6</sup> uzas la okazon por doni al li la mala-krigintajn tranĉilojn kaj tondilojn, por ke li akrigu ilin. En la antaŭaĵo iras<sup>41</sup>, nomita „la nigrulo“, kiu kun siaj iloj,<sup>42</sup>,<sup>43</sup> kaj<sup>44</sup> rapidas al sia kutima laboro.<sup>45</sup> estas puriganta la<sup>48</sup> de juna, elegante vestita<sup>46</sup>, kiu sin apogas sur sia<sup>49</sup>; versaĵne li hodiaŭ ankoraŭ multfoje movos sian<sup>47</sup> kaj enspezos kelkajn monerojn.

## KION ONI DEVAS FARI KAJ DIRI.

### *Ĉe la fruktvendistino.*

Vendistino: Per kio mi povas servi al vi?

Klientino : Ĉu vi havas freŝajn ovojn? Kiom ili kostas?

Vendistino: La dekduo kostas 1 frankon kaj 20 centimojn

Klientino : Donu al mi, mi petas, dekduon da ili.

Vendistino: Ĉu vi deziras ankoraŭ aliajn aĵojn?

Klientino : Jes, mi petas du funtojn da<sup>20</sup> kaj tri<sup>24</sup>. Kiom mi devas pagi entute?

Vendistino: 3 frankojn.

Klientino : Nun mi volas ankoraŭ aĉeti fiŝojn.

Vendistino: Bonvolu reveni al mi tre baldaŭ, mi faras mian komplimenton.

### *Ĉe la florvendistino.*

Kliento : Mi volas aĉeti florojn por mia balkono; kiajn vi rekomendas?

Vendistino: Eble via moŝto prenos kelkajn ruĝajn geraniojn kaj pelargoniojn, kiuj nuntempe floras tre bele; ili estas tre rekomendindaj, ĉar ili floradas dum la tuta somero ĝis la aŭtuno.

Kliento : Bone, sendu al mi dek potojn de ĉiu speco. Cetere mi volas mendi ankaŭ ĉe vi<sup>5</sup>; unu el miaj amikoj mortis kaj morgaŭ la enterigo okazos; pro tio mi bezonas tre belan kronon.

Vendistino: Ni liveras<sup>5</sup> je ĉiu prezo; eble laŭra krono kun freŝaj rozoj kaj palmbranĉeto konvenas al vi?

Kliento : Kiom ĝi kostos?

Vendistino: Kvin frankojn.

Kliento : Sendu ĝin, mi petas, senpere al la funebrantoj; tie ĉi estas mia vizitkarto kun la adreso.

Vendistino: Mi tre dankas, sinjoro, ĉio estos plenumata precize.

## DEMANDOJ.

Kiuj fruktoj ne prosperas en nia klimato? (Oranĝoj, citronoj, figoj k. a.) De kie ili venas? (Italujo, Francujo, Hispanujo.) Kiel oni nomas ilin pro tio (Sudfruktojn). Kiuj fruktoj venas al ni el la tropiklandaj kolonioj? (Ananasoj, bananoj.) Kiel ili estas forsendataj? (En kestoj kaj korboj, plejmulte ankaŭ nematuraj.) Kie oni deponas ilin plej konvene? (En la kelo.) Kiel oni povas konservi fruktojn? (Per konfitado.) Kian aparaton la mastrinoj uzas por konservi la fruktojn? (La konservaparaton.) Per kio oni sukcesas konservi ilin? (Per steriligo.)

## LA FAJROBRIGADO KAJ LA STRATPURIGADO.



52. brulado  
 53. fajrobrigadisto  
 54. kasko  
 55. hakilo  
 56. vaporestingilo  
 57. akvoŝpruco  
 58. vaporo  
 59. flamo  
 60. flamo  
 61. meĥanika ŝtupetaro.  
 savŝtupetaro

62. ŝprucitubo  
 63. sako da karboj  
 64. ŝovelilo  
 65. ŝnuro  
 66. portilo, blankardo  
 67. amaso da homoj  
 68. fenestra kovrilo

69. strato  
 70. kafejo  
 71. estrado  
 72. markezo  
 73. tablo  
 74. seĝo  
 75. kelnero  
 76. gasto  
 77. gazeto  
 78. stratpurigisto  
 79. malpuraĵo, polvo

80. stratpurigmaŝino  
 81. cilindra broso  
 82. veturigisto  
 83. spruĉigveturilo  
 84. tubo  
 85. akvokrano  
 86. akvo  
 87. ĉevalo  
 88. preĝejturo  
 89. balkono  
 90. balailo.

## LA FAJROBRIGADO.

Granda fajro ekbrulis. Versajne ĝi naskiĝis per ia nesingardemo, aŭ infanoj ludis kun alumetoj. Nun la <sup>60</sup> venas el ĉiuj fenestroj, la vitroj estas rompitaĵ. La <sup>68</sup> falas malsupren; la <sup>53</sup> devas treege klopodi por savi ĉiujn loĝantojn de l'brulanta domo. Kuraĝa <sup>53</sup> eniras la domon per alta <sup>61</sup> kaj savas homon jam per la <sup>59</sup> senkonsciigintan; virino vokas je helpo. Alia <sup>53</sup> fiksas <sup>65</sup> supre al la tegmenta etaĝo kaj firmtenas ĝin malsupre, por ke la loĝantoj de la pli supraj etaĝoj povu malsupreniri kaj esti savataj. La fajrobrigadistoj klopodas estingi la <sup>60</sup>, penantaj ŝirmi la brulantan domon per grandaj kvantoj da akvo. Iu el ili tenas la longan <sup>62</sup> en la mano. La <sup>56</sup> peras ĉiaman novan alprovizon de akvo. Unu el la <sup>53</sup> zorgas pri la kaldronego, li metas karbojn el la <sup>63</sup> en la maŝinon. El la domo du <sup>53</sup> elportas malsanulon sur <sup>66</sup>; li saĝnas esti senkonscia, certe li suferas, ĉar la fumo kaj la flamoj lezis lin.

## DEMANDOJ.

Kiel la brulo naskiĝis? (Nesingardemo, eksplodo, malbonvola intenco.) Kiam la fajrobrigado estas alarmita? Ĉu la fajrobrigadestro ĉeestas? Ĉu la tuta estingilaro partoprenas la estingan laboron? Kiel la kuraĝaj fajrobrigadistoj estos rekompencataj? Kian aparaton la fajrobrigadistoj uzas, por esti sirmataj kontraŭ fumo kaj flamoj? (oksigenpumpilo.) Ĉu la domo estis asekurita? Ĉe kiu asekura kompanio? Kiom alta la asekurpremio estas? Kiamaniere la fajrobrigadistoj estas sirmataj kontraŭ la fumo? (Fummaskoj.) Kiel ili donas la unuan helpon al la brule vunditaj? (Arta spirado, revivigprovoj.) Kie ili lernis tiun specon de flegado? (En kurso por flegistoj.) Kiel la fajrobrigado sukcesas, por helpi tiel rapidege? (Ĉiama preteco de la viroj kaj ĉevaloj.)

## LA STRATPURIGADO.

Sur la <sup>71</sup> de <sup>70</sup> ni vidas nombron de <sup>73</sup>, je kiuj kelkaj <sup>76</sup> refreŝigas sin prenante kafon, glaciaĵon, bieron ktp. <sup>75</sup> alportas tason da kafo al <sup>76</sup>, kiu legas la <sup>77</sup>. Antaŭ la <sup>71</sup>, sur la <sup>69</sup>, <sup>80</sup> kaj <sup>83</sup> funkciadas. La <sup>86</sup> fluas el la <sup>83</sup>; lerta <sup>82</sup> instigas sian <sup>87</sup>. Post kiam la <sup>86</sup> funde malsekigis la <sup>69</sup>, la <sup>80</sup> moviĝas; la granda kaŭĉuka <sup>81</sup> flanken metas la polvon kaj la <sup>86</sup> ĝis la rando de la asfalto; <sup>78</sup> finas la purigadon per <sup>90</sup>; la <sup>86</sup> defluas per kanaliztubo. En grandaj urboj la stratoj estas purigataj matene, ankaŭ kiam la veturila interkomunikiĝo komenciĝas. Tie kaj tie oni vidas ankaŭ aŭtomobil - <sup>88</sup> kaj - <sup>80</sup>, kiuj donas pli grandajn kvantojn da akvo.

## DEMANDOJ.

Kiu estras la stratpurigadon? (Oficisto.) Kiuj partoprenas tiun ĉi laboron? (Ĝenerale maljunetaj homoj kaj knaboj.) Kiujn ilojn ili uzas? (Balailo, ŝovĉareto, sovelilo.) Kian uniformon ili portas? (Kaskoj kun numeroj, malhelaj jakoj, mallongaj pantalonoj, altaj botoj.) Kien oni metas la malpurigaĵojn de la strato? (Kanalizacio.) Kien oni portas la neĝon, kiu dum la vintro tre ofte malhelpas la iradon sur la stratoj? (En la ĉirkaŭaĵon, sur la kampojn.) Kiel la trotuaro estas purigata? (Per vergbalailo.) Kiel oni ŝirmas la pasantojn kontraŭ akcidentoj dum glitvetero? (La pordistoj de la domoj disĵetas sablon kaj cindron.) Kiamaniere la administracio de la stratpurigado ŝirmas la tirĉevalojn kontraŭ akcidentoj dum glacia kaj glita vetero? (Per disĵetado de sablo kaj stonetaĵoj, precipe sur la pontoj kaj deklivaj vojoj.)

## DIALOGO.

A.: Kien vi iros hodiaŭ vespere post la teatra prezentado?

B.: Mi renkontos mian amikon en la <sup>70</sup>. Ĉu vi ankaŭ volas veni tien?

A.: Certe, tre volonte! Mi sidas tie regule post la tagmanĝo, por legi kelkajn <sup>77</sup>.

B.: Vespere tie bona orkestro muzikadas. — Kie vi estas posttagmeze?

A.: Plejofte mi sidas je <sup>73</sup> sur la <sup>71</sup>. De tie mi povas senĝene rigardi la viglan interkomunikiĝon sur la <sup>69</sup>. Ofte oni vidas ankaŭ la <sup>80</sup> kaj <sup>83</sup>. Sed kiam ili funkciadas, tiam mi preferas sidi sur la <sup>89</sup> pro la polvo, kiu ĝenas malgraŭ la <sup>85</sup>.

# AŬTOMOBILOJ. – AERVETURILOJ.



- |   |   |                                 |                                  |
|---|---|---------------------------------|----------------------------------|
| 1. personaŭtomobilo                     | 14. ventsŝirmilo                        | 27. gamaŝo                      | 40. altendirektilo               |
| 2. karoserio                            | 15. direktilo                           | 28. pedalo                      | 41. flankendirektilo             |
| 3. motoro                               | 16. (aŭtomobil-) trumpeto               | 29. ĉapo                        | 42. (aerŝip-, aerostat-) gondolo |
| 4. cilindro                             | 17. taĥimetro (mezurilo de la rapideco) | 30. ŝarĝaŭtomobilo              | 43. pasaĝerejo                   |
| 5. malvarmigilo                         | 18. oleo-kontrolaparato                 | 31. kovrilo                     | 44. aviadilo                     |
| 6. ventolilo [ilo]                      | 19. lanterno                            | 32. rimorko (alligita veturilo) | a) monoplano                     |
| 7. kapoto (tegmenta ŝirmo)              | 20. ŝoforo, konduktoro                  | 33. motorplugilo                | b) biplano                       |
| 8. rado                                 | 21. oleujo                              | 34. aerŝip-garaĝo               | 45. direktilvosto                |
| 9. radradio                             | 22. motorciklisto                       | 35. pordego                     | 46. portila surfaco              |
| 10. pneŭmatika ringo                    | 23. oĝulsŝirmilo                        | 36. aviadilŝedo (aviadilejo)    | 47. aerostato                    |
| 11. piedbreto                           | 24. motorciklo                          | 37. aviadisto                   | 48. ŝnuraerostato                |
| 12. acetilenaparato                     | 25. radrondo                            | 38. aerŝipo                     | 49. ŝoseo                        |
| 13. parafango (ŝirmilo kontraŭ la koto) | 26. benzinujo                           | 39. antaŭenpelilo               | 50. kilometroŝtono               |



# AŬTOMOBILOJ. — AERVETURILOJ.

Tio, kion ni vidas sur nia bildo, montras kelkajn el la plej novaj kaj eminentaj eltrovaĵoj, unue modernajn veturilojn, kiuj veturas surtere helpe de motoroj, nome <sup>1, 24, 30</sup> kaj <sup>33</sup>, due tiajn, kiuj ebligas veturi tra la aero, nome <sup>38, 44, 47</sup>, kaj <sup>48</sup>. La ĉefaj partoj de la <sup>1</sup> estas la <sup>2</sup> kaj la <sup>3</sup>. La laste nomitan vi povas vidi sur nia bildo, ĉar ĝi ne estas kovrita per la <sup>7</sup>, per kiu oni kutime kovras la maŝinajn partojn de la aŭtomobilo. Krom la <sup>3</sup> al ili apartenas la <sup>4</sup>, la <sup>5</sup> kaj la <sup>6</sup>. La kvar <sup>8</sup> de l' aŭtomobilo kaj ties <sup>9</sup> devas esti tre fortikaj, kaj estas necese, ke ili havu tre bonajn <sup>10</sup>, se oni volas eviti tro oftajn difektojn dum la veturado. La <sup>11</sup> samtempe — ambaŭflanken plilongigita — servas kiel <sup>13</sup>. Sur la <sup>11</sup> vi vidas la <sup>12</sup>, kiu liveras la gason por la granda <sup>19</sup>. En la <sup>2</sup>, en kin la <sup>20</sup> sidas dum la veturado, vi vidas tri ilojn, kiujn li bezonas: la <sup>15</sup> por direkti la veturilon, la <sup>16</sup> por anonci la alvenon de l' aŭtomobilo kaj la <sup>17</sup>; krom tiuj la <sup>18</sup>. Dumnokte la <sup>20</sup> per la <sup>19</sup> heligas la vojon, sur kiu li volas veturi. Sur nia bildo vi vidas lin staranta malantaŭ la <sup>1</sup>; li tenas en la mano la <sup>21</sup> kaj kontrolas la <sup>3</sup>. —

Sur la <sup>49</sup>, maldekstre de la <sup>50</sup>, juna <sup>22</sup> veturas sur <sup>24</sup>. Li surhavas <sup>23</sup> kaj <sup>29</sup>. Liaj piedoj staras sur la <sup>28</sup>, ĉirkaŭ siaj kruroj li havas <sup>27</sup>. Ankaŭ la <sup>24</sup> havas <sup>3</sup>; sed ĝi havas nur du <sup>8</sup>, al kiuj ankaŭ apartenas <sup>9, 10</sup> kaj <sup>25</sup>. La <sup>19</sup> kaj <sup>16</sup> de la <sup>24</sup> estas pli malgrandaj ol tiuj de la <sup>1</sup>; la <sup>13</sup> de la <sup>24</sup> estas ne tiel larĝaj. La <sup>28</sup> super la <sup>3</sup> de la <sup>24</sup> liveras la materialon, per kiu la <sup>3</sup> estas provizata, nome la benzinon.

Komprenoble la aŭtomobiloj estas uzataj ankaŭ por transportaj aferoj. Do oni havas aŭtomobilajn veturilojn por tiu celo, kiujn oni nomas <sup>30</sup>. — La <sup>30</sup> estas konstruita simile al la <sup>1</sup>, precipe rilate la antaŭan parton. La <sup>2</sup> de la <sup>30</sup> servas, por enmeti en ĝin la sargojn, kiujn oni volas transporti. Ĝi havas grandan <sup>31</sup>, por ŝirmi la enhavon de la veturilo kontraŭ polvo kaj pluvo. Facile oni povas alligi al la <sup>30</sup> aliajn veturilojn, kiuj ne bezonas apartan <sup>3</sup> ktp.; oni nomas ilin <sup>32</sup>. Komprenoble ankaŭ la agrikulturo profitis la aŭtomobilojn, laborante nun per <sup>33</sup>.

Dank' al la tehnikaj progresoj, precipe rilate la aŭtomobilajn motorojn, la homoj hodiaŭ povas flugi kaj traveturi la aeron. Ĉar la <sup>47</sup>, kiu portas sian gvidanton en <sup>42</sup>, ne povas esti direktata laŭ la volo de l' homo, oni jam depost longa tempo pripensis pri la ebleco de direktebla <sup>38</sup>.


La <sup>38</sup> sur nia bildo apartenas al la klaso de la Zeppelina tipo. Ĝi havas la formon de granda cigaro; je ambaŭ flankoj ĝi havas du <sup>39</sup>. La <sup>40</sup> kaj <sup>41</sup> estas fiksitaj je la pli dika, malantaŭa parto. Je la malsupra parto oni rimarkas du <sup>42</sup>, inter kiuj la <sup>43</sup> sin trovas. En ĝi oni povas transporti kelke da dekoj da personoj.

La aerveturado por unuopaj personoj estas ebligita per la <sup>44</sup>. Oni diferencigas inter <sup>44a</sup> kaj <sup>44b</sup>, kiuj ne estas malsimilaj rilate la ĉefan ideon, sed nur rilate la diversajn formojn kaj la pozicion de la <sup>46</sup>. Kiel la <sup>38</sup> ankaŭ la <sup>44</sup> havas <sup>39</sup> kaj <sup>45</sup>. Personoj, kiuj povas direkti <sup>44</sup> kaj flugi per ĝi estas nomataj <sup>37</sup>. La <sup>48</sup> ĝenerale nur servas al militaj celoj. Post la aervojaĝo oni tiras la <sup>38</sup> tra la <sup>35</sup> en la <sup>34</sup>, kaj la <sup>44</sup> en la <sup>36</sup>.

## DIALOGO.

- A. Ĉu estas vere, ke vi estas kontraŭulo de la aŭtomobila sporto? Tio ŝajnas al mi neebla, ĉar certe ĉiu devas konfesi, ke la aŭtomobilo estas tre bona kaj utila eltrovo. Helpe de la aŭtomobilo ni povas vojaĝi pli rapide ol per la fervojo, kaj precipe tio estas granda progreso, ke la aŭtomobilaj veturiloj ne bezonas relojn, kiel la fervojo. Aŭ ĉu vi neas tiun progreson?
- B. Mi certe ne. Tamen mi ne ŝatas vojaĝi per aŭtomobilo. Ĉar tio ĉiam estas danĝera afero, plue oni tre ofte havas difektojn de la veturilo, per kiuj oni estas retenata tro longtempe. Kaj, ĉar kutime la aŭtomobilistoj rapidegas veturante, la ĝuo kaj plezuro de tiu, kiu vojaĝas aŭtomobile ne estas tiel granda, kiel ekzemple, se oni vojaĝas rajdante aŭ veturante per ĉevaloj.
- A. Nu, pri la ĝuoj oni ne povas diskuti, kiel jam latina proverbo diras. Mi ne konas pli grandan plezuron ol la aŭtomobilisporton. Ju pli rapide mi povas veturi, des pli granda mia ĝuo.
- B. Sed tiam certe ne la ĝuo de tiuj estas granda, kiuj devas iri aŭ rajdi aŭ bicikli sur la ŝoseo, kiun via aŭtomobilo rapidpasas, ĉar ili devas engluti la polvon de la stratoj, kiu kvazaŭ densa nebulo dum longa tempo sekvas la postsignon de la aŭtomobilisto.
- A. Mi konsentas vin, ke nia sporto povas esti malagrablajo por la promenantoj kaj piedirantoj, Pro tio estas necese, ke oni konstruu apartajn vojojn kaj ŝoseojn por la aŭtomobilistoj.
- B. Tamen mi ne fariĝus amatoro de tiu sporto, ankaŭ ne de la aviadista sporto. Eble mi estas tro maljuna por havi sufiĉan intereson kaj plezuron por ĝi. Sed tre volonte iufoje mi veturus en la aerŝipo. Certe oni havos grandegajn impresojn flugante tra la aero sen esti devigata samtempe zorgi pri la direkto kaj la maŝino de la veturilo.
- A. La tempo certe tre baldaŭ venos, kiam oni havos regulajn okazojn, vojaĝi per aerŝipoj kaj grandaj aviadiloj, kaj certe ankaŭ tiel bone kaj sendanĝere, kiel per la fervojoj

# ŜIPOJ KAJ HAVENO. - LA KOMPASO.



- |                                   |   |   |  |
|-----------------------------------|---|---|--|
| 1. ŝipo (oceana vaporŝipo)        | 26. portisto                                      | 50. tegmento  | d) kamereto  |
| 2. ŝipkorpo                       | 27. komerepakajo                                  | 51. hotelservisto   | e) kaŭĉkupilko (fermas kaj malfermas la fermilon)                |
| 3. ŝraŭbo                         | 28. pakajo  | 52. motorboato  | f) distancserĉilo (ĝi servas por difini kaj reguli la distancon) |
| 4. direktilo                      | 29. vojaĝpoŝo, vojaĝosako                         | 53. maro  | 67. faldseĝeto   |
| 5. ŝnurego                        | 30. pako, paketo                                  | 54. kajo, ĝeto, havendigo   | 68. faldseĝo   |
| 6. flago                          | 31. kofro   | 55. lumiga turo, lumiga fajro, lumturo, lumfajro                          | 69. vojaĝa kovrilo   |
| 7. flagstango                     | 32. dogano  | 56. velŝipo   | 70. vojaĝĉapo  |
| 8. malantaŭa parto                | 33. enirejo                                       | 57. kila akvo   | 71. naĝzono  |
| 9. antaŭa parto (beko, bek masto) | 34. elirejo                                       | 58. radvaporŝipo  | 72. kajuto   |
| 10. ŝipbalustrado (relingo)       | 35. doganisto                                     | 59. komandantponto  | 73. supra lito   |
| 11. ferdeko                       | 36. bariero                                       | 60. direktiltrado   | 74. malsupra lito  |
| 12. pavezo                        | 37. pakajĉaro                                     | 61. ferdeka heligfenestro   | 75. ŝtupetaro  |
| 13. boatpendigilo                 | 38. elmigrantoj                                   | 62. ŝipestro  | 76. ĉambristino  |
| 14. savboato                      | 39. kajo, haveno                                  | 63. kelnero   | 77. breto kun la maten-  |
| 15. ventolilo                     | 40. alligila paliso                               | 64. amatorfotografisto  | [manĝo   |
| 16. ŝnuregaro                     | 41. elŝarĝisto                                    | 65. fotografa aparato   | elektra  |
| 17. ŝnurŝtuparo                   | 42. ŝarĝisto                                      | 66. stativo   | [lampo   |
| 18. gruo                          | 43. ŝnurego                                       | a) fotografa plato  |  |
| 19. ret                           | 44. falŝtuparo                                    | b) lenso (parto de la aparato, kiu enlasas la lumon)                      |  |
| 20. supra ferdeko                 | 45. fenestreto (lukoj) en kajuto de la unua klaso | c) fermilo (parto de la aparato kiu malhelpas la enpenetradon de la lumo) |  |
| 21. fumtubo                       | 46. fenestreto (lukoj) en kajuto de la dua klaso  |   |  |
| 22. fumo                          | 47. anko  |   |  |
| 23. masto                         | 48. pakajdeponejo                                 |   |  |
| 24. pendŝtuparo                   | 49. omnibuso                                      |   |  |
| 25. pasaĝero                      |   |   |  |

# ŜIPOJ KAJ HAVENO. — LA KOMPASO.

La granda bildo montras al ni <sup>39</sup>. Du grandaj <sup>1</sup> albordiĝis, la <sup>1</sup> je la dekstra flanko ĵus alvenis. La <sup>25</sup> malsupreniras la <sup>4</sup> kaj estas salutataj de siaj familianoj. Ili tuj iras en la <sup>32</sup>, por kontroligi siajn <sup>29-31</sup>. La grandaj pakajoj estas malsuprenigataj per <sup>18</sup>, dum la pli malgrandaj estas portataj de la <sup>25</sup> mem, aŭ de la <sup>26</sup>. La maldekstra <sup>1</sup> baldaŭ foriros. La <sup>29-31</sup> estas enŝargataj; kelkaj <sup>25</sup> jam venas al la <sup>11</sup>, por iri al la <sup>72</sup>. Maldekstre, en la antaŭaĵo, staras grupo de <sup>38</sup>, kiuj ĵus forlasis la <sup>49</sup>. Ili esperas trovi en malproksima lando feliĉon kaj riĉecon. Inter ambaŭ ŝipoj ni vidas la <sup>55</sup>, kiun <sup>56</sup> preterveturas. <sup>52</sup> alproksimiĝas al la <sup>39</sup> Ĝi montras la saman <sup>6</sup> kiel la ŝipo por la elmigrantoj.

## DEMANDOJ.

Per kio la <sup>1</sup> moviĝas antaŭen? (La velŝipoj — per la vento, la vaporŝipoj — per vaporo, la motorboatoj — per petrolo). Kiel la <sup>1</sup> estas avertataj kontraŭ malprofundaĵoj kaj rifoj? (Per <sup>55</sup>, naĝsignoj, sonoriloj.) Kiu gvidas la <sup>1</sup> en la havenon? (La piloto.) Kiom da <sup>21</sup> la dekstra ŝipo havas? Kiuj specoj de vaporŝipoj ekzistas? (a. Plezurvaporŝipoj, por vojaĝoj de turistoj ktp. b. transportvaporŝipoj, por ekspedi komercaĵojn; c. militvaporŝipoj, por defendi la patrujon sur la maro.) Per kiuj iloj homoj debordiĝintaj estas savataj? (Per <sup>14</sup>, <sup>71</sup>.) Kiuj homoj estas sur la <sup>11</sup> de la dua bildo? Kie la <sup>62</sup> aŭ la anstataŭanta oficiro staras? Kiuj saviloj estas sur la ŝipbordo? Ĉu ni preterpasos glacimontojn aŭ vidos ilin de malproksime? Ĉe kiu kompanio la ŝipo estas asekurita? Ĉu la proprajoj de la vojaĝantoj, la pakajoj kaj valoraĵoj estas asekuritaj kaj je kiu prezo? Ĉu la savboatoj estas fiksitaj tiel, ke en danĝero ili povas esti uzataj rapide? Ĉu la ŝipo en danĝero povas telefoni sendrate kun aliaj ŝipoj? De kie venas la akrega sono, kiun mi aŭdis tiun ĉi nokton en regulaj intertempoj? (De la sirenoj.) Kiam vokas la sirenoj? (Dum nebula vetero.)

## ĈIUSPECAJ FRAZOJ DUM LA SURŜIPA VIVADO.

*Se oni iras al la bordo de vaporŝipo:* Mi petas <sup>72</sup> en la mezo de la <sup>1</sup>. Mi petas la <sup>74</sup>. Oni demandas dum la veturado: Kiom da tempo necesas por la transveturo? Kie la maro estas plej maltrankvila? Ĉu ni havos bonan transveturon?

*Se oni volas demandi pri la manĝo:* Kiam komenciĝas la tagmanĝo? Ĉu mi povas preni la tagmanĝon en mia <sup>72</sup>, ĉar mi estas iomete malsana? Mi petas la manĝkarton!

## DIALOGOJ.

Pasaĝero: Sinjoro <sup>62</sup>, ĉu nia transveturado estos tre ventega?

Kapitano: Mi ne kredas; la maro estas trankvila; neniuj antaŭsignoj de vento.

Pasaĝero: Tre ĝojiga anonco! Mi timas la marmalsanon. Kiamaniere oni povas sin gardi kontraŭ ĝi?

Kapitano: Vi restu en la mezo de la ŝipo kaj ne enspiru la fumon.

Pasaĝero: Sinjoro kapitano, ĉu vi havas sursipe sufiĉe da savzonoj, savveŝtoj, savboatoj?

Kapitano: Vi ne zorgu; krom tio ni havas sendratajn telefonojn kaj dum la tuta veturado la lumturoj donas al ni signalojn.

Pasaĝero: Sed kiam la ŝipo fendiĝos aŭ terrompiĝos?

Kapitano: Tiuokaze oni ĵetas al ni ŝnurojn per raketoj el la savstacio, kiujn ni ekprenas kaj fiksas, por savi per ili la pasaĝerojn.

---

Sinjoro al la <sup>63</sup>, kiu alportas la kafon: Kial hodiaŭ tiel malmultaj <sup>25</sup> estas sur la <sup>11</sup>?

Kapitano: La plej multaj gesinjoroj ankoraŭ dormas post la tagmanĝo en siaj <sup>72</sup>; unu sinjorino bedaŭrinde marmalsaniĝis. Je la 4a oni certe revenos al la ferdeko.

Sinjoro : Ĉu neniu rimedo ekzistas, por gardi sin kontraŭ tiu malagrabra malsano?

Kapitano: Ne, mi nur povas konsili, ke oni kuŝigu sin trankvile, por eviti tiun malsanon; ĉiuj aliaj rimedoj estas kaj restas neefikaj.

---

Sinjoro : Tie ja venas <sup>64</sup> kun sia <sup>65</sup>; mi petos lin, ke li fotografu min.

La fotografisto al la Sinjoro: Mi petas vin, sidu tute senmova. Bone! Rigardu vian gazeton. Metu la kapon iomete dekstren. mi petas. Dankon, la fotografado finiĝis.

Sinjoro : Ĉu vi mem rivelas?

La <sup>64</sup> : Jes, ĉar en la ŝipo ni havas rivelĉambron.

Sinjoro : Kiam vi faros la kopiojn?

La <sup>64</sup> : Tuj kiam mi havos la tempon, mi alportos ilin al vi.

---

## EN LA DOGANO.

Doganisto: Ĉu vi devas pagi limimposton?

Pasaĝero : Ne, mi nur havas aĵojn, kiujn mi jam uzis.  
Mi petas, ke vi kontrolu mem.

Doganisto: Ĉu vi havas tabakon?

Pasaĝero : Nur neplenan keston da cigaroj en tiu poŝo.

Doganisto: Tiam ne estas necese pagi.

Pasaĝero : Ĉu eble mi povas foriri?

Doganisto: Momenton, mi petas. Se sinjorino via edzino havas ornamaĵojn, multvalorajn punktojn aŭ silkon, ŝi devas pagi limimposton.

---


# LA KOMPASO.

La kompaso servas por determini la ĉielajn direktojn kaj pro tio ĝi estas tre necesa ilo por la ŝipveturado kaj por la vojaĝo en fremdaj, neesploritaj regionoj. Ankaŭ la gvidantoj de direkteblaj aerŝipoj kaj la aviadistoj bezonas la kompason. — Ĝi estas instrumento, kiu konsistas el magneta vergeto („nadlo“) libere turniganta kaj ĉiam montranta per unu pinto la nordon, per la alia la sudon; sed la magneta nadlo iomete dekliniĝas al okcidento (westo) aŭ al oriento. Tiu ĉi devio, kiu diferencas en la diversaj regionoj de la tero, estas nomata „deklino“.

La kvar ĉefaj direktoj estas nomataj: nordo, oriento, sudo, okcidento (westo). La suno leviĝas en oriento, staras tage en sudo kaj subiras vespere en okcidento. Tion nature

ĝia proksimeco vi trovas la nordan poluson de la ĉielo. Tiu stelo estas ankaŭ helpilo por la maristoj kaj la vojaĝantoj, por trovi la ĉielajn direktojn. Pro tio la maristoj ŝatas nomi la nordstelon la „kondukan stelon.“

Ĝis nun oni ne scias, ĉu la kompasoj estas eltrovaĵo de la okcidentaj aŭ de la orientaj popoloj. En Eŭropo oni legas pri ĝi jam je la fino de la 11a jarcento. Je la fino de la sekvanta jarcento oni jam parolas pri ĝi kiel pri tute konita afero. La kompasoj por la ŝipveturo estas eltrovita je la komenco de la 14a jarcento kaj la eltrovinto verŝajne estas Italio. Post tiu ĉi tempo oni plibonigis la kompasojn dum ĉiuj jarcentoj tiamaniere, ke ni hodiaŭ havas kompasojn de plej alta perfekteco. La plej perfektaj kompasoj ne nur funkcias treege precize, sed ili ankaŭ kontrolas kaj notas sur paperstrioj la direkton de la vojo, kiun la ŝipo iras.



nur observas la loĝantoj de la norda duonglobo de l' tero. En sennubaj noktoj oni povas vidi belajn stelfigurojn. Unu el la plej konataj figuroj estas la „ĉiela ĉaro“, kiun oni ankaŭ nomas la „granda urso“. Plilongigante kvinoble la kunigan linion de la du lastaj steloj de tiu figuro, vi trovas la polusan stelon. En

## KIEL ASPEKTAS LA NORDA POLUSO?

(El la „Krestomatio“.)

Iu Amerika astronomo priskribas la ŝperaĵojn, kiujn oni vidas sur la norda poluso, jenmaniere: La taga lumo daŭras sen interrompo de la 21a de marto ĝis la 22a de septembro. La tuta resta parto de la jaro konsistas el malluma nokto, simila al niaj aŭtunaj noktoj. La steloj estas vidataj, sed oni ne vidas ilian leviĝon aŭ malleviĝon. Ĉirkaŭe regas silento premanta. Poste en tiu ĉi maro glacia komenciĝas ventegoj kaj uraganoj. Inter senlima mallumo oni aŭdas la bruadon de ventegoj, ĝemojn, plorojn, kvazaŭ en la mondon enŝirigis ĉiuj fortoj de la infero, kaj al ĉio tio ĉi la nokto mallumega, nigra, senfina . . . . Sur la malfortan siron de la esplorantoj, kiuj trovas la poluson, premas de ĉiuj flankoj montoj da glacio, sube estas maro kaj nenio plu. La ventegoj bruas kaj fajfas, la ŝipo krakas terure. Poste oni vidas naskiĝantan lumon, flaman brilon de matena ĉielruĝo, anoncanta la venon de la suno. La ĉielo kovriĝas per ora koloro kaj en la daŭro de tri monatoj iom post iom leviĝadas la suno, kaj en la daŭro de la tri sekvantaj monatoj ĝi malleviĝadas. Sed en la tuta daŭro de tiuj ĉi ses monatoj estas konstanta lumo. Poste denove fariĝas mallumo kaj nokto.

# ARMEO. - SOLDATOJ.



- |                     |                |                 |  |
|---------------------|----------------|-----------------|--|
| 1. trenistaro       | 13. fosto      | 25. maŝinpafilo | 37. afusto                             |
| 2. ĉevalo           | 14. tabulo     | 26. patronstrio | 38. ŝildo                              |
| 3. selo kun selsako | 15. boato      | 27. pafofendo   | 39. artileriano                        |
| 4. brido            | 16. bordo      | 28. mangrenado  | 40. pafaĵo                             |
| 5. jungilaro        | 17. kampbotelo | 29. lorno       | 41. pafaĵujo, municikorbo              |
| 6. piedingo         | 18. pansaketo  | 30. substarejo  | 42. reflektoro                         |
| 7. trenisto         | 19. kavalerio  | 31. soldato     | 43. hospitala helpanto,<br>sanitaristo |
| 8. rado             | 20. sabro      | 32. ŝtalkingo   | 44. portilo, blankardo                 |
| 9. sitelo           | 21. karabeno   | 33. bajoneto    | 45. vundito                            |
| 10. kovrilo         | 22. dratbarilo | 34. gamaŝo      | 46. ambulanca veturilo                 |
| 11. pioniro         | 23. tranĉeo    | 35. kanono      |  |
| 12. ponto           | 24. sablosako  | 36. kanontubo   |  |

## ARMEO. — SOLDATOJ.

La institucioj de la diversaj armeoj en la mondo estas tre similaj. Ĉie, kie oni havas soldatojn, oni havas antaŭ ĉio infanterion, kavalerion, artilerion, krom tio <sup>1</sup> kaj inĝenierajn trupojn, al kiuj apartenas la <sup>11</sup>.

Sur nia unua bildo oni vidas aron da <sup>7</sup>. Ili akompanas la veturilojn, per kiuj oni transportas ĉion, kion la armeo bezonas dum la militiro, ekz. nutraĵojn, municion ktp. Kutime la veturiloj de la <sup>1</sup> havas kvar <sup>8</sup>, sed ekzistas ankaŭ tiaj, kiuj havas nur du <sup>8</sup>, kiujn oni nomas ĉarojn. La veturiloj estas kovritaj per <sup>10</sup>, sirmantaj kontraŭ la pluvo, konsistantaj el parioj el dika tolo, fiksitaj per stangoj. Parto de la <sup>7</sup> rajdas sur la <sup>2</sup>, kiuj tiras la veturilojn. La rajdanto sidas sur <sup>3</sup>, tenante en la mano la <sup>4</sup>, kiu apartenas al la <sup>5</sup>. Li tenas la piedojn en la <sup>6</sup>. Por trinkigi la <sup>2</sup> oni bezonas la <sup>9</sup>. Kelkaj <sup>7</sup> piediras flanke de la veturilaro.

La soldatoj sur la dua bildo apartenas al la inĝeniera trupo; ili estas <sup>11</sup>. Ili estas okupataj pri konstruo de <sup>12</sup>; pro tio ili alportas <sup>13</sup> kaj <sup>14</sup> laŭlonge la <sup>16</sup> de la rivero, en kiu naĝas <sup>15</sup>. Kiel la infanteriistoj ankaŭ la <sup>11</sup> havas <sup>17</sup> kaj <sup>18</sup>.

La tria bildo montras kelkajn soldatojn de la <sup>19</sup>, atakantajn <sup>23</sup>. Ĝi estas fortikigita per <sup>22</sup>. La rajdantoj svingas siajn <sup>20</sup> kaj portas je la dekstra flanko <sup>21</sup>, t. e. pafilo kiel la infanteria pafilo, sed pli mallonga. La <sup>23</sup> estas gardata de kelkaj <sup>31</sup> de la infanteria tipo. Ili defendas sin per <sup>25</sup> kaj per <sup>28</sup>. Ili portas sur la kapo la <sup>32</sup>, je la maldekstra flanko la <sup>33</sup> kaj ĉirkaŭ la kruroj <sup>34</sup>. — Kutime oni metas sur la supraĵo de la tranĉea pario multe da <sup>24</sup>, per kiuj la pafilaj kugloj perdas sian efikon. Inter la <sup>24</sup> oni starigas <sup>27</sup>, kiuj ebligas bonan celadon sen esti vidata. Per la <sup>29</sup> oni observas la entreprenojn de la kontraŭulo.

Sur la kvara bildo oni rimarkas kelke da <sup>39</sup> malantaŭ granda <sup>35</sup>, kies dika <sup>36</sup> montras la direkton, kien oni pafas forsendante la <sup>40</sup>. Tiujn la soldatoj alportas en <sup>41</sup>. La ĉefaj partoj de la kanono estas la <sup>36</sup> kaj la <sup>37</sup>. Tre ofte oni sirmas la kanonojn per granda ŝtala <sup>38</sup>. Dum la nokto oni heligas la kontraŭulan pozicion per <sup>42</sup>.

Se soldatoj dum la batalo estas vunditaj, venas kelke da <sup>43</sup>, kiuj portas la signon de la ruĝa kruco; ili forportas la <sup>45</sup> sur <sup>44</sup> al la <sup>46</sup>, kiu transportas ilin al la ambulanco aŭ en la hospitalon.

## RAPIDECO DE L' PAFADO.

La teknikistoj penadis faciligi por la soldato la pafigon de sia armilo. Malmulte komplikaj meĥanismoj ebligis unue meti rapide la kartoĉon en la kanontubon kaj forpeli poste la ingon restintan en ĝi; ĥine, per diversaj sistemoj de ŝargiloj aŭ de magazenoj, metitaj en la armilon mem, oni sukcesis multigi la pafojn, kiuj estas eblaj en determinita tempdaŭro, kaj sekve pli-grandigi rimarkiude la potencon de l' soldato. Laŭ certaj kalkuloj la nunaj pafiloj liveras pli ol 12 pafojn, rilate al unu sola pafado de la armiloj de antaŭ 1867. —

Tiu rapideco eĉ estus treege pligrandigata, se oni alprenus la aŭtomatajn pafilojn nove elpensitajn; ĉe tiuj novaj armiloj ne plu estas necese reŝargi post la unua pafado; sufiĉas meti la fingron sur la malstreĉilon; ĉe ĉiu premo ekpafiĝas; la repuŝforto estas utiligata por ŝargi, streĉi kaj refermi la ŝargujon.

La nombro da kugloj tiel jetataj sur la malamikon estas mireginda; laŭ la eksperimentoj faritaj en Belgujo en la jaro 1897 lerta pafanto povus produkti ne sole 12 aŭ 16, sed 60 pafojn ĉiuminute celante kaj 78 ne celante, kaj, ĉar li ne ĉesas vidi la trafotajn, lia pafado estas multe pli ĝusta. Evidente la ĉefa malhelpo estus la provizigo al la pafanto.

• Kio ajn estas pri tio, cetere, per la nuna armilo la potenco de l' soldato estas rimarkinde pli-grandigata; maltimema soldato povas pafadi tiom, kiom dek, kaj kontraŭstari al tuta malamika grupo.

(laŭ P. Nattau-Larrier.)

## LA ESPERANTISTOJ KAJ LA MILITAJ AFEROJ.

Ĉar ni kredas je la ebleco, ke la popoloj — precipe ankaŭ helpe de komuna internacia helplingvo — en la estonteco komprenos unu la alian pli bone ol ĝis nun, ni ankaŭ kredas, ke la militoj devas ĉesi kaj ĉesos. Nature pro tio nia entuziasmo por la militaj aferoj ne estas tiel granda, kiel por vere kulturaj aferoj. Estus laŭ nia opinio pli bone, se la grandaj armeoj malaperus. Ili krom tio estas tro multekostaj kaj grava ŝarĝo por ĉiuj nacioj kaj ŝtatoj. La grandaj elspezoj farataj en la tuta mondo por la soldataroj ŝajnas al ni ne nur superflujaj, sed eĉ malutilaj.

## BATALAJ SCENOJ

(laŭ H. Dunant „Rememoro pri Solferino“.)

Ambaŭ armeoj estas elvekitaj. Tricent mil homoj staras kontraŭe. La batallinio estas dekmejlle longa. Jam en la tria horo matena korpusoj komandataj de marŝaloj Baraguey d'Hilliers kaj Mac Mahon ekmoviĝas al Solferino kaj Cavriana. Apenaŭ la antaŭaj kolonoj preteriris Castiglione, jam ili trovas sin antaŭ-la unuaj aŭstraj postenoj, kiuj ne cedas la lokon.

En ĉiuj flankoj, klarionoj ludas atakarion kaj tamburoj sonadas. Imperiestro Napoleono, kiu pasigis la nokton en Montechiaro, rapidegas el Castiglione.

Je la sesa horo, la pafado serioze estas komencita. Aŭstroj paŝas densamase, laŭ perfekta ordo, sur landvojoj. En aero flirtas iliaj standartoj nigraj kaj flavaj, sur kiuj estas brodita la antikva imperiaglo. La tago estas helega. En la franca armeo la itala suno lumigas brilajn armilarojn de dragonoj, gvidistoj, lancistoj, gvardiaj kirasuloj.

Tuj ĉe la komenciĝo de l' afero, imperiestro Francisko-Josefo forlasis kune kun sia tuta stabo sian ĉef-kvartiron por iri al Volta. Li estas akompanata de l' arkidukoj de la Lotringa familio, inter kiuj estas ĉefduko de Toskana kaj duko de Modena.

Inter malfacilaĵoj de kampo ne konata de la franca armeo fariĝas la unua renkontiĝo. La soldatoj devas krei al si vojon tra plantaĵoj da morusarboj interplektitaj per alligiĝemaj vinberujoj, kiuj faras neeviteblajn baraĵojn. La tero estas trastrekita per grandaj defluiloj sekigiĝintaj kaj per longaj muroj nealtaj sed tre larĝaj en sia malsupro. La ĉevaloj devas transsalti tiujn sulkojn kaj murojn.

El siaj montetoj, Aŭstroj ŝutas sur la malamikojn senpaŭzan hajlon da grenadoj, bomboj, kuglegoj. Kun fumo de kanonoj pafantaj kuglare miksiĝas teraĵo kaj polvo suprenpelata de miloj da kuglaĵoj. Francoj kuregas, atakante plej fortikajn lokojn, malgraŭ pafado de baterioj, kiuj frapas la teron per rapidaj batoj.

Dum brula varmo tagmeza, la bataloj okazantaj ĉiuloke fariĝas pli kaj pli furiozaj. Densaj kolonoj ĵetas sin unu kontraŭ la alia kun forto de ruiniga torento.

Multaj francaj regimentoj, en disa ordo, ĉirkaŭas la aŭstrajn amasojn. Sed, simile al feraj muroj, tiuj ĉi konstruaŭstaras kaj unue restadas neŝanceleblaj. Tutaj divizioj demetas siajn ŝultrosakojn sur la teron por kuregi al malamikoj kun bajoneto antaŭen.

Se bataliono estas forpuŝita, ĝin anstataŭas alia; ĉiu monteto, ĉiu altaĵeto, ĉiu roka supro estas kampo por obstinegaj bataloj. Amasiĝas mortigitoj sur altaĵoj kaj en kavaĵoj. Aŭstroj kaj Liganoj paŝas unu sur alia, intermortigas sin super sangotegitaj kadavroj, buĉas per pafilstipoj, rompas kraniojn, malfermas ventrojn per glavoj aŭ bajonetoj. Nenia ĉeso en la miksbatalo, nenia kompatato. Vunditoj mem defendas sin ĝis lasta momento. Fariĝas buĉado, batalaro inter homoj furiozaj, sangebriaj.

Iafoje, la batalado fariĝas pli terura pro alveno de rajdistaro pretergalopanta. La ĉevaloj, pli kompatemaj ol la rajdantoj, vane klopodas por eviti la viktimojn de tiuj buĉoj: ili dispremas sub siaj ferpiedoj mortintojn kaj mortantajn. Kun blekoj de ĉevaloj miksiĝas blasfemoj, kolerkrioj, doloraj aŭ malesperaj ĝemegoj.

Artilerio plenrapide sekvas la kavalerion, kiu traboras vojon tra kadavroj kaj vunditoj konfuzo kuŝantaj sur la tero. La makzelo de unu el tiuj ĉi lastaj estas forŝirata; la kapo de alia dispremata; la brusto de tria platiĝas. La membroj estas rompataj, pistataj; kampoj kovriĝas per homaj pecoj; la tero eltrempigigas sange.

Francaj soldataroj surkuras plej viglofervore krutaĵojn, rokajn deklivaĵojn, spite de pafado, bomboj kaj kuglaro.

Apenaŭ kelkaj unuaklasaj rotoj, lacegaj, svitoplenaj, kaptis monteton, atingis ĝian supron: tuj ili sin ĵetas kvazaŭ lavango sur Aŭstrojn, renversas, forpelas kaj persekutas ilin ĝis fundo de kavaĵoj.


Sed la Aŭstroj reprospiras. Embuskiĝinte malantaŭ domoj, preĝejoj, muroj de Medole, Solferino, Cavriana, ili heroe kontraŭbatalas kaj elproksimigas la venkon.

Bataloj senĉese rekomenciĝas, kaj en ĉiu loko furioze. Nenio haltigas, nenio paŭzigas la buĉadon. Oni reciproke mortigas sin pogrande, podetale. Bajonete kaptiĝas ĉiu krutaĵo, paŝepost-paŝe defendiĝas ĉiu fortifikaĵo. El malamikaj manoj oni forŝiras vilaĝojn, domon post domo, kajuton post kajuto; ĉiu el ili fariĝas sieĝejo; pordoj, fenestroj, kortoj estas buĉejoj.

\*) El „Libraro Pacifisma“ No. 2. Paris, Presa Esperantista Societo 33, Rue Lacépède, 33.



## ŜIPARO. – MARISTARO.



- |                  |                              |                               |
|------------------|------------------------------|-------------------------------|
| 1. militsipo     | 10. kanontubo                | 19. marista oficiro           |
| 2. supra ferdeko | 11. kirasturo                | 20. } maristoj, ŝipsoldatoj   |
| 3. torpedŝipo    | 12. levilo                   | 21. }                         |
| 4. torpedo       | 13. admiralo                 | 22. maristoĉapo               |
| 5. velŝipo       | 14. trikornulo               | 23. bluzo                     |
| 6. masto         | 15. lorno                    | 24. submarboato               |
| 7. velo          | 16. sabro                    | 25. turo de l' komandanto     |
| 8. flageto       | 17. kartoĉoj, municio        | 26. antenoj (por la sendrata) |
| 9. (ŝip)kanono   | 18. celdirektaparato, celilo | 27. marmino [telegrafado]     |

## ŜIPARO. – MARISTARO.


Ni estas sur tiu ĉi bildo sur la <sup>2</sup> de granda <sup>1</sup>. Desur tiu ferdeko oni havas vidon sur la maron. Tie, krom alia granda <sup>1</sup>, troviĝas du aliaj ŝipoj, <sup>3</sup> kaj <sup>5</sup>, ambaŭ rapide veturantaj. La <sup>11</sup> de la <sup>1</sup> kaj la <sup>6</sup> kaj <sup>7</sup> de la <sup>5</sup> povas esti vidataj jam de malproksime. Sur la <sup>2</sup> precipe granda <sup>9</sup> estas rimarkinda; je la antaŭa parto de ĝi estas la <sup>10</sup>. En la <sup>10</sup> oni enmetas la <sup>17</sup>. Ankaŭ en la <sup>11</sup> enestas kvar <sup>9</sup>, sed oni vidas nur ties tubojn.

La <sup>13</sup>, tenante <sup>15</sup> en la dekstra mano kaj surhavante <sup>14</sup>, ĵus donas ordonon al <sup>20</sup>, dum <sup>19</sup> ĉeestas. — La disciplino sur <sup>1</sup> devas esti severa, ĉar ĉiu senordo estas tre danĝera por la tuta ŝipo kaj la ŝipanaro.

La uniformo de la <sup>20</sup> kaj <sup>21</sup> estas pli simpla kaj senĝena ol tiu de la armeaj soldatoj, ĉar la marista ekzercado postulas moveblecon de l' tuta korpo. La maristoj portas blujn pantalonojn, blujn aŭ blankajn <sup>23</sup> kaj <sup>22</sup> kun du rubandoj. — Sur la antaŭa kaj malantaŭa <sup>2</sup> de la <sup>1</sup> granda <sup>12</sup> suprenportas la karbojn el la karboŝipoj. —

La plej nova tipo de la militsipoj estas la <sup>24</sup>. Ĝi ne estas tiel minacata per <sup>27</sup> kiel surmara ŝipo, ĉar ĝi povas subakviĝi kaj eviti la danĝeron, veturante sub la mara surfaco. Kiel ĉiuj <sup>1</sup> ankaŭ la <sup>24</sup> havas <sup>25</sup>, kiu estas ekipita per <sup>26</sup>.

# LA HORLOĜO. – LA ARTIST <PENTRIST> LABOREJO.



- |                       |                               |                    |                                  |
|-----------------------|-------------------------------|--------------------|----------------------------------|
| 1. artisto, pentristo | 11. tolo                      | 20. pinĉnajlo      | 30. gratilo por la paletro       |
| 2. bildo, portreto    | 12. busto de la Venus de Milo | 21. skizolibro     | 31. tasetoj por akvaŝelaj farboj |
| 3. stablo             | 13. pentraĵo                  | 22. papero         | 32. botelo kun terebinto         |
| 4. pentra bastono     | 14. skizo                     | 23. krajono        | 33. (lin) oleo                   |
| 5. paletro            | 15. fenestro                  | 24. gratgumo       | 34. lako                         |
| 6. faldseĝo           | 16. desegnaĵujo               | 25. viŝilo, stompo | 35. cirkelo                      |
| 7. modelo             | 17. peniko                    | 26. ĥina inko      | 36. krajontenilo                 |
| 8. farbkesto          | 18. artika pupo               | 27. lignokarbo     | 37. liniotirilo [ledo            |
| 9. rimeno             | 19. studaĵo                   | 28. farbtubo       | 38. tukpeco, peco da mola        |
| 10. kadro             |                               | 29. peco da farbo  |                                  |

# LA HORLOĜO.

Pardonu, ĉu vi povas diri al mi, kioma horo estas? — Tre volonte, estas 30 minutoj (duonhoro) post la 7a. — Ĉu via horloĝo precize (korekte) funkcias? — Ĝi iomete antaŭiris, sed mi ĵus reguligis (korektis) ĝin laŭ la normala tempo. — Mi dankas al vi; mi alportis mian horloĝon al la horloĝisto, por ke li reguligu ĝin, kaj samtempe kunprenis mian surmuran horloĝon, kiu subite postiris unu horon potage. — Jen vi povas atenti la horloĝon de la preĝejo, ĝi iras tre korekte, kaj vi povas aŭdi ties batojn de tre malproksime. — Mi ne havas multe da tempo; mi ne renkontis sinjoron N. kaj devas reveni post duonhoro. — Jes, jes, tempo estas mono!

## DEMANDOJ.

Je kioma horo la vagonaro forveturis? Kiam hodiaŭ la suno leviĝis? Kiom da horoj oni bezonas ĝis M.? Kiu lando havas la plej grandan eksporton de horloĝoj? (Svisujo.) De kie venas la ŝatataj kukolhorloĝoj? (El la Schwarzwald [nigra arbaro].) De kie venis la unua poŝhorloĝo? (El Nürnberg.)

# LA PENTRISTLABOREJO.

Antaŭ nelonge mi vizitis la laborejon de <sup>1</sup>. Mi iris por preni mian fratinton, kies portreto mi volis vidi. La <sup>1</sup> sidis antaŭ sia <sup>3</sup>; sur ĝi staris la <sup>2</sup>. En la maldekstra mano li tenis la <sup>5</sup>, sur kiu li miksis la farbojn. Malantaŭ li staris ujo por la <sup>17</sup>. Mi havis sufiĉe da tempo por rigardi liajn <sup>13</sup>, kiuj pendis sur la muroj. Kelkaj <sup>14</sup> de svisaj kaj maraj pejzaĝoj estis belegaj. Certe estas ĝoja afero, se oni sukcesas skizante homojn aŭ pejzaĝojn. La <sup>1</sup> en februaro iros al Egiptujo. Li esperas grandan avantaĝon vojaĝinte tien. Oni diras, ke tie la lumaj efektoj estas tre belegaj.

*Kiujn objektojn la pentristo elektas?* — Li pentras batalojn, pejzaĝojn, personojn, bestojn, aĵajn specojn.

*Kion la pentristo faras, elektinte pejzaĝon kiel artistan objekton?* — Li skizas. Kiam la koloro estas tro malhela — li alprenas blankan farbon kaj miksas sur la <sup>5</sup>. Kiam la pentraĵo havas tro multe da lumo aŭ ombro — li almetas lumojn. Kiam la pentrado finiĝis — li surmetas sur la sekan pentraĵon <sup>34</sup>, tiam ĝi fariĝas brila. Kiam la farboj estas tro grasaj — li almetas terebinton.

*Kion la lernanto lernas dum la komenca instruado?* — Li lernas desegni rondajn aĵojn, ekz. pomojn, pirojn, ovojn, parte je la naturo, parte je la memoro. Poste rektliniajn aĵojn, ekz. kajerojn, kovertojn, naztukojn ktp. kaj fine la miksitliniajn aĵojn: foliojn, horloĝojn, vazojn ktp. La pli malfacilaj ekzercadoj sekvas: la desegnoj planimetraj kaj perspektivaj.

*Kion oni bezonas por la liniodesegno?* — Necesa estas <sup>22, 23</sup>, liniilo, triangulo, angulmezurilo, <sup>24, 35, 37, 36</sup>. Tiu speco de desegno postulas akuratecon.

## DEMANDOJ.

Kion bezonas la pentristo a) por la desegno? (<sup>22, 23, 25, 27</sup>); b) por la pentro? (<sup>3-5, 8, 11, 28-34</sup>); kiuj specoj de pentrado ekzistas? (Freskopentrado, ligna kaj vitra pentrado, guaŝa pentrado, akvarela kaj olea pentrado.) Kiuj specoj de desegnado? (Krajona, pluma, karba, kreta desegnado.) Kiuj specoj de pentraĵoj ekzistas en la grandaj artekspozicioj? (Portretoj, pejzaĝoj, kupraj kaj ŝtalaj gravuraĵoj ktp.)

# LA LERNEJĈAMBRO.



- |                          |                                |                   |                            |
|--------------------------|--------------------------------|-------------------|----------------------------|
| 1. instruisto, profesoro | 12. librobreto                 | 22. laĉo, ŝnureto | 33. fadenbulo              |
| 2. nigra tabulo          | 13. landkarto, geografia karto | 23. kajero        | 34. kesto por la kudrilaro |
| 3. ciferoj               | 14. triangulo                  | 24. krajono       | 35. tornistro              |
| 4. spongo                | 15. liniilo                    | 25. poŝtranĉilo   | 36. tondilo                |
| 5. pupitro               | 16. plumo                      | 26. klingo        | 37. fingroŝirmilo          |
| 6. lernanto (knabo)      | 17. plumingujo                 | 27. gratgumo      | 38. bobeno                 |
| 7. lernantino (knabino)  | 18. inkujo                     | 28. plumingujo    | 39. fadeno                 |
| 8. benko                 | 19. libro                      | 29. kudrilujo     | 40. kroĉilo                |
| 9. skribotablo           | 20. (ardeza) skribtabuleto     | 30. aleno         | 41. paketo da kudriloj     |
| 10. tabelo de lecionoj   | 21. grifelo                    | 31. ŝtrumpo       | 42. koverto kun kudriloj   |
| 11. libroŝranko          |                                | 32. trikilo       | 43. bildo por la instruado |

## LA KLASO, LA LERNEJĈAMBRO.

*Kiu iras en la lernejon?* — La <sup>6</sup> kaj <sup>7</sup> iras en la lernejon. Ili portas siajn <sup>35</sup> en la mano aŭ sur la dorso.

*Kion la lernantoj havas en siaj tornistroj?* — Ili portas en ĝi siajn <sup>19</sup> kaj <sup>28</sup>.

*Kion la lernantoj havas en siaj plumingujoj?* — Ili havas en siaj <sup>28</sup> kelkajn <sup>17</sup>, <sup>24</sup>, la <sup>25</sup>, la <sup>15</sup> kaj la <sup>27</sup>.

*Kiu instruas la lernantojn en la lernejo?* — La <sup>1</sup> instruas la <sup>6</sup> en diversaj fakoj; ili lernas legi, skribi, kalkuli. La pli maljunaj <sup>6</sup> estas instruataj pri historio, geografio, naturscienco kaj fremdaj lingvoj. Ĉie hodiaŭ la angla, franca, germana lingvoj estas instruataj.

*Kion oni vidas en la lerneĉambro?* — Oni vidas du <sup>8</sup> kaj du <sup>9</sup>. Apud la muro staras la <sup>11</sup>; ĝi enhavas multe da libroj. La <sup>1</sup> staras antaŭ la <sup>2</sup> kaj skribas <sup>3</sup>. Apud la <sup>2</sup> pendas la <sup>10</sup>.

*Kio okazas dum la leciono?* — La <sup>1</sup> demandas pri tio, kion li priparolis en la antaŭa leciono. Laŭ la respondoj li skribas bonajn aŭ malbonajn notojn en la notlibron. La maldiligentaj devas resti en la ĉambro post la leciono. La <sup>1</sup> klarigas kaj priparolas la novajn taskojn, la <sup>6</sup> aŭskultas atente kaj ripetas la taskojn hejme.

*Kion oni bezonas dum la desegno-leciono?* — Oni bezonas blokon da desegna papero, lignokarbon, kreton, <sup>27</sup> por grati la neĝustajn liniojn, la <sup>24</sup> kaj la <sup>25</sup> por pintigi la <sup>24</sup>.

*Kion oni bezonas dum la leciono pri manlaboraĵoj?* — Kudrilon el la <sup>42</sup>, la <sup>37</sup>, la <sup>39</sup> por kudri; la <sup>40</sup> por triki per kroĉiloj; kelkajn <sup>32</sup> kaj la <sup>33</sup> por triki; ĉiuj bezonaĵoj kuŝas bone ordigitaj en la <sup>34</sup>.

*Al kio servas la landkarto?* — La <sup>1</sup> pendigas la <sup>13</sup> sur la <sup>2</sup>, por ke ĉiuj povas rigardi ĝin; li montras la landojn, montarojn, urbojn, riverojn kaj demandas pri iliaj nomoj.

*Kiom da infanoj estas sur nia bildo?* — Mi vidas unu knabon kaj unu knabinon. La knabo sidas antaŭ la skribtableto, sur kiu kuŝas lia <sup>23</sup>, kaj li skribas. La knabino venis en la lernejon tro malfrue; ŝi estas ĉagrenita, ĉar ŝi hontas. La <sup>1</sup> mallaŭdos ŝin.

*Kiam la tabelo de lecionoj estas renovigata?* — Je la fino de la lerneja jaro, eble ankaŭ je la fino de la duonjaro (semestroj).

### KION ONI DEVAS FARI KAJ DIRI?

Kion diras la lernanto, kiam li malfruis venante en la lernejon? (Pardonu, sinjoro <sup>1</sup>, ke mi malfruas. Nia horloĝo ne iris korekte.) Kion diras la instruisto, kiam la lernanto parolas tro mallaŭte? (Parolu pli laŭte!) Kiam la lernanto ne estas atenta? (Sidu trankvile!) Kiam la kajero estas malpura? (Estu pli zorgema pri via kajero!) Kion vi faras, kiam estas necese por vi skribi? (Mi prenas la <sup>17</sup>, mi enmetas la <sup>16</sup> en la <sup>18</sup> kaj skribas en la malfermitan <sup>23</sup>.) Kion diras la instruisto, volante scii, kion la lernantoj lernis? (Kion vi preparis por la hodiaŭa leciono?) Kiam li volas, ke la lernanto daŭrigu la skribadon aŭ legadon? (Daŭrigu!) Kiam li trovas la lernantojn malbone preparitajn? (Vi ne preparis viajn taskojn sufiĉe; estas necese, ke vi laboru pli diligente!) Kion diras la lernanto, kiam li estis malhelpita, partopreni la lecionon? (Pardonu, mi ne ĉeestis.) Kiam li ne lernis diligente? (Pardonu, hieraŭ mi ne havis tempon por sufiĉa preparado.) Kiam li volas foriri pli frue? (Mia patro petas vin, ke vi donu al mi la permeson iri hejmen dek minutojn antaŭ la fermo de la leciono.)

### DEMANDOJ.

Per kio la instruisto purigas la nigran tabulon? (Spongo, tukpeco.) Kie staras la inkujoj? Ĉu vi skribas per nigra aŭ ruĝa inko? Kiun lecionon vi satas plejmulte? Kion la instruisto skribas sur la nigran tabulon? El kiu materialo la skribotabulo estas farita? (Ardezo.) Kien vi metis vian fingrosirmilon? Ĉu via ŝtrumpo baldaŭ estos preta? Kiom da trikiloj oni bezonas por triki? Per kio oni detranĉas ŝtofojn kaj fadenojn? (Tondilo.)

# LA DOMO.



- I. kelo
- II. teretaĝo
- III. interetaĝo
- IV. unua etaĝo
- V. dua etaĝo
- 1. kamentubo
- 2. ardeza tegmento
- 3. tegmento (tegola tegmento) [etaĝo]
- 4. mansardo (subtegmenta)
- 5. tegmenta defluilo
- 6. pluva defluilo
- 7. fenestro

- 8. fenestra vitro
- 9. ĵaluzio
- 10. fenestra kovrilo
- 11. muro
- 12. kvadrata ŝtono
- 13. briko
- 14. pordo
- 15. ŝildo
- 16. ŝtupo
- 17. tintilo
- 18. pordego
- 19. pumpilo
- 20. korto

- 21. angulŝtono
- 22. subtegmento
- 23. trabo
- 24. gaslampo
- 25. mastro, domposedanto
- 26. luanto
- 27. balustrado
- 28. ŝtuparinterspaco
- 29. ŝtuparo
- 30. ŝtupo
- 31. seruro
- 32. anso, prenilo
- 33. ŝlosilo

# LA DOMO.

## PAROLADO INTER LUANTO KAJ MASTRO.

- Luanto: Ĉu vi povas luigi loĝejon?
- Mastro: Jes, sinjoro; kiom da ĉambroj vi deziras?
- Luanto: Mi volas lui kvin ĉambrojn kun kuirejo kaj I. Ĉu malantaŭ la domo estas ĝardeno?
- Mastro: Ne, mi bedaŭras, nur <sup>20</sup> ekzistas. Sed tiu ĉi estas sufiĉe granda, por ke viaj infanoj tie povas ludi.
- Luanto: Montru al mi la loĝejon!
- Mastro: Eniru, mi petas! Tie ĉi en la II estas loĝejo konsistanta el tri ĉambroj, loĝa ĉambro, manĝĉambro, salono. La dormĉambroj estas en la IV.
- Luanto: La ĉambroj plaĉas al mi, nur la tapetoj estas iomete difektitaj. Ĉu ili povas esti renovigataj?
- Mastro: Tre volonte. Mi renovigos la ĉambrojn laŭ via gusto. Bonvolu supreniri al la IV!
- Luanto (suprenirante la <sup>30</sup>): La <sup>29</sup> estas tre mallargha. Ĉu la <sup>27</sup> estas firma?
- Mastro: Certe, sinjoro. Ne zorgu pri tio. — Tie ĉi estas la dormĉambroj, ili kuŝas suden.
- Luanto: Tio estas agrabla. Kaj kiel la kuirejo estas instalita? Ĉu oni havas tie ĉi gason, elektran lumon, provizejon de varma akvo?
- Mastro: Jes, ĉio ekzistas; la fajrujo estas instalita por karba kaj gasa hejtado.
- Luanto: Kie estas la banĉambro?
- Mastro: Ĝi estas apud la dormĉambro; la banforno hejtas bonege.
- Luanto: Ĉu oni havos sufiĉe da apudaj ĉambroj?
- Mastro: Bonvolu rigardi! la manĝaĵejo estas tre spaca kaj aera. La I estis ĉiam laŭdata de miaj luintoj pro sia sekeco. Krom tio kompreneble vi havos karbo-kaj lignokelon kaj vi povas uzi la lavejon kaj la <sup>22</sup> kun la loĝantaro de mia domo.
- Luanto: Ĉu ejo ekzistas, eble tegmentĉambro, kien mi povas formeti la kofrojn ktp.?
- Mastro: Jes, sinjoro; super la banĉambro; tiu ĉi estas dividita laŭlarĝe.
- Luanto: La loĝejo plaĉas al mi; kiom ĝi kostas?
- Mastro: 900 frankojn po jaro.
- Luanto: Ĉu ĝi ne estas tro multekosta? Ĉu mi ne povas lui je pli malalta prezo? Tiam mi farus trijaran kontrakton.
- Mastro: Mi bedaŭras; sed mi ne povas pli malaltigi la prezon. Mi donos al vi ankoraŭ <sup>4</sup> sur la <sup>22</sup>.
- Luanto: Mi konsentas; paske mi enloĝiĝos. La lna kontrakto povas esti subskribata dum tiu ĉi semajno. Ĉu oni devas anonci malluon duonjare?
- Mastro: Certe, la kutimo estas tia en nia urbo. Cetere mi renovigos la <sup>9</sup> kaj <sup>29</sup>, por ke la aspekto de la loĝejo estu pli bela.

## DEMANDOJ.

Per kiu ilo oni fermas la pordon? Kiu faras slosilojn kaj serurojn? (Seruristo.) Per kio la tegmento estas kovrita? (Tegoloj, ardezaĵ tabuloj.) Kiel oni nomas kanaleton ĉirkaŭirantan la tegmenton? (Tegmenta defluilo.) Al kio la fenestraj kovriloj servas? (Ŝirmado kontraŭ stelistoj.) Al kio la ĵaluzioj? (Suno.) Kiel oni nomas la diversajn etaĝojn de domo? El kiaj ŝtonoj oni konstruas la murojn? (Brikoj, sabloŝtonoj.) Kion vi vidas en la korto? Per kio la forna fumo forflugas? En kiu strato via domo staras? Kiom da fenestroj la antaŭa parto de via domo havas? Kiamaniere oni povas hejti kune ĉiujn ĉambrojn de P domo? (Alcentrigita, centraliza hejtado.) Kie staras la granda forno por tiu ĉi celo? (Kelo.) Ĉu ankaŭ domoj ekzistas, en kiuj ĉiu etaĝo povas esti hejtata per centraliza hejtado? (En la grandaj urboj.) Al kio servas la subtegmento? (Al la sekigo de la tolaĵo.) Kiu zorgas pri ordo kaj pureco en la ŝtupara parto de la domo kaj en la korto? (La domadministranto.)

# LA FAMILIA ĈAMBRO.



- |                                    |                     |                 |                     |
|------------------------------------|---------------------|-----------------|---------------------|
| 1. planko                          | 12. antaŭtableto    | 24. lampo       | 36. muziklibro      |
| 2. muro                            | 13. florpoto        | 25. tapiŝo      | 37. infano, knabino |
| 3. kornicoj                        | 14. patrino         | 26. piedbenketo | 38. pianoseĝo       |
| 4. plafono                         | 15. kudrista tablo  | 27. apogseĝo    | 39. pordo           |
| 5. lustro                          | 16. libroŝranko     | 28. skribotablo | 40. porda kadro     |
| 6. stango por la (flank-) kurtenoj | 17. bildo, pentraĵo | 29. kandelingo  | 41. forno           |
| 7. (flank-) kurtenoj               | 18. kadro           | 30. potfloro    | 42. karbositelo     |
| 8. fenestro                        | 19. kanapo          | 31. patro       | 43. karboj          |
| 9. fenestra vitro                  | 20. dorsa kuseno    | 32. fotografajo | 44. karbŝovelilo    |
| 10. spegulo                        | 21. radŝpinilo      | 33. busto       | 45. ekrano.         |
| 11. horloĝo                        | 22. tablo           | 34. kandelabro  |                     |
|                                    | 23. tabla tapiŝo    | 35. piano       |                     |



# LA FAMILIA ĈAMBRO.

*Kiun ĉambron vi vidas sur tiu ĉi bildo? Mi vidas familian ĉambron.*

*Kiu estas en la familia ĉambro? La <sup>31</sup>, la <sup>14</sup> kaj la <sup>37</sup> estas en ĝi. La <sup>31</sup> sidas antaŭ sia <sup>28</sup>. La <sup>14</sup> brodas, ŝi sidas proksime de la <sup>8</sup>, por ke ŝi vidu pli bone. La <sup>37</sup> ludas pianon; ŝi studas novan komponaĵon, sed ŝi tre ofte ludas malĝuste; pro tio ŝi ofte ripetas, por progresadi je bona ludado.*

*Nomu al mi la diversajn partojn de la ĉambro? Tio estas la kvar <sup>2</sup>, la <sup>4</sup> kaj la <sup>1</sup>.*

*Kiuj objektoj ornamas la pariojn? Super la <sup>19</sup> pendas <sup>17</sup> kun ora <sup>18</sup>. Inter la <sup>8</sup> troviĝas la <sup>10</sup>, kiu bazas sur la <sup>12</sup>. Antaŭ la fenestroj pendas <sup>7</sup>, kiuj estas fiksitaj al la <sup>6</sup>. Maldekstre estas <sup>33</sup>, sub ĝi <sup>32</sup>.*

*Kiamaniere vi pasigas viajn vesperojn? La <sup>24</sup> sur la tablo estas eklumigata. Kiam la <sup>31</sup> estas fininta la legadon de la gazetoj, li antaŭlegas aŭ kantas kanton. La patrino kudras kaj flikas, ŝia malgranda filino helpas sin. Kiam ni havas gastojn, la <sup>5</sup> estas eklumigata.*

*Pro kio oni bezonas fornon? La <sup>41</sup> varmigas nian ĉambron. Matene la servistino venas portanta la <sup>44</sup> kaj la <sup>42</sup>, plenigitan de karboj. Ŝi enmetas lignopecojn kaj <sup>43</sup> en la <sup>41</sup> kaj ekbruligas la fajron.*

*Kiam la patro uzas la kandelingon sur sia skribotablo? Li ekbruligas la kandelon, kiam li volas sigeli leteron.*

*Kio staras sur la antaŭtableto? — Tie <sup>11</sup> staras; ĝi estas tre multvalora, ĉar ni heredis ĝin de nia praavo.*

*Kiu uzas la radŝpinilon? — Neniu, escepte la avinon, kiu nur okaze ŝpinas, por montri la uzmanieron de la ŝpinilo al la infanoj, kiuj vizitas nin.*

*Al kio servas la libroŝranko? La patro tie konservas siajn librojn, kiuj ĉiam estas ordigitaj tre precize. Oni enmetas la librojn en ŝrankon, por ke ili ne estu malpurigataj.*


*Kion la mastrino faras, kiam la servistino frapas? — Ŝi vokas: „Eniru!“*

*Kiam la servistino anoncas vizitantojn? — Tiam ŝi rapide formetas la brodaĵon, la mastro ĉesas skribi la leteron, kaj la filino ĉesas ludi pianon. La mastro diras: „Ni petas, ke la vizitantoj eniru!“ Kiam parencoj, ekz. onklo, onklino aŭ la geavoj venas, ili jam en la vestiblo estas salutataj.*

## DEMANDOJ.

Kies fotogrataĵo pendas sur la pario? Kiuj tabloj estas en la ĉambro? Kien oni povas sidiĝi en la ĉambro? Kie staras la potfloroj? Kie staras la radŝpinilo? Kio kuŝas sur la kanapo? Kie staras piedbenketo? Kiom da piedoj havas la tablo antaŭ la kanapo, la seĝo antaŭ la piano? Kiu objekto ŝirmas nin kontraŭ la varmego de l' forno? Kio estas super la piano? Pri kio la patro estas okupata? Kion la patrino faras? Kio kuŝas kaj kio staras sur la diversaj tabloj?

# LA MANĜOĈAMBRO.



1. tablotuko
2. supujo
3. kovrilo
4. supkulero
5. vinagrujo kaj oleujo
6. salujeto
7. buŝturingo
8. glaso, vinglaso
9. vinbotelo
10. korkŝtopilo, korko
11. kulero
12. telero
13. buŝtuko
14. forko
15. tranĉilo

16. nuksrompilo
17. korktirilo
18. submetilo
19. pankorbo
20. tintilo
21. bufedo
22. saŭcujo
23. rostajo
24. breto, pleto
25. sukerujo
26. kremujo
27. taso
28. kulereto
29. vinmalvarmigilo
30. pokaletto

31. bolvazo por kafe
32. teovazo
33. samovaro
34. mastro
35. mastrino
36. fenestra kadro
37. fenestra breto
38. ligna kovraĵo, panelaro
39. pendigita lampo
40. lampkloŝo
41. cilindro

# LA MANĜOĈAMBRO.

*Kiu estas en tiu ĉi ĉambro?* — La <sup>34</sup> kaj <sup>35</sup> sidas en la manĝoĉambro kaj tagmanĝas. *Je kio oni vidas, ke ili tagmanĝas?* — La <sup>2</sup> estas sur la tablo, kaj la posta manĝaĵo, la <sup>23</sup>, jam estas metita sur la <sup>21</sup>.

*Kiom da manĝaĵoj oni havas kutime je la tagmanĝo?* — En neriĉaj familioj nur nnn; tie, kie la porvivaj kondiĉoj estas pli bonaj, du aŭ tri manĝaĵojn: supon, <sup>23</sup> kun legomoj kaj terpomoj kaj poste deserton, ekz. pudingo, fruktoj, fromaĝo ktp.

*Kiu hodiaŭ aranĝis la manĝotablon?* — La <sup>35</sup>; la servistino ne havis la tempon; ŝi pendigis la tolaĵon, sed ŝi forprenos la manĝilaron.

*Kion vi vidas sur la tablo?* — Sur la tablo mi vidas diversajn <sup>12</sup> por la supo kaj <sup>11</sup>. Apud la <sup>12</sup>, grandaj <sup>14</sup> kaj <sup>15</sup> kuŝas por tranĉi la rostaĵon. Sur la <sup>18</sup> la <sup>2</sup> staras; <sup>3</sup> kovras la supujon. En ĝi la granda <sup>4</sup> estas videbla, per kiu la <sup>35</sup> enmetas la supon en la telerojn.

*Kion la mastro trinkas dum la tagmanĝo?* — En la <sup>9</sup> ruĝa vino eĝestas. Li malfermas ĝin per la <sup>17</sup>. Lia edzino ne trinkas vinon, ĉar la kuracisto malpermesis tion al ŝi.

*Kion la mastro trinkas post la tagmanĝo?* — Lia edzino alportas al li kafon, kiun ŝi mem preparis.

*Nomu al mi ankoraŭ aliajn objektojn, kiuj estas sur la tablo?* — Tie mi vidas <sup>6</sup>, <sup>5</sup> kun oleo, vinagro, pipro kaj mustardo. Maldekstre de la <sup>6</sup>, la <sup>16</sup> kaj <sup>17</sup> kuŝas; apud ili la <sup>19</sup> staras.

*Kiuj aliaj manĝoj estas manĝataj ankaŭ en la manĝoĉambro?* — La unua kaj dua matenmanĝo kaj la vespermanĝo.

*Kion vi vidas sur la bufedo?* — <sup>24</sup> kun <sup>26</sup>, <sup>25</sup> kaj <sup>27</sup>. La <sup>31</sup> staras sur la malgranda tablo dekstre de la <sup>21</sup>.

*Kiel oni preparas kafon kaj teon?* — Oni ŝutas kafon aŭ teon en la <sup>31</sup> aŭ en la <sup>32</sup> kaj poste oni alverŝas bolantan akvon.

*Kiam la mastrino bezonas la tablan tintilon?* — Manĝinte la supon la <sup>35</sup> tintas per la <sup>20</sup>. La servistino venas kaj alportas la <sup>23</sup>. Ŝi forprenas la <sup>12</sup> kaj surmetas aliajn, pli platajn, por la viandaĵo.

*Kiu distranĉas la rostaĵon en via familio?* — La <sup>34</sup> faras tion, distranĉante la viandon per granda tranĉilo kaj metante la pecojn sur pladon, kiun la servistino prezentas al la ĉeestantoj.

*Kiaj teleroj servas por la deserto?* — Kutime oni uzas pli malgrandajn telerojn; tre ofte, ekz. por la kompoto, vitrajn telerojn, bele facetitajn.

## KION ONI DEVAS FARI KAJ DIRI.

Se la manĝaĵo estas nesufiĉe spicita, oni diras: „Donu al mi, mi petas, la salon.“ Se sukero mankas al la dolĉaj, aŭ vinagro al la acidaj manĝaĵoj, oni diras: „Bonvolu doni al mi la sukeron aŭ vinagron.“

Se oni faligis tranĉilon aŭ forkon, oni diras: „Mi petas alian manĝilaron.“ Se oni renversis glason da vino, limonado, biero ktp. oni diras: „Mi petas alian glason.“

## DEMANDOJ.

Kiam vi matenmanĝas? Kiam vi tagmanĝas? Kiam vi trinkas kafon? Kiam vi vespermanĝas? Kiu distranĉas la rostaĵon? El kio la patrino prenas la supon? Kien ŝi enmetas ĝin? Kiu manĝas je la infantablo? Kiuj estas la partoj de lampo? El kio la buŝtutringo estas farita? Kian lignon oni bezonas por fabrikii la meblojn de la manĝoĉambro? El kiu metalo oni faras la manĝilarojn? Kio staras apud la bufedo? Ĉu vi preferas trinki teon kaj kafon fortajn aŭ malfortajn? Kion vi enmetas en la teon aŭ kafon, se ili estas tro fortaj? Ĉu vi preferas la kafon kun aŭ sen lakto? Kion vi havas por manĝi? Ĉu vi deziras iom da salo? Ĉu vi povas nomi al mi diversajn specojn de supoj, fiŝoj, rostaĵoj, ĉasaĵoj, legomoj, dolĉaj manĝaĵoj?

# LA DORMĈAMBRO.



- |                  |                              |                                |                          |
|------------------|------------------------------|--------------------------------|--------------------------|
| 1. lito          | 12. sapujo                   | 23. littableto                 | 33. kandelo              |
| 2. litotuko      | 13. spongo                   | 24. akvokarafo                 | 34. meĉo                 |
| 3. stebkovraĵo   | 14. mantuko                  | 25. akvoglaso                  | 35. estingileto          |
| 4. pluma lito    | 15. tenilo por la tualettuko | 26. tualettablo                | 36. skatolo por alumetoj |
| 5. kapkuseno     | 16. kombilo                  | 27. spegulo                    | 37. lulilo               |
| 6. matraco       | 17. broso                    | 28. fenestra kurteneto         | 38. lularko              |
| 7. litkovraĵo    | 18. spegulo                  | 29. komodo                     | 39. lulilkurteneto       |
| 8. litotapiŝeto  | 19. dentobroso               | 30. tirkesto                   | 40. laktobotelo          |
| 9. tualeta tablo | 20. ŝubtonumilo              | 31. kandelingo                 | 41. bottirilo            |
| 10. lavopelvo    | 21. ŝusurmetilo              | 32. enmetilo por la<br>kandelo |                          |
| 11. akvokruĉo    | 22. ŝranko                   |                                |                          |

## LA DORMĈAMBRO.

*Kiom da litoj estas en la dormĉambro?* Mi vidas du <sup>1</sup> kaj unu <sup>37</sup>, en kiu infaneto dormas kun la <sup>40</sup> ĉe la buŝo. La unu de la du <sup>39</sup> estas iomete tirita flanken.

*Kiam vi vin levas?* Mi estas vekata somere je la 7a, vintre je la 8a.

*Kion vi faras, levante vin matene?* Mi iras al la <sup>9</sup>, mi enmetas malvarman akvon el la <sup>11</sup> en la <sup>10</sup>. Poste mi prenas mian <sup>13</sup> kaj lavas min per akvo kaj sapo. Sekiginte min per la <sup>14</sup>, mi purigas la dentojn per la <sup>19</sup> kaj purigas la ungojn per la ungo broso. Post la lavado mi frizas min per la <sup>17</sup> kaj <sup>16</sup>. Poste mi surmetas mian ĉemizon, miajn ŝtrumpojn, mian pantalonon, fine la jakon kaj ŝuojn. Kiam mi estas preta, mi enmetas la poŝhorloĝon. Antaŭ la eliro mi surmetas surtuton kaj gantojn. Okaze de pluva vetero, mi prenas la ombrelon.

*Kiel la lito estas farata?* — La servistino faras la <sup>1</sup>, elprenante la kusenajn, por ke ili estu aerumataj. Poste ŝi turnas la <sup>6</sup> kaj enmetas la <sup>2</sup>. <sup>5</sup> kaj <sup>3</sup> bone skuitaj, estas metataj en la <sup>1</sup> kaj kovrataj per la <sup>7</sup>.

*Kion vi vidas sur la komodo?* — Tie staras <sup>31</sup> kun kandelo, apude <sup>36</sup> kuŝas, per kiuj oni eklumigas la kandelon. La <sup>35</sup> servas por estingi la kandelon.

*Kie vi konservas viajn vestojn?* — Ili estas en la <sup>22</sup>. Mian tolaĵon mi havas en la <sup>30</sup> de la <sup>29</sup>.

*Nomu al mi aliajn meblojn de la ĉambro!* — Apud la lito mi vidas la <sup>23</sup> kun la <sup>24</sup> kaj la <sup>25</sup>. Inter la fenestro kaj la <sup>22</sup> la <sup>26</sup> staras, sur kiu estas la <sup>27</sup>. Kombante min mi staras antaŭ la <sup>27</sup>, ĉar mi volas vidi, ĉu mia hararo estas bone ordigata.

*Kiam vi uzas la fenestran kurtineton?* — Vesperè antaŭ la enlitiĝo, mi malsuprenigas la <sup>28</sup>, matene, post la leviĝo, mi suprenigas ĝin.

*Kial oni bezonas ŝubutonumilon?* — Ĉar oni ne povas butonumi per la fingroj, oni bezonas la <sup>20</sup>.

*Kie estas la mantuko?* — Ĝi pendas je la <sup>15</sup>, por ke ĝi sekiĝu. En kelke da dormĉambroj oni havas starantajn tenilojn, super kiujn oni metas la <sup>14</sup>.

## DIALOGO.

*Vespere:* Je kiu horo vi deziras esti vekata? Veku min je la 6a kaj frapu la pordon, ĝis kiam mi respondas. — Via mosto, ĉu vi tintis? — Jes, la akvokruĉo staras antaŭ la pordo, ĝi estas malplena, alportu al mi freŝan akvon kaj kunportu samtempe ion por forviŝi la akvon, kiun mi disversis. — Bonan nokton, sinjorino, dormu bone. Mi vekos vin je la 6a kaj alportos vian matenmanĝon en la ĉambron.

*Matene:* Ĉu vi dormis bone, sinjorino? — Ne, ĉar mia kapo kulis tro alte; elprenu, mi petas, la angulan kusenon, kaj alportu novan littolaĵon, tiu ĉi ne estas pura. Krom tio mi deziras pli grandan pluman liton. Malfermu, mi petas, la fenestron. Ĉu vi brosis mian jupon? Ĉu la ŝuoj estas purigitaj? Alportu iom da varmeta akvo por brosi la dentojn. Kia hodiaŭ la vetero estas? Ĉu la temperaturo estas agrabla? Ĉu pluvas?

## DEMANDOJ.

Kiam vi enlitiĝas? Ĉu iu vekas vin matene, aŭ ĉu vi vekigos sen helpo? Ĉu en la vintro via dormĉambro estas hejtata? (Ni dormas en nehejtita ĉambro.) Ĉu vi dormas ĉe malfermitaj fenestroj? Kiam vi bezonas manspegulon? (Dum la kombado.) Kion vi bezonas por surmeti la ŝuojn, kion por demeti ilin? Al kio la estingileto servas? (Por estingi la lumigitan kandelon.) Kiom da tirkestoj en via komodo estas? Ĉu vi vidas tirkestojn ankaŭ en aliaj mebloj de la ĉambro? El kiu ŝtofo la antaŭlita tapiŝeto estas fabrikita? (El pluŝo, felo, lano.)

# LA KUIREJO.



- |                             |                        |                          |                                     |
|-----------------------------|------------------------|--------------------------|-------------------------------------|
| 1. fajrujo                  | 13. telertuko          | 25. ovingo, ovotenido    | 37. profunda telero, sup-<br>telero |
| 2. rostejo                  | 14. kuireja tranĉilo   | 26. ovo                  | 38. kruĉo                           |
| 3. hakilo                   | 15. balaaĵsovalo       | 27. ŝaŭmkulero           | 39. korbo                           |
| 4. (fajro-) prenilo         | 16. balailo            | 28. funelo               | 40. tenilo                          |
| 5. kaserolo                 | 17. gaslampo           | 29. haktranĉilo          | 41. raspilo                         |
| 6. tebolilo                 | 18. akvotrulo, ĉerpilo | 30. pastrulilo           | 42. pudingformilo                   |
| 7. gladilo                  | 19. vištuko            | 31. hakbreto             | 43. kuirejŝranko                    |
| 8. bolpoto                  | 20. akvotubo           | 32. pistujo              | 44. hakbloko                        |
| 9. kovrilo                  | 21. akvokrano          | 33. pistilo              | 45. korbo por tolaĵo                |
| 10. kuiristino              | 22. kuireja lavotablo  | 34. plado                | 46. gladbreto                       |
| 11. kribrilo [fritilo]      | 23. cindrositelo       | 35. telerstablo [telero] |                                     |
| 12. rostpato, rostkaserolo, | 24. akvotineto         | 36. malprofunda (plata)  |                                     |

## LA KUIREJO.

---

*Kiu estas en la kuirejo?* — La <sup>10</sup> staras antaŭ la <sup>1</sup> kaj preparas la supon en la <sup>8</sup>.

*De kie la kuiristino prenas la akvon?* — Super la <sup>22</sup> vi vidas la <sup>20</sup>. La kuiristino tie malfermas la <sup>21</sup> kaj fluigas la akvon en la <sup>6</sup>, kiu staras sur la <sup>1</sup>.

*Kion la kuiristino pretigis por la matenmanĝo?* — Ŝi boligis <sup>26</sup>, kiun ŝi en la <sup>25</sup> metis sur la <sup>43</sup>. Ŝi alportos ĝin en la ĉambron.

*Kion ŝi kuiras por la tagmanĝo?* — Ŝi enŝovos la rostpaton en la <sup>2</sup> kaj rostos leporon. Dum ŝi preparas la manĝaĵon, ŝi uzas la okazon de forta fajro, por varmegigi la <sup>7</sup>.

*Al kio servas la gladilo?* — Ĝi servas por gladi la tolaĵon, kiu estas en la <sup>45</sup> apud la <sup>46</sup>.

*Kion la kuiristino faras post la tagmanĝo?* — Ŝi lavas la vazaron kaj sekigas ĝin per la <sup>13</sup>. Ĝi pendas super la <sup>1</sup>. Poste ŝi revenas en la kuirejon kun la <sup>16</sup>, metas sur la <sup>15</sup> la balaaĵon kaj formetas ĝin en la <sup>23</sup>.

*Kiuj kuirejaj iloj pendas sur la muro super la kuirejtablo?* — Proksime de la fenestro <sup>27</sup> estas pendigita; oni uzas ĝin, por preni la ŝaŭmon de la supo. Apud ĝi estas <sup>28</sup>, super tiu la <sup>29</sup>. Oni bezonas la <sup>30</sup> por prepari la paston, el kiu oni faras vermicelojn. La <sup>32</sup> kun la <sup>33</sup> servas al la pistado de spicaĵoj.

*Kiam la kuiristino bezonas korbbon?* — Ŝi prenas la <sup>39</sup>, irante en la urbon, por aĉeti legomojn ktp.

*El kia materio la pudingformilo estas farita?* — La <sup>42</sup> estas farita el lado. Ekzistas diversaj specoj da pudingo, ekz. riza, gria pudingo. Oni diras, ke precipe la Angloj tre ŝatas pudingojn.

*Kiel oni varmegigas la gladilon?* — Oni varmegigas la gladilojn nuntempe tre ofte elektre. Pli frue oni faris tion enmetante varmegigitajn ferpecojn en la gladilon.

---

## KION LA MASTRINO DIRAS AL LA KUIRISTINO.

Mastrino : La fajro ne brulas bone. Anna, enmetu pluajn karbojn kaj iru en la kelon por preni aliajn karbojn!

Servistino: Tuj, sinjorino! — Ĉu vi ordonas aĉeti farunon? Ni havas ankoraŭ nur kelkajn gramojn.

Mastrino : Do aĉetu kelkajn funtojn posttagmeze kaj kunportu diversajn legomojn!

Servistino: Nun mi devas prepari la rostaĵon.

Mastrino : Mi sentas malagrablan odoron. Forprenu rapide la lakton desur la fajrujo! Ĝi superbolas.

---

## DEMANDOJ.

Kiel vi heligas la kuirejon? Kiel vi rostas la viandon? Al kio oni bezonas hakilon? Kiaj korboj estas en la kuirejo? Kiuj kuirejaj iloj estas faritaj el ligno? Kiuj el fero? Kiuj el porcelano? Kiom da salajro oni pagas al la kuiristino monate? Ĉu viaj fratinoj partoprenas la kuirlaborojn? Kial estas necese, ke la mastrino mem zorgu pri la laboroj en la kuirejo?

# LA HOMA KORPO.



## I. La korpo.

- 1 vizaĝo
- 2 kolo
- 3 gorĝo
- 4 klaviklo
- 5 ŝultro
- 6 ŝultro kavoj
- 7 brako
- 8 kubuto
- 9 brusto
- 10 flanko
- 11 ventro
- 12 kokso
- 13 gambo \*)
- 14 femuro
- 15 genuo
- 16 patelo

17. genukavo
18. kruro kun tibikarno

## II. La kapo.

19. haroj
20. frunto
21. tempio
22. brovo
23. palpebro
24. okulharoj
25. okulo
26. nazo
27. lipharoj
28. mentono
29. barbo
30. orelo
31. vango

## III. La mano.

32. fingro
33. ungo
34. dika fingro (polekso)
35. montra fingro
36. artiko
37. maleolo
38. manartiko

## IV. La piedo.

39. piedfingro
40. dika piedfingro
41. piedkolo
42. maleolo
43. kalkano
44. plando

## V. La buŝo.

45. lipo, supra kaj malsupra
46. dento [lipo]
47. lango
48. naza truo

## VI. La sangotuboj.

49. vejnoj
50. arterioj
51. pulmo
52. koro
53. laringo
54. traheo

## VII. La kranio.

55. krania ostoj
56. cerbo
57. malantaŭa kapa parto
58. nervo

\*) vidu la noton sur la 47a paĝo



# LA HOMA KORPO.

*Kiuj estas la partoj de la homa korpo? — Kapo, trunko kaj membroj.*

*Donu al mi priskribon de la kapo de l' homo! —* La II de l' homo estas tute kovrita per <sup>19</sup>, kiuj estas glataj aŭ bukaj. En la <sup>1</sup> la jenaj partoj estas: la ambaŭ <sup>25</sup>, la <sup>26</sup> kaj la V. La homo bezonas la <sup>25</sup> por vidi. Ii estas ŝirmataj per la <sup>22</sup>, kiuj estas sur la <sup>20</sup>. Dum la dormado la <sup>23</sup>, provizitaj je <sup>24</sup>, estas fermitaj. Super la okuloj la <sup>22</sup> estas kvazaŭ arketoj. La <sup>26</sup> estas la organo por flari odoron, la <sup>30</sup> je la ambaŭ flankoj de la II estas la organo por aŭdi. La <sup>31</sup> estas inter la <sup>30</sup> kaj <sup>26</sup>. La V fermas kaj malfermas sin per la ambaŭ <sup>45</sup>. En la buŝo estas multaj <sup>46</sup>, parte en la supra, parte en la malsupra makzelo; la <sup>47</sup> estas fiksita en la kolo. La buŝon oni bezonas por manĝi, paroli, spiri. Regule oni spiras per la <sup>26</sup>, kiu ankaŭ povas diferencigi la odorojn.

*Kie estas la barbo de la viro? —* La <sup>27</sup> estas sur la supra lipo, la <sup>29</sup> estas sur la mentono.

*Kiel la aero venas en la pulmon? —* Mi enspiras la aeron per la <sup>26</sup> aŭ per la buŝo. Poste la aero venas en la <sup>54</sup>, de tie en la <sup>51</sup>. Dum la spirado la pulmoj plivastiĝas.

*Nomu al mi la partojn de la trunko! —* La trunko konsistas el <sup>9</sup> kaj <sup>11</sup>. En la <sup>9</sup> la plej gravaj visceroj enestas, ekz. la <sup>52</sup> kaj <sup>51</sup>, la intestoj estas en la <sup>11</sup>.

*Kiuj estas la supraj membroj? —* Ambaŭ <sup>7</sup> kun la III; ili estas ligitaj per la <sup>5</sup> kun la korpo. La <sup>7</sup> konsistas el du partoj, ĝi fleksiĝas en la <sup>8</sup>. La <sup>38</sup> estas la interligo inter la III kaj <sup>17</sup>. Ĉiu mano havas po kvin <sup>32</sup>, ĉiu <sup>32</sup> havas <sup>33</sup>.

*Kiel oni nomas la fingrojn? —* Ii estas nomataj dika fingro (polekso), montra fingro, meza fingro, ringfingro, malgranda fingro. Per la helpo de la <sup>34</sup> la mano povas pli bone teni kaj ekpreni la objektojn ol sen ĝi. Kvankam la manoj estas konstruitaj tute egalaj, tamen ĝenerale la dekstra mano estas pli lerta ol la maldekstra, ĉar ĝi estas pli regule ekzercata.

*Donu al mi klarigon de la malsupraj membroj! —* La <sup>14</sup>, <sup>15</sup>, <sup>18</sup> kaj IV estas unu membro\*) simila al la brako. Sed por tiu ĉi membro bedaŭrinde en nia Esperanta lingvo ĝis nun ne ekzistas aparta vorto, kiel ekz. en la germana lingvo („das Bein“). Mi proponas novan vorton: „gambo“. En la IV la homo havas kvin <sup>39</sup>. La <sup>42</sup> kaj <sup>41</sup> estas inter la IV kaj la <sup>13</sup>; la malantaŭa parto de la piedo estas nomata la <sup>43</sup>. La <sup>44</sup> tuŝas la teron.

*Kion oni vidas sur la sesa bildo? —* Ĝi reprezentas la <sup>51</sup> kaj la <sup>52</sup>. El kiu punkto eliras ĉiuj nervoj? — Ĝi estas sub la <sup>55</sup> en la <sup>56</sup>.

*Kiuj estas la kvin sentoj de la homo? —* Oni vidas per la <sup>25</sup>, flaras per la <sup>26</sup>, aŭdas per la <sup>30</sup>, palpas precipe per la <sup>32</sup>, gustumas per la <sup>47</sup>. Nomu al mi kelke da negravaj malsanoj! — Kapdoloro, nazkataro, stomakdoloro, dentdoloro ktp.

## DEMANDOJ.

Kiel oni nomas la kvin sentojn de la homo? Al kio servas la koro? (Organo por la cirkulado de la sango), la pulmo? (Spirado). Kiamaniere la nutraĵo venas en la stomakon? (Per la buŝo kaj nutraĵa tubo.) Kiam la homo uzas la brakojn kaj gambojn? (Levante, irante.) Kiel oni nomas homon, kiu ne povas vidi, aŭdi, iri? (Blinda, surda, lama). Kiom da dentoj la homo havas? Per kio la dentoj estas ŝirmataj kontraŭ kario? (tio estas: denta putrado). Kiuj specoj da dentoj ekzistas? (Antaŭaj — tranĉaj kaj pintaj — dentoj, vangaj dentoj.) Kiujn kolorojn oni povas konstati rilate la okulojn (blua, bruna, griza, nigra) rilate la harojn? (bruna, nigra, blonda, griza, blanka.) Kiel oni nomas homon, kiu ne havas harojn sur la kapo? (Senharulo.)

\*) Pro tio oni ne povas akcepti la vorton „kruro“ (ĉar ĝi estas nur la malsupra parto), ankaŭ ne la vorton „femuro“ (ĉar ĝi estas nur la supra parto), fine ankaŭ ne la vorton „piedo“ (ĉar ĝi ankaŭ nur estas parto, al kiu el la brakaj partoj korespondas la mano). — Aliaj lingvoj — antikvaj kaj modernaj — montras la saman mankon, kiun ili evitas laŭ kutimo, kiun nia lingvo ne povas sekvi. Estas nepre necese, havi apartan vorton, ampleksantan per unu esprimo la tri (aŭ kvar) vortojn: femuro, (genuo), kruro, piedo, kiel ekz. la germana vorto „das Bein“. Pro tio mi proponas novan vorton laŭ itala kaj franca (gamba—jambe) radiko: *la gambo*.

# VIRINA VESTARO.



- |  |                         |                         |                                |
|--|-------------------------|-------------------------|--------------------------------|
| 1. vesto                               | 15. kolĉeno, ĉirkaŭkolo | 30. jaketo              | 45. senfingra ganto, duonganto |
| 2. korsaĵo                             | 16. naztuko             | 31. ĉapelo              | 46. korseto                    |
| 3. jupo                                | 17. frizmantelo         | 32. vualo               | 47. ganto                      |
| 4. kombilo                             | 18. brodaĵo             | 33. ĉapelrubando        | 48. harpinglo                  |
| 5. plumo                               | 19. antaŭtuko           | 34. banto               | 49. rajdkostumo                |
| 6. orelingo                            | 20. punto               | 35. vespermantelo       | 50. rajdvipo                   |
| 7. broĉo                               | 21. kufeto              | 36. zono                | 51. kolumo                     |
| 8. ventumilo                           | 22. truo                | 37. buko                | 52. kolumkrispo                |
| 9. sunombrelo                          | 23. hoketingo           | 38. ŝuo                 | 53. pajlĉapelo                 |
| 10. surmetaĵo                          | 24. fingroringo         | 39. kaŭĉuka ŝuo, galoŝo | 54. bireto                     |
| 11. franĝo, falbalaro                  | 25. mantelo             | 40. boto                | 55. surkorseto                 |
| 12. ĉirkaŭmano, ĉirkaŭbraĵo, braceleto | 26. maniko              | 41. ŝtrumpligilo        | 56. subjako                    |
| 13. ŝalo                               | 27. peltkolumo, boao    | 42. ŝtrumpo             | 57. supjupo                    |
| 14. ornamaj-, juvelkesto               | 28. mufo                | 43. pantalono           | 58. rubando                    |
|  | 29. pluvmantelo         | 44. ĉemizo              |                                |

# VIRINA VESTARO.

*Kion vi vidas en la mezo de la bildo?* — Tie mi vidas sinjorinon vestitan por viziti societon. Ŝi portas <sup>15</sup> kaj <sup>6</sup>. En la dekstra mano ŝi tenas la <sup>8</sup>. La <sup>2</sup> estas dekoltita, la <sup>3</sup> estas borderita per veluro. <sup>3</sup> kaj <sup>2</sup> estas ligitaj per la <sup>36</sup>. La haroj estas ornamitaj per <sup>4</sup> kaj <sup>5</sup>.

*Kion sinjorino portas sub la robo?* — Ŝi portas sur la <sup>44</sup>, la <sup>46</sup> kaj la <sup>55</sup>, la <sup>43</sup> kaj la <sup>57</sup> kun <sup>58</sup>.

*Kiajn ŝtrumpojn kaj ŝuojn sinjorino surmetas?* — Ŝi surmetas silkajn, lanajn aŭ kotonajn <sup>42</sup>, kiuj estas fiksataj per <sup>41</sup>. Sur la <sup>42</sup> ŝi portas <sup>38</sup> aŭ <sup>40</sup>. Tiuj estas ŝirmataj kontraŭ pluvo per <sup>39</sup>.

*Kiel sinjorino estas vestita sur la strato?* — Dum la vintro ŝi portas <sup>30</sup> aŭ <sup>25</sup> kun <sup>27</sup> kaj <sup>28</sup>. Sur la kapo ŝi havas <sup>54</sup> aŭ <sup>31</sup>. La manoj estas kovritaj per <sup>47</sup>. Por ŝirmi sin kontraŭ malvarmo la sinjorinoj surmetas <sup>32</sup>. Somere la <sup>30</sup> kaj <sup>25</sup> estas tro varmaj, tiam malpeza <sup>10</sup> aŭ <sup>13</sup> sufiĉas. Kiel ŝirmo kontraŭ la suno oni uzas la <sup>9</sup>.

*Al kio servas la antaŭtuko?* — La mastrino uzas la <sup>19</sup> matene en la kuirejo; ĝi servas por malhelpi, ke la vestoj estu malpurigataj. Sur nia bildo vi vidas la <sup>19</sup> ornamitan per <sup>11</sup>, kiu estas borderita per <sup>20</sup>.

*Kian kostumon la sinjorino havas sur la malgranda apuda bildo?* — Ŝi estas vestita per <sup>49</sup> kaj surmetis cilindran ĉapelon. En la mano ŝi tenas la <sup>50</sup>. Jus ŝi revenis promenrajdinte.

*Kiel oni ornamas la virinajn vestojn?* — Oni borderas la vestojn per <sup>20</sup>, per silkaj rubandoj, per ŝnuretoj kaj butonoj. La kolumoj ofte estas ornamataj per <sup>52</sup>. En la diversaj vestoj oni havas <sup>22</sup> kaj <sup>23</sup>, ankaŭ butonojn kaj kelkfoje <sup>37</sup>.

*El kiuj ŝtofoj la virinaj vestoj estas faritaj?* — La tolaĵo estas farita el tolo, duontolo aŭ silko, la subvestaĵoj estas faritaj el lano, kotonino aŭ silko. Por la roboj oni bezonas silkon, veluron, katunon, drapon, ŝevioton, batiston, tolon aŭ atlason. La ĉapeloj estas faritaj el felto aŭ pajlo; kelkfoje ili, kiel la <sup>54</sup>, estas borderitaj per pelto.

## KION ONI DEVAS FARI AŬ DIRI.

1. *Kiam la vestaĵo fariĝis n moderna:* oni aliigas la veston;
2. *Kiam ĝi fariĝis tro malvasta:* oni faras ĝin pli vasta; oni ŝanĝas la kunkudrojn;
3. *Kiam oni volas promeni:* Ĉu mia ĉapelo estas en konvena ordo? Ĉu mi surmetu hodiaŭ mian mantelon? Ĉu pluvos? Ĉu estas necese, surmeti la kaŭĉukajn suojn?

*Kion oni faras, kiam la frizmantelo estas malpura?* — La malpura frizmantelo estas lavata kaj gladata; kiam ĝi estas difektita, ĝi estas riparata (flikata).

*Nomu al mi kelke da laboroj por virinoj!* — La knabino lernas triki la <sup>42</sup>, triki kun kroĉiloj <sup>20</sup>, brodi la <sup>44</sup>, ĉar ŝi volas fariĝi bona mastrino; estas necese, ke ŝi sciu fliki (ripari la tolaĵon). Multaj knabinoj lernas puntofari. En antaŭaj tempoj la mastrinoj mem faris la tolon.

## DEMANDOJ.

Kiajn gantojn la virinoj surmetas? El kiuj ŝtofoj la gantoj estas faritaj? (Ledo, kotonino, lano.) Kiajn vestojn la mastrinoj portas en sia hejmo, sur la strato, en la societo? Kian koloron la funebraj vestoj havas? (Nigran.) Kiajn ŝtofojn oni bezonas por la edziĝvestoj? (Silkon, veluron, atlason.) Kiajn ornamaĵojn la sinjorinoj portas ĉirkaŭ la kolo, en la oreloj, ĉirkaŭ la brako, la fingro? Per kio la virinaj ĉapeloj estas borderitaj? Kie vi havas vian naztukon? Ĉu via naztuko estas farita el batisto aŭ tolo? Ĉu ĝi estas multkolora aŭ unukolora? Kiu faris la veston? (La tajlorino.) Per kia pelto tiu ĉi vespermantelo estas borderita? (Kastoro, zibelo, ermeno, mustelo, putoro.)

# VIRA VESTARO.



- |                    |                   |                    |                              |
|--------------------|-------------------|--------------------|------------------------------|
| 1. cilindra ĉapelo | 17. kvasto        | 33. poŝo           | 49. pluvombrello             |
| 2. mantelo, palto  | 18. kalsono       | 34. veŝto          | 50. cindrujo                 |
| 3. redingoto       | 19. pantoflo      | 35. borderaĵo      | 51. cigaro                   |
| 4. pantalono       | 20. boto          | 36. pelerinmantelo | 52. portfeljo, biletujo      |
| 5. bastono         | 21. rimeno        | 37. ŝelko          | 53. monujo                   |
| 6. gantoj          | 22. kalkanumo     | 38. kravatbanto    | 54. poŝhorloĝo               |
| 7. frako           | 23. plando        | 39. cigarujo       | 55. horloĝa ĉeno             |
| 8. maniko          | 24. ledo, surledo | 40. tabakujo       | 56. malmola ĉapelo           |
| 9. frakbaskoj      | 25. firmilo       | 41. razilo         | 57. ĉapelrando               |
| 10. peltmantelo    | 26. gamaŝo        | 42. ŝuo            | 58. pajlĉapelo               |
| 11. kolumo         | 27. duonŝtrumpo   | 43. laĉo           | 59. supra parto de l' ĉapelo |
| 12. manikborderaĵo | 28. ŝtrumpo       | 44. kravato        | 60. nazpinĉilo, nazumo       |
| 13. neglĝa vesto   | 29. ŝtrumtubo     | 45. kolumo         | 61. okulvitroj               |
| 14. butono         | 30. ĉemizeto      | 46. manumo         |                              |
| 15. butontruo      | 31. ĉemizeto      | 47. cigaringo      |                              |
| 16. ŝnuro          | 32. ĉasjako       | 48. pipo           |                              |

## VIRA VESTARO.

*Kiel la sinjoro sur la bildo estas vestita?* — Li portas <sup>2</sup> kaj <sup>1</sup>. En la dekstra mano li tenas siajn <sup>6</sup>, en la maldekstra sian <sup>5</sup>.

*Diru al mi ion rilate la vestaĵojn de sinjoro!* — Li estas vestita per la <sup>3</sup> kaj <sup>4</sup>; tiu ĉi estas tenata per <sup>37</sup>. Sub tiuj vestaĵoj estas la <sup>34</sup>, la <sup>18</sup> kaj la <sup>30</sup>. La piedoj estas vestitaj per <sup>27</sup> aŭ <sup>28</sup>. Matene en la hejmo oni uzas la <sup>19</sup>, tage <sup>42</sup> kaj <sup>20</sup>. Sed la kostumo fariĝas perfekta nur per <sup>45</sup>, <sup>44</sup>, <sup>31</sup> kaj <sup>46</sup>.

*Nomu al mi diversajn surtutojn, per kiuj la sinjoroj sin vestas!* — Sinjoro, volante promeni, surmetas <sup>36</sup>, vintre <sup>10</sup>, volante ĉasi <sup>32</sup> kaj dum la matenhoroj <sup>13</sup>. Vizitonte societon li surmetas <sup>7</sup>.

*Diru al mi ion pri la desegnoj kaj specoj de ŝtofoj, kiujn vi vidas sur nia bildo!* — La <sup>4</sup> estas kvadrata, la <sup>18</sup> estas striita. La <sup>7</sup> estas farita el drapo, la <sup>32</sup> el kruda drapo, la <sup>18</sup> el kotono aŭ el tolo, la <sup>13</sup> el flanelo, la <sup>3</sup>, <sup>4</sup>, <sup>36</sup> el lano.

*Kion sinjoro havas en siaj poŝoj?* — Li havas <sup>39</sup>, <sup>52</sup> kaj <sup>61</sup> en la brustpoŝo, la ŝlosilojn, la naztukon kaj la <sup>53</sup> en la pantalonpoŝo kaj <sup>54</sup> en la veŝpoŝo.

*Kiaj homoj devas havi okulvitrojn?* — La miopuloj kaj la malmiopuloj bezonas <sup>61</sup> aŭ <sup>60</sup>.

*Diru ion pri la diversaj specoj de ĉapeloj!* — Mi konas <sup>1</sup>, <sup>56</sup>, <sup>58</sup> kaj n olajn ĉapelojn. La partoj de P ĉapelo estas la <sup>59</sup> kaj la <sup>57</sup>. Kiam sinjoro volas viziti societon li surmetas la <sup>1</sup>. Somere li uzas la <sup>58</sup>, vintre la <sup>56</sup>.

*Kiom ofte oni bezonas razilon?* — Tiu, kiu ne volas la kreskadon de barbo, ĉiutage bezonas la razilon.

*Kiajn specojn de veŝtoj vi konas?* — Mi konas kolorajn, blankajn, broditajn, trikitajn, ledajn veŝtojn.

*Kion la sinjoroj kaj knaboj devas atenti rilate siajn vestojn?* — La <sup>2</sup> kaj <sup>3</sup> devas havi ĉiujn butonojn. La vestoj kaj ĉapeloj devas esti bone purigitaj, ĉiu malordo, ekz. malordigitaj <sup>43</sup>, manko de butonoj en la <sup>46</sup> ktp. faras la impreson, ke la homo estas neordama.

*Kiuj partoj de la ŝuoj kaj botoj povas esti difektataj?* — La <sup>21</sup> povas esti disŝirata, la <sup>25</sup> povas esti depuŝata, la <sup>22</sup> estas piedpremata oblikve, la <sup>23</sup> estas eluzata.

## DEMANDOJ.

Kiuj metiistoj pretigas viajn vestojn? Per kio oni substofas la vestojn? (Silko, atlaso.) Kiel oni ŝirmas sin kontraŭ pluvo? En kiu formo oni ĝuas la tabakon? (Cigaro, cigaredo, pipo, flartabako.) Kio faras la ŝelkojn etendeblaj? (Kaŭĉuko.) Per kio vi varmigas viajn piedojn? Kiujn vestaĵojn vi demetas antaŭ la enlitiĝo? El kiu ŝtofo la vestaĵo de tiu sinjoro estas farita? (Ŝeviot.) Kiuj estas la diversaj partoj de boto?

## DIALOGO.

Vendanto: Kiel mi povas servi al vi?

Sinjoro : Mi volas aĉeti dekduon da kolumoj.

Vendanto: De kiu formato? Bonvolu diri al mi la detalajn numerojn de la alteco ktp.

Sinjoro : Ili devas havi 42 centimetrojn laŭlonge kaj 6 cm laŭalte.

Vendanto: Ĉu vi deziras ankoraŭ aliajn aĵojn?

Sinjoro : Jes, montru al mi kelkajn kravatojn.

Vendanto: Ĉu vi deziras silkajn aŭ batistajn?

Sinjoro : Donu al mi unu silkan kravaton kaj tri laveblajn kravatojn.

Vendanto: Kaj kion vi deziras plue?

Sinjoro : Mi volas aĉeti paron da gantoj por

Vendanto: De kiu numero? [vizitoj.]

Sinjoro : De numero 8.

Vendanto: Kaj de kiu koloro?


Sinjoro : Donu al mi, mi petas, ruĝbrunajn, kaj tiajn kun prembutojn.

Vendanto: Permesu, ke mi proponu al vi novaĵon! Mi havas antaŭ ĉio la plej novajn specojn de ĉapeloj. Por la vojaĝo mi rekomendas al vi tiun ĉi tre malpezan pajlĉapelon. Tiu Panama-ĉapelo estas speciale daŭrema kaj praktika; oni povas meti ĝin en la poŝon sen difekti la formon; ĝi ja ne estas malmultekosta, sed certe vi povas uzi ĝin multjare.

Sinjoro : Bone, mi aĉetos ĝin. Sendu al mi ĉion, mi petas kun kvitancita fakturo.

Vendanto: Plej bonan dankon, sinjoro.

# METIISTOJ KAJ PROFESIISTOJ I.



1. **ĉarpentisto**
2. hakilo
3. trabo
4. bloko
5. ligna martelo
6. ligneto, splito
7. **masonisto**
8. briko
9. trulo
10. muro
11. mortero
12. tineto
13. martelo
14. trabaĵaro
15. **murpentristo**
16. farbo

17. ŝtupetaro
18. farbopoto kun peniko
19. **lignaĵisto**
20. rabota stablo
21. segilo
22. segilklingo
23. rabotilo
24. rabotsplitoj, rabotaĵo
25. ĉizilo
26. borilo
27. **vitrismo**
28. fenestra vitro
29. fenestra kadro
30. mezurilo
31. mastiko
32. vitro

33. **ladisto**
34. bluzo
35. fornotubo
36. fleksa parto de l' tubo
37. lutilo
38. sitelo (el stano aŭ zinko)
39. lado
40. ladŝero
41. karbopato
42. fumo
43. **pavimisto**
44. martelo
45. pavimero
46. ligna ŝuo
47. benketo
48. ramilo, pavimbatilo

49. **forĝisto**
50. amboso
51. (fajro-) prenilo
52. fero
53. najlo
54. hufferaĵo
55. ŝraŭbo
56. fajrejo
57. fajro
58. (fajro-) blovilo
59. **kaldronisto**
60. kaldrono
61. samovaro
62. benketo kun tri piedoj (skabelo)

## METIISTOJ KAJ PROFESIISTOJ I.

*Kion faras la metiisto sur la unua bildo?* — La metiisto, nome <sup>1</sup>, glatigas la <sup>3</sup> per la <sup>2</sup>. La <sup>3</sup> kuŝas sur la <sup>4</sup>.

*Kiun vi vidas apud la ĉarpentisto?* — <sup>7</sup> staras sur la <sup>14</sup> kun <sup>8</sup> kaj <sup>9</sup> en la mano. Li elprenis <sup>11</sup> el la <sup>12</sup> kaj ŝmiras ĝin sur la <sup>8</sup>.

*Kiun reprezentas la tria bildo?* — Tie estas <sup>15</sup>. Li enmetas la penikon en la <sup>18</sup> kaj kolorigas la domon per griza farbo. La farbo ankoraŭ estas malseka.

*Kiu faras tablojn kaj seĝojn?* — La <sup>19</sup>. Sur nia bildo li estas en sia laborejo. La ligno estas enŝraŭbita en la <sup>20</sup> kaj estas prilaborata per la <sup>23</sup>. La <sup>23</sup> estas glata, la <sup>21</sup> estas akriegita kaj streĉita.

*Kiu estas sur la bildo apud la lignaĵisto?* — Tiu estas la <sup>27</sup>. Li enmetas <sup>28</sup> en la <sup>29</sup> kaj fiksas ĝin per mastiko. Li mezuras la <sup>28</sup> per la <sup>30</sup>, por ke ĝi akordiĝu kun la <sup>29</sup>.

*Kiu metiisto estas sur la tria bildo de la dua vico?* — Tiu metiisto estas <sup>33</sup>, kiu okupas sin pri ladofabrikaĵoj. <sup>35</sup> kaj <sup>38</sup> estas jam pretaj. La <sup>40</sup> kuŝas sur la tero. Li estas lutonta la <sup>35</sup> per la <sup>37</sup>.

*Ĉu vi konas la metiistojn de la tria vico?* — Jes, mi konas ilin. La unua estas <sup>43</sup>; li frapas <sup>45</sup> per la <sup>44</sup>. La dua estas <sup>49</sup> antaŭ sia <sup>50</sup>. Li prenis la brulantan feron per la <sup>51</sup>; ĉirkaŭ li oni vidas sur la tero <sup>53</sup>, <sup>54</sup> kaj <sup>55</sup>. La <sup>57</sup> brilas en la <sup>56</sup>. La tria estas <sup>59</sup> sur sia <sup>62</sup>, li faras <sup>60</sup>.

*Kiuj metiistoj estas okupataj dum la instalado de kuirejo?* — La fornisto instalas la kamenon. La <sup>35</sup>, kiu iras en la kamentubon, estas farita de la <sup>33</sup>; la <sup>7</sup> kovris la plankon per kaheloj, la <sup>15</sup> surpentris la murojn per la <sup>16</sup>, la <sup>27</sup> enmetis <sup>28</sup> en la <sup>29</sup>, la <sup>19</sup> liveris la kuirejotablonojn kaj la aliajn meblojn de la kuirejo.

*Kiamaniere juna homo lernas la metion de lignaĵisto?* — Unue li estas dum tri jaroj lernanto. Li lernas raboti per la <sup>23</sup> sur la <sup>20</sup>, segi per la <sup>21</sup>, bori per la <sup>26</sup>, glui kaj poluri. Poste li laboras memstare kiel ekslerninta helpanto, kaj tiam li povas fariĝi majstro.

*Kiuj metiistoj prizorgas la riparadon de domo?* — La <sup>1</sup> riparas la difektitan plankon, la <sup>7</sup> renovigas per la <sup>11</sup> la muran stukaĵon, kiu defalis aŭ ŝiriĝis, la <sup>15</sup> blankigas la plafonojn, la <sup>19</sup> renovigas la poluron de la mebloj, la <sup>27</sup> anstataŭigas la rompitaĵojn <sup>28</sup> per novaj, la <sup>33</sup> plibonigas la ladon de la fenestraj kornicoj, la <sup>59</sup> flikas la <sup>60</sup> de la lavejo.

*Kiujn sonojn ni aŭdas dum la laboro de la metiistoj?* — La <sup>33</sup> knaras, la <sup>28</sup> tintas, la <sup>60</sup> sonegas, la <sup>11</sup> plaŭdas, la <sup>57</sup> zumas.




*Kion vi diras, kiam vi komisiis vitriston?* — Sendu al ni, mi petas, vian helpanton. La vento dispremis ĉe ni du grandajn <sup>28</sup>.

*Kiam vi komisiis ladiston?* — Nia tegmenta defluilo estas difektita, venu do por ripari ĝin.

## DEMANDOJ.

Kion bezonas la pavimisto dum sia laboro? Kiuj metiistoj estas okupataj dum la konstruado de domo? Kion oni bezonas por luti? (Lutilo.) Kiu metio laŭ via opinio estas la plej agrabla? Kion bezonas la murpentristo? (Penikoj, farboj.) Per kio oni enkadrigas la fenestrajn vitrojn? (Vitrista mastiko.) Per kio la vitristo tranĉas la vitron? (Diamanto.) Per kio oni kunigas la pavimerojn? (Gudro, sablo.) Kial la forĝisto bezonas fajron dum sia laboro? (Por forĝi la feron.)

## METIISTOJ KAJ PROFESIISTOJ II.



1. **barelisto**
2. leda antaŭtuko
3. barelo
4. daŭbo
5. barelringo
6. **tornisto**
7. tornistotablo
8. akso
9. rimeno
10. rado
11. akso
12. piedbreto
13. tablo piedo
14. **horloĝisto**
15. lupeo
16. prenilo

17. poŝhorloĝo
18. vekilo, vekhorloĝo
19. tablohorloĝo
20. surmura horloĝo
21. kuirejhorloĝo
22. pendolo
23. pezigilo
24. **tinkturisto**
25. lanaj fadenoj
26. bastono
27. tino
28. stablo
29. kaldrono
30. vaporo
31. elfluigilo, krano
32. **teksisto**
33. teksilo

34. kardilo
35. glitbobeno (teksnaveto)
36. rimeno
37. dentrado
38. **tajloro**
39. gladilo
40. bobeno
41. vestaĵo
42. tondilo
43. kudrofadeno
44. kudrilo
45. gastubo
46. gaslampo
47. **tajlorino**
48. kudromaŝino

49. korsaĵo
50. jupo
51. **ĉapelisto**
52. bloko
53. ĉapelujo
54. cilindra ĉapelo
55. malmola ĉapelo
56. **selisto**
57. apogseĝo
58. selotrabetajo
59. jungilaro
60. enbuŝaĵo
61. selo
62. piedingo
63. vipo
64. kondukilo



## METIISTOJ KAJ PROFESIISTOJ II.

*Kion vi vidas sur la unua bildo?* — La <sup>1</sup> kun <sup>2</sup> estas okupata pri sia laboro. Li metas <sup>3</sup> ĉirkaŭ <sup>4</sup>. Kiu estas farita el <sup>4</sup>. Kelke da <sup>5</sup> pendas desur la muro.

*Kiu faras pipojn, bastonojn, tablopedojn ktp.?* — La <sup>6</sup>; li havas la unu piedon sur la <sup>12</sup> de la <sup>7</sup> kaj movas la du <sup>10</sup>, kiuj estas ligataj per <sup>9</sup>. Per la <sup>12</sup> la <sup>11</sup> moviĝas.

*Kio kaŭzas, ke via horloĝo ne funkcias, kaj kiu povas ripari ĝin?* — La <sup>17</sup> tre ofte iras malprecize, kiam ĝi enhavas malpuraĵojn; tiam ĝi devas esti purigata de la <sup>14</sup>, aŭ kiam la risorto estas rompita, tiam la <sup>14</sup> devas enmeti novan risorton. La <sup>14</sup> esploris mian poŝhorloĝon, preninte la <sup>15</sup>, la risorto estis difekta. Kiam mi estis ĉe la horloĝisto, sinjoro ĉeestis en la magazeno, kiu aĉetis <sup>17</sup>.

*Ĉu estas necese, forĵeti vestaĵon, kiu estas dubekolora aŭ malpura?* — Tute ne; kiam ĝi estas dubekolora, t. e. kiam la koloro ŝanĝiĝis, oni povas sendi ĝin al <sup>24</sup>, kiu renovigas la koloron aŭ purigas la vestaĵon per lavado, kiam ĝi estas malpura. Mi alportis mian mantelon al la <sup>24</sup>. Kiam mi alvenis, li pendigis siajn <sup>25</sup> sur kelkaj <sup>26</sup> en grandan <sup>27</sup>.

*Kiun vi vidas sur la kvina bildo?* — Tiu estas <sup>32</sup>. Li faras tolon kaj drapojn per <sup>33</sup>, <sup>34</sup> kaj <sup>35</sup>. La <sup>36</sup> estas ligita kun la maŝino, per kies helpo la <sup>38</sup> moviĝas.

*Kie sinjoro mendas siajn vestojn?* — Ĉe la <sup>38</sup>. Tiu ĉi bezonas <sup>42</sup>, <sup>43</sup> kaj <sup>44</sup> dum sia laboro. Kiam la vestoj estas pretaj, ili estas gladataj per la <sup>39</sup>. — Vespere la <sup>38</sup> lumigas la <sup>46</sup>.

*Ĉu la sinjorinoj ankaŭ komisias la tajloron?* — Jes, kelkfoje. Sed tre multaj preferas la <sup>47</sup>. Tiu ĉi sidas proksime de la fenestro apud la <sup>49</sup> kaj kudras korsaĵon. La <sup>49</sup> morgaŭ estos preta, la <sup>50</sup> jam estas preta por esti forsendata.

*Kiel oni nomas la metiiston sur la antaŭlasta bildo?* — Mi opinias, ke tiu ĉi estas <sup>51</sup>, li brosas <sup>44</sup>, li ankaŭ vendas <sup>55</sup>. La <sup>53</sup> servas por konservi la ĉapelojn, precipe la <sup>54</sup>.

*Kion faras selisto?* — Li remburas la <sup>57</sup> kaj la sofojn, li tapetas kaj ornamas la ĉambrojn. En lia magazeno oni povas aĉeti <sup>59</sup>, <sup>61</sup> kun <sup>62</sup>, <sup>63</sup> kaj <sup>64</sup>. Sur la bildo ni vidas ankaŭ kelkajn vojaĝkrofojn.

*Kiujn specojn de seĝoj vi konas?* — Remburitaj <sup>57</sup>, kanseĝoj, lignaj seĝoj diversspecaj (ekz.: skulptitaj) feraj ĝardenseĝoj, faldseĝoj, skabeloj ktp.

## MENDOJ KAJ KOMISIOJ.

*Ĉe la tajlorino:*

Servistino: Sinjorino N. demandas, ĉu ŝia <sup>50</sup> estas preta.

Vi ja promesis ĝin por la hodiaŭa posttagmezo.

Tajlorino: Post duonhoro vi povas preni ĝin kun vi, ĝi ankoraŭ devas esti gladata.

*Ĉe la tajloro:*

Aĉetanto: Mi volas mendi por mi novan surtuton. Ĉu vi povas montri al mi diversajn ŝtofojn kaj diri al mi la prezojn?

Tajloro: Bonan dankon! Tie ĉi estas la plej novaj ŝtofsortimentoj je la prezo de 80 ĝis 100 frankoj po unu surtuto.

Aĉetanto: Mi tre ŝatas tiun ĉi striitan ŝtofon.

Tajloro: Permesu, ke mi tuj faru la mezurajn notojn!

Aĉetanto: Tre volonte! Kiam mi povas havi la surtuton?

Tajloro: Post unu semajno!

Poste li notas la mezurojn de la dorso, brusto ktp. Li ankaŭ demandas, ĉu la veŝto devas esti dekolita aŭ nedekoltita. Fininte la notojn li petas la aĉetanton, ke li revenu post tri tagoj por prove surmeti la vestaĵon.

*Ĉe la ĉapelisto:* Kion vi deziras, sinjoro? Mi volas aĉeti ĉapelon. Ĉu vi volas havi <sup>55</sup> aŭ <sup>54</sup>? Sendu al mi en mian loĝejon <sup>54</sup> kun <sup>53</sup>.

## DEMANDOJ.

Kiaj horloĝoj estas en la horloĝmagazeno? Kiuj mebloj estas en via mangoĉambro; ĉu tie mebloj estas, kiujn la selisto faris? Kiamaniere vesto estas farata? (Formtranci, kudri, giadi ktp.) Kion oni enmetas en la barelojn, kiujn faras la barelisto? (Oleo, vinagro, biero, vino, haringoj, petrolo ktp.) Pri kiuj laboroj la ĉapelisto okupas sin? Kion vi vidas sur la tajlortablo? Ĉu la metiistoj dum la lastaj jardekoj sukcesis pli bone ol en pli fruaj tempoj? Diru al mi kelke da proverboj, kiuj rilatas al la diversaj metioj!

# METIISTOJ KAJ PROFESIISTOJ III.



1. *tanisto (felpreparisto)*
2. tanista stablo
3. tranĉilo
4. felo
5. haroj

## *ŝuistlaborejo*

6. ŝuisto
7. ŝuistaj iloj
8. ŝuistglobo
9. aleno
10. piedbenketo
11. botoŝtipo
12. mezurilo

13. *peltis o (felisto)*
14. peltio
15. peltmantelo

16. pedsako
17. mufo
18. peltkolumo, boao

## *presejo*

19. presisto
20. presmaŝino
21. rega rado
22. paperfolio
23. laboristino
24. kompostisto

## *librovindejo*

25. bindisto
26. bindistaj iloj
27. premilo
28. gluopoto

29. liniilo
30. detranĉilego

## *librovendejo*

31. librovendisto
32. ŝtupetaro
33. ŝranko
34. pupitro
35. globuso

## *barbirejo, frizejo*

36. barbirejo, frizisto
37. tualettuko
38. sapovazeto
39. frizmantelo
40. spegulo
41. malgranda spegulo
42. lavujo

## *apoteko*

43. apotekisto
44. recepto
45. skatolo, drogujo
46. botelo
47. viro, kliento
48. virino

## *florvendejo*

49. florvendisto, ĝardenisto
50. bukedo
51. (flor-) vazo
52. floroj, kreskaĵoj
53. krono
54. kalao
55. figarbo
56. palmo
57. florpoto

## METIISTOJ KAJ PROFESIISTOJ III.

*El kio miaj ŝuoj estas faritaj?* — El ledo. La <sup>1</sup> tanaŝ ĝin el la <sup>4</sup> de la bestoj. Per la <sup>2</sup> li skrapas la <sup>3</sup> desur la <sup>4</sup>. La <sup>4</sup> malbonodoras.

*Kiu konsumas la ledon?* — La <sup>6</sup> faras ŝuojn kaj botojn el la ledo. Sur nia bildo ni vidas lin laboranta en sia laborejo. Li kudras la ŝuon per la <sup>9</sup>; la <sup>11</sup> kuŝas sur la planko. Vespere li lumigas la lampon kaj la <sup>8</sup> reflektas la kolektitajn radiojn sur tiun lokon, kie la ŝuisto bezonas helan lumon.

*Kiu vendas peltaĵojn?* — La <sup>13</sup> vendas <sup>14</sup>, <sup>15</sup>, <sup>16</sup> kaj <sup>17</sup>. Hieraŭ ĉe li mi aĉetis <sup>18</sup>. La malfalsaj peltoj ĉiuj estas multekostaj, ĉar la feluloj (felaj bestoj) nuntempe estas maloftaj.

*Kie la verkisto presigas siajn librojn?* — Li alportas sian manuskripton al iu <sup>21</sup>, kiu samtempe estas eldonisto. La <sup>24</sup> kompostas la verkon, poste la kompostaĵo estas metata en la <sup>20</sup>. Sed tiam la libro ankoraŭ ne estas preta. Estas necese, ke ĝi ankaŭ venu al la <sup>25</sup>, kiu faldas kaj broŝuras la foliojn kaj bindas ilin.

*Kia magazeno estas apud la bindistejo?* — Ĝi estas librovendejo. La <sup>31</sup> staras sur la <sup>32</sup> kaj enmetas libron en la <sup>33</sup>. Sur la tablo de la <sup>34</sup> li enskribas en la registrajn librojn.

*Kiu estas en la barbirejo?* — Sinjoro tie estas razata. La <sup>36</sup> tenas la <sup>38</sup> en la mano kaj sapumas lin. Alia sinjoro estas tondata. La <sup>39</sup> ŝirmas la vestojn kontraŭ la detranĉitaj, defalantaj haroj.

*Kiu vendas la medikamenton, kiun la kuracisto ordonas?* — Oni alportas la <sup>44</sup> al la <sup>43</sup>. Tre ofte oni devas atendi en la apoteko, ĉar kelkaj medikamentoj nur post kelke da tempo estas pretaj.

*Kion vi vidas sur la lasta bildo?* — La <sup>49</sup> alligas planton al bastono. Sur la muro <sup>53</sup> pendas. En la magazeno oni povas aĉeti <sup>56</sup>, <sup>64</sup> kaj <sup>55</sup>.

*Kion oni aĉetas en florvendejo?* — Infano aĉetas <sup>50</sup> por sia patrino, por doni ĝin al ŝi okaze de ŝia naskiĝtago. Du sinjorinoj, nigre vestitaj, aĉetas <sup>58</sup>, por porti ĝin al la tombejo. Sinjoro vendas kelkajn <sup>52</sup>, por ornami per ili sian ĉambron.

*Kiajn librojn oni povas aĉeti ĉe la librovendisto?* — Sur la librobreto vi trovos amuzigajn legaĵojn por infanoj, fabellibrojn, mitolibrojn ktp.; sur alia breto literaturon por plenaĝuloj, kiel ekz. noveloj, romanoj, dramoj. Tria breto enhavas sciencajn literaturon el la teologia, filozofia, medicina, jurista scienco. Gazetoj kaj broŝuroj ankaŭ ĉiam estas aĉeteblaj.

*Kie la apotekisto konservas siajn medikamentojn?* — La pulvoroj, piloloj, herboj, ŝmiraĵoj estas en la <sup>46</sup>, la <sup>46</sup> enhavas likvorojn, acidojn, oleojn. La enhavo estas notita en la surskriboj latine.

## INTERPAROLADO EN LA APOTEKO.

Apotekisto: Kion vi deziras?

Kliento : Mi havas recepton kaj petas vin, prepari la medikamenton kiel eble plej baldaŭ.

Apotekisto: Ĉu vi volas atendi?

Kliento : Jes, se la preparo ne daŭros tro longe.

Apotekisto: Sidiĝu intertempe, eble vi legos por distri vin tiun ĉi broŝuron pri praktika nutrado.

Kliento : Ĉu vi havas ankaŭ plastron? Mi havas malgrandan vundon, kaŭzitan per tranĉo, kiu ankoraŭ sangadas.

Apotekisto: Nu, mi povas doni al vi tre bonan vund-plastron, post unu tago la vundo estos fermita.

Kliento : Kial vi surgluas sur kelkaj boteloj etiketojn kun kranio de mortinto?

Apotekisto: Ĉiuj boteloj, kiuj enhavas venenajn fluidaĵojn, devas esti signitaj per tiaj etiketoj, por ke la pacientoj estu singardemaj.

Kliento : Kio estas en tiuj porcelanaj ujoj?

Apotekisto: Ŝmiraĵoj kaj sekaj medikamentoj, diversspecaj teoj, ekz. kamomila, tilioflora, pipromenta teoj ktp. Nun via medikamento estas preta.

Kliento : Kiom mi devas pagi?

Apotekisto: Du frankojn. — Mi deziras baldaŭan resaniĝon.

## INTERPAROLADO EN LA FRIZEJO.

Kliento: Bonan tagon. Tondu, mi petas, miajn harojn!

Barbiro: Bonvolu sidiĝi, sinjoro! Ĉu mi tondu la harojn ĝis du aŭ kvin centimetroj?

Kliento: Tiel mallonge, kiel eble. Prenu do la ton-dilmaŝinon.

Barbiro: Ĉu vi ankaŭ deziras lavadon de la kapo?

Kliento: Ne, sed vi povas mallongigi la barbon kaj razi min.

Barbiro: Nun la tondado estas finita. Espereble vi estos kontenta. Mi petas, ke vi fariĝu mia regula kliento.

# METIISTOJ, KOMERCISTOJ, NEGOCISTOJ.



## **venta muellilo**

1. muelilo
2. flugilo
3. velo
4. galerio
5. muelisto
6. sakoj kun faruno

## **bakejo**

7. bakisto
8. bakista lernanto
9. pasto
10. knedujo
11. korbo
12. panŝovilo
13. malfermaĵo de l'forno
14. bakforno
15. korbo
16. murbreto
17. blanka pano

18. bruna pano

## **kukovendejo**

19. sukeraĵisto, kukisto
20. kukoj, tortoj, patkukoj, tekukoj
21. Viena torto
22. makarona torto
23. potkuko

## **buĉistejo**

24. buĉisto
25. buĉista helpanto
26. hakita viando
27. bovidkapo
28. viando

## **vendejo de bongustaĵoj**

29. bongustaĵisto
30. fromaĝo

31. fromaĝkloŝo

32. kolbaso
33. ansero
34. ŝinko
35. lardo
36. barelo kun salita viando

## **magazeno**

37. komercisto
38. papersaketo
39. magazentablo
40. sako
41. ŝovelilo
42. pesilo
43. servistino
44. lada skatolo
45. sukerkonuso
46. vino
47. likvoro
48. ĉokolado

## **biertransportilo (bierveturilo)**

49. bierfaristo
50. veturilo de l'bierfaristo
51. bierbarelo
52. ŝtopiltruo [barelo]
53. elfluigilo (por la bier-)

## **vendejo de feraj komercaĵoj**

54. vendisto
55. kliento
56. fosilo, ŝovilo
57. lampo
58. ekrano

## **juvelvendejo**

59. juvelisto
60. ordeno
61. juvelaj ornamaĵoj

# METIISTOJ, KOMERCISTOJ, NEGOCISTOJ.

*Kiun vi vidas sur la unua bildo?* — La <sup>5</sup> staras antaŭ sia <sup>1</sup>. Li alportis la <sup>6</sup>.

*Kiel la venta muelilo moviĝas?* — La vento pelas la <sup>3</sup>, kiuj interne de la muelilo movas grandajn muelŝtonojn. Tiuj ĉi muelas la grenon.

*Kien la muelisto alportas la farunon?* — Li veturigas ĝin al la <sup>7</sup>. Tiu bakas el ĝi panon kaj kukon.

*Rakontu, kiel la bakisto bakas la panon?* — Li knedas la paston en la <sup>10</sup> kun akvo, lakto kaj feĉo. Poste li fermentigas ĝin, formas el ĝi bulojn kaj enŝovas ilin per la <sup>12</sup> en la <sup>14</sup>. Kiam la pano estas bakita, li eligas ĝin el la forno. Li faras duspecajn panojn, brunpanon el sekala faruno kaj blankpanon (bulkojn) el tritika faruno.

*Kion oni povas mallaŭdi rilate la panon?* — La pano estas tro longe bakita; ĝi estas duone bruldifektita; ĝi estas nesufiĉe bakita; ĝi enhavas tro malmulte da salo; ĝi estas sengusta; ĝi estas tro malfreŝa; ĝi havas tro malmolan kruston.

*Kie oni povas aĉeti tortojn?* — En la sukerajejo. Tie oni povas aĉeti kukojn kaj diversspecajn tortojn, glaciaĵojn, konfitaĵojn ktp. La posedanto estas la multekonata <sup>19</sup>; liaj <sup>20</sup> treege bongustas.

*Kiun oni vidas en la buĉistejo?* — La <sup>24</sup> donas al sia <sup>25</sup> ordonon. Li devas porti <sup>26</sup> kaj <sup>27</sup> al iu restoracio.

*Kiu vendas kolbasojn, fumaĵitaĵojn, ŝinkojn ktp.?* — Oni aĉetas <sup>32</sup>, <sup>34</sup> kaj <sup>35</sup> ĉe la <sup>29</sup>. Tie oni povas aĉeti ankaŭ anserojn, ovojn, fromaĝon, kukumojn, konserviĵojn.

## INTERPAROLADO.

Servistino: Bonan tagon.

Vendisto : Kion, vi deziras, fraŭlino?

Servistino: Donu al mi unu funton da faruno, unu funton da amelo, kaj tri funtojn da sukero.

Vendisto : Ĉu vi deziras ankoraŭ ion alian?

Servistino: Jes, du funtojn da ĉokolado. Kiom la plej bona speco kostas?

Vendisto : Kvar frankojn.

Servistino: Ĉu vi ne havas malpli multekostan?

Vendisto : Jes, certe! por tri frankoj. Sed tiam la kvalito ankaŭ estas malpli bona.

Servistino: Donu al mi de tiu kvalito du funtojn. Kiom mi devas pagi entute?

Vendisto : 8 frankojn 75 centimojn.

*Kion mallaŭdas la aĉetantoj?* — La <sup>55</sup> estas indignaj, kiam la vendisto servas ilin tro malrapide aŭ kiam li estas tro ŝparema. Ili rifuzas malbonajn kaj tro multekostajn komercaĵojn.

*Kiamaniere la biero estas farata?* — La <sup>49</sup> faras la bieron el lupolo kaj malto. Li enfluigas ĝin en <sup>51</sup>, kiu havas <sup>52</sup>.


*Kion la sinjoro aĉetas ĉe la ferkomercaĵisto?* — Li aĉetas <sup>58</sup> kaj <sup>56</sup>.

*Kiun profesion la viro sur la lasta bildo havas?* — Li estas <sup>59</sup> kaj ĵus rigardas ĉirkaŭbrakon, ornamitan per <sup>61</sup>. Li elprenis ĝin el vitra kesteto kaj prezentis ĝin al iu sinjorino, kiu volis aĉeti tiaĵon.

## DEMANDOJ.

Kiuj tortoj estas aĉeteblaj en la kukejo? Kiujn bestojn la buĉisto buĉas? (Bovoj, porkoj, safoj, bovidoj.) Kien la bakistoj metas la pretajn panojn? Kie la fromaĝkloŝo staras en la bongustejo? Kiujn ornamaĵojn vi konas? (Ĉirkaŭmanoj, ĉirkaŭbrakoj, ringoj, broĉoj, ĉirkaŭkoloj.) Kiun koloron la biero havas? (Bruna, hela.) El kiuj specoj de faruno la pano estas farata? (sekalo, tritiko.) Kio eble kuŝas en la korbo sur la supra breto en la knedejo? (Bulkoj, panetoj, biskvitoj.) Kion oni aĉetas ĉe la vendisto de koloniaĵoj? (Sukero, teo, kafo, salo, faruno, rizo ktp.) Kiom da flugiloj la venta muelilo havas? Kiamaniere la vendisto konstatas la prezon de la komercaĵoj? Per kio oni traboras bierbarelon?

# KONTORO.



1

- |                               |  |   |                              |
|-------------------------------|--|---|------------------------------|
| 1. komerca kontoro            | 13. pupitro                              | 22. kontorlibroj (ĉeflibro, ordiglibro, kontokurantlibro, bilanclibro, inventarlibro) | 36. stampilo kun farbujo     |
| 2. posedanto, ĉefo            | 14. turnseĝo                             | 25. bretaro por registrolibroj  | 37. leterpesilo              |
| 3. kasisto                    | 15. paperkorbo                           | 26. leterordigiloj  | 38. liniilo                  |
| 4. librotenisto               |  | 27. kartoteko   |                              |
| 5. stenotipistino, sekretario | 16. skribmaŝino                          | 28. leterkorbo  | 39. telegramkodo             |
| 6. (komerc) lernanto          | 17. skribmaŝintablo                      | 29. inkujo  | 40. telefono (surtabla)      |
| 7. vendisto                   | 18. kopimaŝino                           | 30. plumingo  | 41. arklampo                 |
|                               | 19. kalkulmaŝino                         | 31. inksorbilo  | 42. ampolo                   |
| 8. aĉetanto, kliento          | 20. ĝiĉeto                               | 32. skribsubmetaĵo  | 43. lampŝirmilc              |
| 9. specimenoj                 | 21. monŝranko                            | 33. letero  | 44. lamptirilo               |
| 10. kontortablo, magazentablo | 22. papermono (monbiletoj, banknotoj)    | 34. koverto   |                              |
| 11. skribotablo               | 23. fera ŝranko (por la kontorĉeflibroj) | 35. truigilo  | 45. kalendaro                |
| 12. skribtabla seĝo           |  |   | 46. globuso, geografia globo |
|                               |  |   | 47. landkarto                |
|                               |  |   | 48. afiŝo                    |

## KONTORO.

Hodiaŭ estas la tria de novembro laŭ la <sup>45</sup>. La „sezono“ de la komercejo, kiu peras importon de kafo kaj aliaj eksterlandaj produktaĵoj, komenciĝas. Pro tio en la komercejo Schmidt & Co. vigla vivo regas. La <sup>9</sup> kuŝas sur la <sup>10</sup>, ĉe kiu nova <sup>8</sup> priparolas negocajn aferojn kun la <sup>7</sup>. Li ŝajnas esti kontenta kun la <sup>9</sup>. Ankaŭ la <sup>3</sup> havas multan laboron. Li, malantaŭ la <sup>20</sup>, denombrias grandajn kvantojn da <sup>22</sup>, kiujn li certe baldaŭ enmetos en la <sup>21</sup>, komparinte la rezultaton kun la nombroj de la kaslibro.

La <sup>4</sup>, antaŭ la <sup>13</sup>, en la fundo de la kontoro estas tre okupitaj, por noti la novajn mendojn en la <sup>24</sup>. Por la kalkulo ili uzas la <sup>19</sup>. La <sup>38</sup>, pendanta ĉe la <sup>13</sup>, estas la ilo, per kiu oni desegnas liniojn. La libroj mem ĉiunokte estas metataj en la <sup>23</sup>, kie ili estas ŝirmataj kontraŭ ŝtelistoj.

Ĉar la <sup>4</sup> dum la laboro bezonas helan lumon, multaj lampoj estas pendigitaj super la <sup>13</sup> kun helaj <sup>42</sup> kaj kun bone reflektantaj <sup>43</sup>. La lampoj per <sup>44</sup> povas esti tirataj pli alten aŭ pli malalten. La tuta kontoro estas heligata krom tio per <sup>41</sup>.

En la antaŭaĵo ni vidas la <sup>2</sup>, sinjoron Schmidt, kiu ĵus ricevis gravan <sup>33</sup>. Versajne li tuj vokos la <sup>5</sup>, por dikti al ŝi la respondon. Kiam (ĝi) urĝas, li iras al la <sup>40</sup> aŭ sendas telegramon, eble ankaŭ kablogramon al sia transmara liveranto helpe de la <sup>39</sup>. Intertempe li jam komisiis la <sup>6</sup>, kontroli en la <sup>27</sup>, ĉu la sendinto de la <sup>33</sup> jam antaŭe proponis liveraĵon. Kutime sro. Schmidt, respondinte <sup>33</sup>, signas ĝin per respondstampo. Por tio li bezonas la <sup>36</sup> kun la stampfarbujo. Poste la <sup>33</sup> estas metataj en la <sup>28</sup> kaj fine truataj per la <sup>35</sup> kaj kolektataj en la <sup>26</sup>, kiu staras en la <sup>25</sup>. La <sup>34</sup> de la respondita <sup>33</sup> la <sup>2</sup> kutime ĵetas en la <sup>15</sup>.

La liverantoj de ĉi tiu importkomercejo loĝas transmare. La marvetura societo, kiu peras la komercajn transportojn de sro. Schmidt, pendigis <sup>48</sup>, montrantan grandan velŝipon, kiel reklamilon en lia kontoro. La landojn, kun kiuj li komerce interrilatas, li ĉiam havas antaŭ siaj okuloj sur la <sup>47</sup> kaj sur la <sup>46</sup>.

### PAROLADOJ EN LA KONTORO:

*La <sup>2</sup> parolas:*

*Kun la <sup>7</sup>:* Ĉu la <sup>8</sup> estis kontenta kun la <sup>9</sup>? — Ĉu li mendis ion? — Ĝis kiam li volas ricevi la komercaĵojn? — Ĉu vi jam parolis kun nia urba vojaĝanto pri la mendo de la firmo N. N.? — Ne forgesu montri al sro. B., se li venos hodiaŭ, la plej novajn specimenojn! — Kiuj sendoj al Svedujo povas esti efektividigitaj ĝis la fino de ĉi tiu semajno? —

*Kun la <sup>4</sup>:* Se nia afero plue tiel progresos, ni baldaŭ bezonos novan kaslibron; ĉu vi jam mendis novan? — Ĉu inter la hodiaŭ ricevitaj monbiletoj vi trovis falsigitajn? — Ne pagu al nia liveranto N. en M. la tutan sumon; parto de la liveritaj komercaĵoj estis netaŭga. — Montru al mi la lastan tabelon de la pagoj ĉe la poŝteekoficejo. — Zorgu, por ke en la venonta semajno ni havu pli grandan nombron de malmultvaloraj <sup>22</sup>, ol dum la lasta pago de salajroj. — Kiu estis la kliento, kiu ĵus pagis ĉe vi? — Ĉu li pagis per kambioj? — Depost la komenco de nova monato pagu al nia <sup>6</sup> dek procentojn pli, ol la tarifo destinas. La junulo ŝajnas sukcesi; li estas kompleza kaj inteligenta.

*Kun la <sup>6</sup>:* Ĉu vi nun povas sufiĉe bone uzi la <sup>19</sup>? — Ĉu via instruigo progresas? — Ĉu vi nun povas informi vin sur la <sup>47</sup>? — Ĉu vi nun konas la veturliniojn de la novaj velŝiparangejoj? — Alportu al mi el nia <sup>27</sup> la slipojn sub litero M.! — Komparu tre atente la slipojn de nia kartoteko, ordigitajn laŭ lokoj kaj firmoj, antaŭ la enmeto. Se vi trovos kelkajn ne akordiĝantajn, diru tion al la <sup>4</sup>. — Zorgu, por ke mia <sup>11</sup> ĉiumatene estu bone ordigita, kaj por ke la <sup>29</sup>, la <sup>30</sup>, la <sup>31</sup>, la <sup>32</sup> kaj ĉiuj aliaj objektoj sur ĝi estu en bona ordo kaj sur ĝusta loko. Atentu ankaŭ tion, ke desur mia <sup>12</sup>, la <sup>14</sup> kaj ĉiuj kontormebloj la polvo estu forigata! —

*Kun la <sup>5</sup>:* Hodiaŭ mi devas dikti ankoraŭ multajn leterojn. Alŝovu iom vian <sup>17</sup>! Ne tuj skribu per la <sup>16</sup>; la klakado nervozigas min! — Faru kvar kopiojn sur la <sup>18</sup>, unu por la <sup>26</sup>, unu por la <sup>3</sup>, unu por la <sup>7</sup>, unu por mi! — Mendu telegramon per la <sup>40</sup>, sed atentu la kodovortojn, kiujn mi diktos!

# LA VINTRO. – LA MALSANULEJO <HOSPITALO>. LA TOMBEJO.



## *Vintra bildo.*

1. neĝo
2. glacio
3. glitŝuo
4. glitejo
5. neĝa bulo
6. neĝa viro
7. glitkuranto
8. glitveturilo
9. tintilaro

## *La malsanulejo.*

10. lito
11. malsanulo, paciento
12. kapuseno
13. kuracisto
14. flegistino
15. surlitaĵo
16. tableto
17. medikamentbotelo
18. glaso
19. kulereto

20. lambastono
21. brankardo
22. bankuvo
23. dentkuracisto
24. prenilo

29. monumento, tomba ŝtono
30. krado
31. ĉirkaŭtombo
32. kruco
33. tombfosisto
34. tombo
35. ĉerko
36. ĉerportistoj
37. pastro
38. funebrantoj

## *La tombejo.*

25. tombejo
26. funebra veturilo
27. mortintejo, kapelo
28. enirejo, portalo

# LA VINTRO.

Nia bildo montras vintran pejzaĝon. <sup>1</sup> kovras ĉie la teron, riveroj kaj riveretoj tute glaciĝis. Iia akvo fariĝis <sup>2</sup>. Sur ties glata supraĵo la <sup>7</sup> kvazaŭ flugas sur siaj brilaj <sup>3</sup>. Du viglaj knaboj formas el la floka <sup>1</sup> rondajn <sup>6</sup> kaj komencas gajan neĝbatalon, dum aliaj glitas piede sur la spegulbrila <sup>4</sup>, tenante la <sup>8</sup> en la manoj. Granda <sup>6</sup> staras sur la rando de la lageto. Sur la veturilvojo <sup>8</sup> venas rapide kun jungita ĉevalo kaj gaje sonanta <sup>9</sup>.



## LA MALSANULEJO.

Tiu ĉi bildo estas ne tiel gajiga, kiel la unua, ĉar tie ni vidis sanajn homojn vigle ludkurantajn en freŝa vintra aero. Ĝi montras ĉambron de granda malsanulejo, kiu estas hela kaj aera. Sed ĝi enhavas kelkajn malsanulojn, kiuj sopiras la resaniĝon. Unu el la <sup>11</sup> kuŝas en sia <sup>10</sup>, eble sentante grandajn dolorojn; li havas la lacan kapon sur la <sup>12</sup>. La <sup>13</sup> kontrolas la pulson kaj donas ordonojn al la <sup>14</sup>, kiu staras ĉe la <sup>10</sup>. Sur la <sup>16</sup> sin trovas <sup>17</sup>, krom tiu <sup>18</sup> kaj <sup>19</sup> por la medikamentoj. La malsanulo estas portata al la <sup>22</sup> kaj en la operacioĉambron sur la <sup>21</sup>; poste li devos iri helpe de <sup>20</sup> kaj fine li tute resaniĝos. <sup>23</sup> en alia ĉambro elprenas al <sup>11</sup> per la <sup>24</sup> dolorigantan, difektitan denton.

## LA TOMBEJO.

Kiu ne resaniĝas kaj mortas, estas metata en la <sup>35</sup> kaj veturigata en la <sup>36</sup> al la <sup>36</sup>. Tie la <sup>36</sup> levias la <sup>35</sup> desur la veturilo kaj portas ĝin tra la <sup>28</sup> en la <sup>27</sup> ornamitan per <sup>32</sup>. La <sup>37</sup> tie faras predikan alparoladon. Poste la <sup>38</sup> iras post la <sup>37</sup> kun la <sup>35</sup> al la malfermita <sup>34</sup>, kiun la <sup>33</sup> elfosis. Post la preĝo la <sup>35</sup> estas enterigata. La <sup>34</sup> estas fermata kaj ornamata per kronoj kaj palmoj. Kutime oni starigas <sup>32</sup> aŭ <sup>29</sup>, kiu informas pri la nomo de l'mortinto. En la <sup>31</sup> oni povas eniri tra malfermebla <sup>30</sup>.

## DEMANDOJ.

Kia sezono estas la vintro? — Ĉu la termometra hidrargo leviĝas aŭ malleviĝas dum frosta vetero? — Kial tiom multaj bestoj frostiĝas dum la vintro? — Kiel ni varmigas la ĉambrojn? — Kiel oni ŝirmas la kapon, la korpon, la manojn kaj piedojn kontraŭ malvarmo? — Per kiuj iloj oni povas gliti sur la glacio? (Glitŝuoj, glitveturiloj.) — Kiel oni povas iri sur la neĝo? (Neĝoŝuoj, skioj.) — Kio rezultas, kiam oni sin vestas nesufiĉe dum la vintro? (Nazkataro, influenco, tuso, frostotuberoj.) — Kie la malsanulo devas kuŝi en la malsanulejo? — Kion la kuracisto kaj la flegistino mezuras? (Temperaturo.) — Kie ili notas la febran staton? (Febrotabelo.) — Kion ili uzas por tiu ĉi celo? (Febrotermometro.) — Kion la kuracisto ordonas? (Banoj, kompresoj, dieto, klisteroj, injektoj.) — Kion oni donas al malsanulo, kiu ne povas dormi? (Dormigiloj, narkotikoj, kiel ekz. opion, morfinon, bromon ktp.) — Kion faras la dentkuracisto, por resanigi kaj konservi difektitajn dentojn? (Bori, elŝpruci, plombi per oraj, porcelanaj, amalgamaj plomboj.) — Per kio li anstataŭigas netaŭgajn aŭ mankantajn dentojn? (falsdentaro, stiftodentoj.) — Per kiuj arboj oni ornamas la tombojn kaj la tombejon? (Babilonaj salikoj, fraksenoj, rozoj.) — Kiu zorgas la tombejan ĝardenon? (La inspektoro, la ĝardenisto de l'tombejo.) — Je kiuj signoj oni ekkonas tombejon? (Enirejo kun kruco, monumentoj, tombaj ŝtonoj.)

## INTERPAROLADO EN LA MALSANULEJO.

Sinjorino : Mi volas enloĝigi mian filineton, kiu malsaniĝis je difterito.

Flegistino: Ni havas liton por ŝi en la barako por infektaj malsanoj; ĉu vi deziras flegadon de la dua aŭ unua klaso?

Sinjorino : La dua klaso ŝufiĉas; verŝajne ne estas permesite por mi, eniri la barakon.

Flegistino: Ne, tio estas malpermesita; mi petas vin antaŭpagi 75 frankojn en la oficejo; poste mi sendos la serviston, kiu levos la mal-

grandan malsanan knabinon el la veturilo kaj portos ŝin en la barakon.

Sinjorino : Ĉu la kuracisto ĉeestas?

Flegistino: Ne zorgu, sinjorino; la kuracisto kontrolas la akcepton kaj flegadon; la ĉefkuracisto ĉiutage kontrolas du aŭ trifoje. Li mem injektas la seron, se la febro kaj la danĝero pligrandiĝas, kaj mi prenas sur min la flegadon laŭ liaj ordonoj.

## INTERPAROLADO EN LA TOMBEJO.

Sinjoro : Kiel fartas fraŭlino via fratino; mi aŭdis, ke ŝi estas malsana.

Sinjorino: Mi estas tre malgaja. Mia fratino ne plu vivas. Antaŭhieraŭ ŝi mortis post longtempaj suferoj.

Sinjoro : Mi kondolencas korege. Mi jam timis tian sciigon, ĉar mi vidis vin funebre vestitan.

Sinjorino: Jes, ni tuj post la unuaj formalajoj mendis niajn funebrajn vestojn.

Sinjoro : Kiam la enterigo okazos?

Sinjorino: Morgaŭ posttagmeze; tiam estos la tria tago post la morto de mia fratino. Hieraŭ ni transportiĝis la mortintinon en la mortintejon de la ĉefpreĝeja tombejo. Tiu estas tre solena kaj inda loko; ni volas ornami la tombon per belaj rozoj kaj apude ni starigos benkon

# LA FARMOBIENO.



- |                                |                     |               |              |
|--------------------------------|---------------------|---------------|--------------|
| 1. vilaĝa domo                 | 16. boviro          | 32. saliko    | 48. hufo     |
| 2. stalo por ĉevaloj kaj bovoj | 17. trogo           | 33. kaprino   | 49. ŝafo     |
| 3. garbejo                     | 18. tirputo         | 34. fojno     | 50. ŝafido   |
| 4. pajla tegmento              | 19. meleagro        | 35. garbo     | 51. lageto   |
| 5. tegola tegmento             | 20. kokviro         | 36. bovino    | 52. anaso    |
| 6. ventoflago                  | 21. kokino          | 37. mamoo     | 53. anasido  |
| 7. cikonio                     | 22. kokido          | 38. korno     | 54. abelujo  |
| 8. nesto                       | 23. vilaĝanino      | 39. buŝo      | 55. abelo    |
| 9. kampulo, vilaĝano           | 24. kolombo         | 40. bovido    | 56. muso     |
| 10. ŝovĉareto                  | 25. kolombejo       | 41. vosto     | 57. rato     |
| 11. hundo, hundo ĉenita        | 26. kato            | 42. ĉasisto   | 58. ansero   |
| 12. hundodometo                | 27. vilaĝa servisto | 43. pafilo    | 59. aveno    |
| 13. kampoveturilo              | 28. falĉilo         | 44. ĉevalo    | 60. hordeo   |
| 14. porko                      | 29. fojnoforko      | 45. selo      | 61. sekalo   |
| 15. akvositelo                 | 30. plugilo         | 46. piedingo  | 62. tritiko  |
|                                | 31. greno           | 47. kondukilo | 63. trifolio |

## LA FARMOBIENO.

Somere en la granda bieno de mia amiko, ĉe kin mi travivas mian libertempon, la vivado estas tre agrabla. „Karo“, la <sup>11</sup>, salutas la alvenanton, laŭte bojante; ĝia <sup>12</sup> estas proksime de la <sup>2</sup>. En la malantaŭa parto de la korto oni vidas la <sup>1</sup>, sur kies <sup>5</sup> la <sup>7</sup> konstruis sian <sup>8</sup>. Ambaŭflanke estas <sup>2</sup> kaj <sup>3</sup>. Meze de la korto staras la <sup>18</sup> kaj antaŭ ĝi la <sup>17</sup> kun kelkaj <sup>15</sup>. Maldekstre de ĝi la <sup>25</sup> staras; la <sup>23</sup> logas la <sup>24</sup>, <sup>19</sup>, <sup>20</sup>, <sup>21</sup>, <sup>22</sup> kaj disĵetas grenojn por ili. En la antaŭa parto ni vidas la <sup>51</sup>; bela <sup>44</sup> kiu portas <sup>45</sup>, <sup>46</sup> kaj <sup>47</sup> staras kun siaj <sup>48</sup> en la refreŝiganta akvo, en kiu naĝas <sup>52</sup> kaj <sup>53</sup>. Diligenta <sup>55</sup> flugas gaje zumante. La <sup>27</sup> atendas antaŭ la malfermita pordego de la <sup>3</sup>, kiu estas kovrita per <sup>4</sup>. Li apogas sin sur sia <sup>28</sup>. Dekstre de li kuŝas la <sup>30</sup>. La <sup>26</sup> sidas proksime de la <sup>29</sup>, ludante. Certe ĝi baldaŭ ĉesos kaj kaptos la <sup>56</sup> kaj <sup>57</sup>. Gaje ni rimarkas la utilajn bestojn de la bieno, la <sup>36</sup> kun plena <sup>37</sup> kaj fortegaj <sup>38</sup>; ĝi rigardas sian <sup>40</sup>, kiu movas la <sup>41</sup>. Antaŭ la <sup>16</sup>, trinkanta el la <sup>17</sup>, mi vidas grasan <sup>14</sup>. La <sup>42</sup> kaj la <sup>9</sup> interparolas pri tio, ke oni baldaŭ buĉos ĝin, kaj ke estas necese, tondi la <sup>49</sup> kaj <sup>50</sup> tuj post la rikolto. La <sup>58</sup> krias. La <sup>34</sup> kaj <sup>35</sup> baldaŭ estos portataj en la <sup>3</sup>. La <sup>31</sup> estas matura kaj, se la <sup>6</sup> anoncos favoran venton, ĝi estos rikoltata. Sur la <sup>32</sup>, apud kiu la <sup>33</sup> estas, la <sup>55</sup> el la <sup>54</sup> zumas. La spikoj estas plenaj kaj pezaj, kaj la pajlo estas longa.

## DEMANDOJ.

Kiuj bestoj donas al ni lakton? Kiom ofte ili estas melkataj dum unu tago? Kiu melkas la bovinojn kaj kaprinojn? Kiel oni faras buteron kaj fromaĝon? Kiuj birdoj havas la plej bongustan viandon? Kiuj specoj de greno servas al la farado de pano? (Sekalo, hordeo, maizo). En kiu sezono oni semas? Kiamaniere oni preparas la teron por la semado? Kien oni transportas la rikoltitan grenon? Kie ĝi estas draŝata? Kiel? (Draŝilo, draŝmaŝino, lokomobilo.) Ĉu la brutaro dum la nokto restas sur la paŝtejo? Kie ili estas dum la malvarma vintro? Kiu helpas la bienmastron por gardi la korton, la kampojn, la arbarojn, la lagojn kaj lagetojn? (Inspektoro, arbaristo, ĉasisto, fiŝkaptisto.) Kiu tiras la plugilon, la erpilojn, la kampveturilon?

## KION ONI DIRAS KAJ FARAS.

Gasto (de la bienposedanto): Kiam la rikolto estos finita?

Bienposedanto: Mi esperas, post kelkaj tagoj; se la vetero restas tiel varmega kaj ne venos pluvo, ni baldaŭ povos enveturigi la lastajn sekalarbojn.

G.: Ĉu la rikolto estos kontentiga?

B.: En tiu ĉi jaro mi estas tre kontenta; ni restis sirmataj kontraŭ hajlo kaj granda sekeco.

G.: Kia la fojno estas?

B.: La lasta herba rikolto en la plej malseka herbejo estos falĉata nur post tri semajnoj; el la montaj herbejoj ni havas nemulte da fojno; sed ĝi estas tre seka kaj bonodora.

G.: Ĉu viaj laboristoj solene festas la finon de la rikolto?

B.: Ni ĉiujare havas gajan rikoltfeston; mi invitas vin jam hodiaŭ, ke vi vizitu la feston. La veturiloj okaze de la festo estos girdandataj, la junuloj kaj knabinoj ornamas sin kaj alportas al la diligenta mastrino kaj al mi rikoltan kronon, kiun ili prezentas antaŭ la ŝtuparo de mia domo, bondezirantaj.

G.: Ĉu tiam festeno aŭ muziko okazas?

B.: Niaj gelaboristoj estas regalataj per bonaj porkrostaĵoj kaj fruktoj el la fruktĝardeno. Post la festeno oni dancas sur la draŝejo aŭ en la gastejo.

G.: Tiam mi partoprenos tre volonte. Mi ĝojas partopreni je festo, per kiu oni rekompencas la diligentecon de la falĉistoj kaj falĉistinoj, de la servistoj kaj servistinoj. Ĉiu laboristo devas esti rekompencata laŭ sia merito.

# LA ĜARDENO.



- |                       |                  |                         |                 |
|-----------------------|------------------|-------------------------|-----------------|
| 1. herbobedo, herbaĵo | 17. anemono      | 33. galanto             | 49. groso       |
| 2. florbedo           | 18. citizo       | 34. filiko              | 50. persiko     |
| 3. vojo               | 19. siringo      | 35. dianto              | 51. abrikoto    |
| 4. rozujo             | 20. rozo         | 36. hiacinto            | 52. avelo       |
| 5. fontano            | 21. burĝono      | 37. kardo               | 53. juglando    |
| 6. arbogrupo          | 22. folio        | 38. trifolio            | 54. melono      |
| 7. arbetaĵo           | 23. dorno        | 39. lupolo              | 55. kukurbo     |
| 8. varmejo            | 24. lilio        | 40. frago               | 56. kukumo      |
| 9. ĝardenisto         | 25. violo        | 41. frambo              | 57. karoto      |
| 10. fosilo            | 26. trikoloreto  | 42. pomo                | 58. bulbo       |
| 11. verŝilo           | 27. konvalo      | 43. piro                | 59. terpomo     |
| 12. rastilo           | 28. papava floro | 44. ĉerizo              | 60. pizo        |
| 13. knabineto         | 29. cejano       | 45. (vin) traŭbo        | 61. ŝelo        |
| 14. nimfeo            | 30. krokuso      | 46. pruno               | 62. fabo        |
| 15. amaranto          | 31. tulipo       | 47. nigra ribo (kasiso) | 63. asparago    |
| 16. miozoto           | 32. eglanterio   | 48. ribo                | 64. florbrasiko |

# LA ĜARDENO.

Hodiaŭ matene mi iris en la malvarmetan, rososfreŝan ĝardenon, kiu estas malantaŭ nia kampodomo. Ĉar la arboj ĝis nun ne suferis pro frosto, ni rikoltas multe da <sup>42</sup>, <sup>43</sup>, <sup>44</sup> kaj <sup>46</sup>. Bedaŭrinde la tempo de la fruaj <sup>44</sup> jam pasis. La arbustoj estas tute plenaj de beroj; pro tio ni havos multajn <sup>39</sup>, <sup>41</sup>, <sup>47</sup>, <sup>48</sup>, <sup>49</sup>. Ankaŭ la vinberoj promesas bonan rikolton. La legomoj suferis iom kaŭze de la sekeco. Mi prenis la freŝajn <sup>63</sup>, <sup>60</sup>, <sup>62</sup> kaj malgrandan <sup>64</sup> por la tagmanĝo. Mi metis ilin sur la ĝardentablon kaj interparolis kun la <sup>9</sup>. Tiu ĉi fosis, en la <sup>1</sup>, la <sup>2</sup> per <sup>10</sup>, poste li rastis ĝin per la <sup>12</sup>, plantis <sup>34</sup>. <sup>24</sup>, <sup>19</sup>, <sup>18</sup> kaj superverŝis ilin per akvo el la <sup>11</sup>. Lia <sup>13</sup> ĵus venis el la <sup>8</sup>, kiu kuŝas apud densa <sup>6</sup>. Ŝi renkonte salutis min sur la <sup>3</sup>, ĝojis pri la ŝprucplaŭdo de la <sup>6</sup> kaj volis kolekti florojn por girlando. En la <sup>7</sup> ŝi jam trovis kelkajn <sup>27</sup>. Ni iris kune kaj kolektis <sup>17</sup>, <sup>19</sup>, <sup>25</sup>, krom tiuj flavajn <sup>28</sup>, <sup>21</sup> de la <sup>32</sup>, kiuj havas multajn <sup>23</sup>, ruĝajn <sup>20</sup>, du blankajn, bonodorajn <sup>24</sup>, kaj fine ni boatveturis, por preni kelkajn <sup>14</sup> kun longaj, profunde enradikiĝintaj tigoj. Dum ŝi kun la girlando ĝojegante kuris al la patrino, mi faris sur la herbejo kronon el <sup>26</sup>, <sup>29</sup>, <sup>15</sup> kaj sovaĝaj <sup>35</sup>. Mi vokis la knabinecon kaj sub la floranta <sup>4</sup> metis la kampofloran kronon sur ŝian buklan nigran hararon. Poste mi vizitis la bedojn kun <sup>54</sup>, <sup>55</sup>, <sup>58</sup> kaj rigardis la grandan, maljunan nuksarbon kun verdaj <sup>53</sup>, kiuj promesis bonajn fruktojn kaj dolĉajn kernojn, kiel la <sup>52</sup>.

*Kion faras la ĝardenisto dum la vintro?* — Li ordigas la semerojn, por ĝustatempe semi ilin en la ĝardeno. Li faras bastonojn por la floroj, branĉetaĵojn por la <sup>60</sup>, stangetojn por la <sup>62</sup>. Li hejtas la <sup>6</sup>, zorgas kaj superverŝas tie la florojn kaj kreskaĵojn kaj komencas prepari la sterkbedon. La <sup>9</sup> ankaŭ ĉarpentas la laŭbojn.

*Kial la ĝardenisto bezonas sterkajn bedojn?* — Tien li plantas ĉiujn legomplantojn, por ke ili donu bonan profiton, ekz. rafanetojn, salatplantojn, <sup>64</sup>, <sup>64</sup>, <sup>56</sup>. Krom tiuj li semas tien florsemojn, ekz. <sup>20</sup>, <sup>16</sup>, <sup>16</sup>, geraniojn, per kiuj li en la printempo ornamas la bedojn kaj balkonojn.

*Kion la ĝardenisto faras en la printempo?* — Li detranĉas la sekajn branĉojn kaj branĉetojn de la arboj, fosas la teron, sterkas ĝin kaj formas la <sup>2</sup>. En la kuireja ĝardeno li semas legomojn, ekz. <sup>57</sup>, li enmetas pizojn, <sup>58</sup>, <sup>59</sup>, purigas la <sup>40</sup>-bedojn, surŝprucigas kaj kalkas la fruktarbojn, por ekstermi la insektojn. Li plantas diversajn specojn de brasiko, tomatoj, semas petroselon, timianon ktp. Ĉiutage li dufoje aŭ trifoje prenas la blankan, delikatan asparagon.

*Kion la ĝardenisto faras dum la somero?* — Li serĉas raŭpojn kaj malutilajn skarabojn, sarkas la herbaĉon, hakas, prizorgas bonan akvon, verŝas per la verŝilo, ŝprucigas per la ŝprucigtubo, kolektas la maturajn berojn kaj <sup>44</sup>, verdajn <sup>60</sup>, elprenas la <sup>57</sup> el la tero. Por la tagmanĝo li liveras ankaŭ <sup>64</sup> kaj prenas desur la spaliroj la sukplenaĵojn <sup>50</sup>, <sup>51</sup>, <sup>46</sup> kiuj estas bonega deserto. Por fari bongustajn trinkaĵojn la mastro prenas la <sup>50</sup>, <sup>40</sup> kaj en la printempo la asperulon, kiu estas tre bonodora. La ĝardenisto enmetas burĝonantajn florojn en potojn kaj faras kronojn el <sup>20</sup>, <sup>35</sup>, rezedo, <sup>24</sup>, peonioj. Li zorgas pri puraj benkoj, seĝoj, tabloj en la ĝardeno.

*Kion faras la ĝardenisto dum la aŭtuno?* — Li rikoltas la fruktojn de la diversaj fruktarboj, la <sup>45</sup>; li supreniras la ŝtupetaron kaj deprenas <sup>43</sup>, <sup>42</sup> kaj <sup>46</sup> desur la arboj kaj deponas ilin, bone ordigitajn, en sekajj keleroj. Li faras asparagbedojn. Pro tio estas necese fosi profunden kaj sufiĉe sterki. Nur post tri jaroj oni povas kolekti manĝeblan asparagon el tiaj bedoj. La <sup>56</sup>, <sup>55</sup>, <sup>54</sup> estas detranĉataj; oni povas fari el ili salatojn, legomaĵojn, kompotojn. La ĝardenisto tiras la fragidojn el la tero kaj enplantas ilin denove, kovras la rozojn kaj kelkajn arbojn kaj vinberujojn per vergoj, por ŝirmi ilin kontraŭ noktaj frostoj, kaj li preparas la ĝardenon por la vintro.

## DIALOGO.

Infano : Sinjoro ĝardenisto, mi petas kelkajn hiacintbulbojn por mia patrino.

Ĝardenisto: Tie mi havas kelkajn, jam ĝermantajn en diversaj koloroj.

Infano : Ĉu oni plantas ilin en bedon en la ĝardeno?

Ĝardenisto: Donacu al via patrino glasojn por la hiacintbulboj. Ĉar ili jam ĝermas, ili certe baldaŭ kreskos kaj odoros en la glasoj.

Infano : La bulboj, kiujn ni manĝas, tre similas al tiuj ĉi.

Ĝardenisto: Ili apartenas al la familio de la bulbokreskaĵoj, kiel la <sup>33</sup>, la <sup>30</sup>, la <sup>31</sup>, la <sup>24</sup>.

Infano : Ĉu vi ankaŭ faras kronojn kaj girlandojn?

Ĝardenisto: Jes, mi faras ekz. kronojn el mirtoj. La fianĉinoj portas ilin sur la hararo okaze de la

edziĝfesto, ĉu ne? La kronoj, kiujn oni prezentas al gloraj viroj kaj artistoj, estas faritaj el laŭro. La kronojn por mortintoj oni faras el hedero, vinko kaj palm-branĉetoj.

Infano : Ĉu post kelkaj semajnoj vi havos berojn?

Ĝardenisto: Tiam mi certe havos belajn <sup>48</sup>, ruĝajn kaj verdetajn <sup>49</sup>. Mi vendos ilin tre volonte.

Infano : Permesu, ke mi foje mem deŝiru pizojn. Mia patrino elprenas la verdajn pizojn el la ŝeloj kaj kuiras ilin kune kun karotoj. Tion mi ŝatas manĝi.

Ĝardenisto: Nun mi donos al vi kelkajn narcisojn. Alportu ilin al sinjorino via patrino kaj salutu ŝin.

# LUDILOJ. - LUDOJ. - MUZIKO.



- |                     |                      |                     |                   |
|---------------------|----------------------|---------------------|-------------------|
| 1. saltludo         | 16. damo             | 31. vipo            | 46. klavoj        |
| 2. ringojatludo     | 17. fanto            | 32. turbo           | 47. tamburo       |
| 3. ringo            | 18. ŝaktabulo        | 33. ŝnureto         | 48. tamburbastono |
| 4. bastono          | 19. ŝakpeco          | 34. lud-aerostato   | 49. harpo         |
| 5. pilkobatludo     | 20. damludpeco       | 35. fajfilo         | 50. kordo         |
| 6. batilo           | 21. keglo            | 36. saltoŝnuro      | 51. trumpeto      |
| 7. pilko            | 22. kuglo            | 37. kuranta ringo   | 52. gitaro        |
| 8. ŝvebigilo        | 23. ludo per ĵetkubo | 38. flugludilo      | 53. kordostreĉilo |
| 9. balancilo        | 24. ĵetkubo          | 39. bilardo         | 54. harmoniko     |
| 10. stilzo          | 25. knarilo          | 40. bilarda tablo   | 55. violono       |
| 11. pulĉineloteatro | 26. klakilo          | 41. poŝo            | 56. arĉo          |
| 12. blindekaptado   | 27. pupo             | 42. pilko           | 57. fortepiano    |
| 13. kartludo        | 28. pilko            | 43. bilarda bastono | 58. muziklibro    |
| 14. aso             | 29. batilo kun pilko | 44. orgeno          | 59. pedalo        |
| 15. reĝo            | 30. arlekeno         | 45. orgena tubo     | 60. fajfilo       |

## LUDILOJ. – LUDOJ. – MUZIKO.

La plej bona amuzo post la laboro kaj dum la refresigaj horoj estas ludi kaj sporti. Sur la verdaj herbaĵoj proksime de la grandurbo, en privataj ĝardenoj, en gimnastikejoj kaj ludejoj la gejunularo povas sin ekzerci ludkurante.

Sur nia bildo du knaboj sin amuzas per <sup>1</sup>. Aliaj dum la <sup>2</sup> suprenĵetas la <sup>3</sup> kaj lerte reekprenas ilin per la <sup>4</sup>. Malgranda knabino levas la <sup>6</sup>, ĉar dum la <sup>5</sup> si bezonas ĝin, por bati la <sup>7</sup>. Knabeto svebas en la <sup>8</sup>. Du infanoj sidas sur la <sup>9</sup>. Antaŭ la granda arbo en la mezo de l' bildo knabo ekzercas sin irante sur la <sup>10</sup>. Malantaŭ la arbo oni povas vidi malgrandan pulĉinelon en la <sup>11</sup>. Dekstre de ĝi knabo kun tuko, kiu kovras la okulojn, provas kapti siajn kunludantojn. Tio estas la <sup>12</sup>. Ankoraŭ aliaj ludoj ekzistas. La junuloj tre ŝatas ludi laŭtenison kun <sup>20</sup>, ludi kun <sup>21</sup> kaj <sup>22</sup>. Tre ofte la infanoj havas <sup>32</sup>, kiun ili pelas per <sup>31</sup>, aŭ <sup>37</sup>. Aliaj ludiloj estas la <sup>34</sup> kaj <sup>38</sup>. Precipe la knabinoj uzas <sup>36</sup>.

<sup>35</sup>, <sup>25</sup>, <sup>26</sup> estas ludiloj, per kiuj la infanoj tre ofte ĝenas la pli aĝajn homojn. La <sup>30</sup> apartenas al la knabetoj, la <sup>27</sup> al la knabinoj.

Ludi per <sup>19</sup> kaj <sup>20</sup> sur la <sup>18</sup> jam estas pli malfacila tasko. Ludi per <sup>24</sup> estas hazarda ludo, ĉar ne estas necese, ion ajn pripensi dum tiu ĉi ludo. La opinioj pri la <sup>13</sup> estas tre kontraŭaj. Dum multaj homoj nomas ĝin enuiga kaj sensprita, aliaj regule kaj volonte ludas per kartoĵoj. La kvar pli supraj bildoj estas <sup>14</sup>, <sup>15</sup>, <sup>16</sup>, <sup>17</sup>. Kiam oni volas bilardi, oni bezonas <sup>43</sup>, per kiuj oni per forta puŝo movas la <sup>42</sup> sur la <sup>40</sup>.

Vespere muziki kun la familianoj prezentas grandan amuzon. En la ĉambro — anstataŭ la <sup>44</sup> kun <sup>45</sup> — harmoniumo sufiĉas aŭ <sup>57</sup>. Mia patro ludas ambaŭ instrumentojn tre bone kaj ĉiam parkere. Mi mem ĉiam bezonas <sup>58</sup>, por vidi la notojn. La <sup>46</sup> kaj <sup>59</sup> estas partoj de la fortepiano. — <sup>49</sup> kaj <sup>52</sup> estas instrumentoj kun kordoj, kiuj estas fiksitaj per <sup>53</sup> kaj estas ludataj nur per la fingroj. Por ludi la <sup>55</sup> oni bezonas <sup>56</sup>. La <sup>51</sup> kaj <sup>60</sup> estas blovinstrumentoj Ĉe ni la laboristoj dum siaj ekskursoj tre ŝatas la <sup>54</sup>.

## DEMANDOJ.

Kiujn ludojn vi preferas? Ĉu vi ŝatas kartludojn? Per kiuj ludoj la infanoj amuziĝas printempe kaj somere sur la strato? Sur la herbejo? Kiujn ili ludas aŭtune sur la kampoj? Per kiuj ludoj oni povas forpeli la enuon dum la vintraj vesperoj? Kiuj ludoj hodiaŭ estas modernaj kaj kiuj ne plu modernaj? Kion oni devas eviti dum la ludado? Kiel oni povas anstataŭigi la monerojn dumlude? Kiu nacio precipe ŝatas la sporton kaj la sportludojn? Kiujn ludojn viaj samlandanoj preferas?

## ŜAKLUDA INTERPAROLADO.

Sinjorino: Mi petas, blanka komencas.  
Sinjoro : La soldato avancas.  
Sino: Mi avancas per la ĉevalo.  
S<sup>o</sup> : Tiam mi prenas la kurieron.  
Sino: Estas via vico.  
S<sup>o</sup> : Mi movigas la turon.  
Sino: Gardu vian reĝinon!  
S<sup>o</sup> : Ĉu vi volas, ke mi prenu la vian?

Sino: Mi kredas, ke mi estos venkata; mi devas  
S<sup>o</sup> : Bona ideo! Sed vi perdos la damon! [aroki.  
Sino: Tiam mi prenos vian ĉevalon.  
S<sup>o</sup> : Tio ne ŝanĝos la situacion! Ŝak'!  
Sino: Vi gajnis! matul  
S<sup>o</sup> : Mi bedaŭras!  
Sino: Vi ludis bone. Vi venkis min tre baldaŭ:  
la ludo estis tre interesa.

# LA BIRDOJ.



1. aglo
2. vulturo
3. struto
4. pavo
5. krestplumoj
6. perdriko
7. vanelo *cajka*
8. fazano
9. gruo *siurav*
10. ardeo *cajka*

11. alaŭdo *shovr*
12. nesto *nesto*
13. najtingalo *shovr*
14. kanario *shovr*
15. pigo *shovr*
16. strigo *shovr*
17. pasero
18. korniko
19. papago
20. nizo *Krugulec*

21. hirundo *shovr*
22. kukolo *shovr*
23. mevo
- 24.flugilo *shovr*
25. sturno *shovr*
26. vosto
27. plumo
28. ungego
29. beko



## LA BIRDOJ.

La <sup>1</sup> kaj <sup>2</sup> estas rabobirdoj. Ili havas akrajn <sup>28</sup> kaj kurbajn <sup>29</sup>. La <sup>3</sup> ne flugas; ĝi povas kuri rapidege. Ĝiaj vostaj plumoj estas tre multekostaj. La <sup>4</sup> estas unu el la plej bele ornamitaj birdoj. Per siaj vostplumoj li povas fari grandan, multkoloran radon. <sup>11</sup> kaj <sup>13</sup> estas niaj plej bonaj kantbirdoj. La <sup>25</sup> regule anoncas la alvenon de l' printempo. La viando de la <sup>6</sup> kaj <sup>8</sup> estas tre bongusta. La <sup>22</sup> naskas siajn ovojn en la nestoj de aliaj birdoj, ĉar ĝi mem ne kovas. La <sup>9</sup> kaj <sup>10</sup> havas longajn kolojn. La <sup>16</sup> estas noktbirdo; ĝi loĝas en malnovaj domoj; nokte oni povas aŭdi ĝian blekadon. La <sup>17</sup> stelas ĉerizojn; ĉar ĝi estas tre elektema, ĝi nur prenas la plej bonajn desur la ĉerizarbo. La <sup>19</sup> kaj <sup>14</sup> estas eksterlandaj birdoj, kiuj ĉe ni estas en kaĝoj. La <sup>19</sup> povas imiti la homan voĉon, ankaŭ la <sup>25</sup>. La ovojn de la <sup>7</sup> estas tre ŝatata bongustaĵo.

### KION ONI DEVAS SCII.

*Kiuj birdoj sin ŝirmas per sia koloro?* — La perdriko, la alaŭdo, la struto. Iliaj plumoj similas la teron, sur kiu ili kovas. Per tio ili estas ŝirmitaj kontraŭ multaj danĝeroj, kiuj minacas ilin flanke de la homoj kaj bestoj.

*Kiuj estas tiuj ĉi danĝeroj?* — La ĉasi-to pafas ne nur la rabobirdojn, sed ankaŭ la perdrikojn, la fazanojn ktp.; la struto estas viva kaptata per lazo. La pli malgrandaj birdoj estas kaptataj per la pli grandaj.

*Kion la birdoj manĝas?* — Kelkaj manĝas grenerojn, ekz. la pavo, la perdriko, la fazano, la kanario, la papago. Aliaj nutras sin manĝante insektojn, ekz. la hirundo, la kukolo, la sturno; aliaj estas „karnivoraj“ t. e. manĝas viandon, ekz. la aglo, la vulturo, la gruo, la strigo, la mevo.

*Kiel la viraj kaj virinaj birdoj diferencas rilate sian plumaron?* — La viraj birdoj havas plumojn pli belajn, pli multkolorajn, ekz. la pavoviro brilas verde, blue, ore, dum la pavino havas nur grizan, malpompan plumaron. La birdviroj tre ofte kantas tre bone; la birdvirinoj loĝas kaj pepas nur per mallaŭtaj sonoj.

*Kiu estas la diferenco inter la birdoj kaj la mambestoj?* — Dum tiuj ĉi naskas vivajn idojn, la birdoj naskas ovojn, kiuj ankoraŭ devas esti kovataj, por ke la birdidoj naskiĝu. La birdoj havas nur du piedojn; ilia korpo estas plumizita. — Ili manĝas per la beko. Per siaj flugiloj ili povas flugi kaj flugpendi.

*Kiuj specoj de birdoj ekzistas?* — Ekz. oni parolas pri akvobirdoj; al ili apartenas la anaso, la ansero, la cigno. Ĉiu el tiuj ĉi tri familioj ankaŭ ekzistas en sovaĝa vivado. — Oni parolas ankaŭ pri migrantaj birdoj, al kiuj en niaj regionoj apartenas la hirundo, la alaŭdo, la cigno. La cikonioj faras la neston sur niaj tegmentoj. Ĉiujare ili ree trovas siajn antaŭjarajn nestojn, reveninte el Afriko.

*Kiu estas la reĝo inter la birdoj?* — La aglo estas la reĝo; li konstruas sian neston sur altaj rokoj en la montaro.

*Kie la najtingaloj kaŝas siajn nestojn?* — Plej ofte ili preferas arbitaĵon proksime de akvo, kie ili ankaŭ trovas sufiĉe da nutraĵoj.

*Kie la hirundoj, la perdrikoj nestiĝas?* — La hirundoj loĝas sub tegmentaj fenestroj kaj en staloj. Flugante ili preterpasas la teron, kiam la vetero estas malvarma, ĉar tiam la insektoj ne flugas alten. La perdrikoj kaj vaneloj ĝenerale loĝas meze de kampoj kaj herbejoj.

*Kie vivas la kanario?* — La kanario vivas en kaĝo ĉe la fenestro. — Estas necese, ke ĉiutage oni donu al ĝi freŝan akvon por sin bani kaj trinki.

*Kiujn sonojn la birdoj aŭdigas? (eligas).* — La cikonio klakas, la najtingalo flutas, la alaŭdo trilas, la kukolo vokas, la kokviro kokerikas, la korniko grakas, la pavo krias, la kokino klukas, la kanario kantas, la papago babilas, la sturno fajfas.

### INTERPAROLADO.

Sinjorino: Ĉu vi povas vendi al mi kelkajn belajn plumojn por ornami mian ĉapelon?

Vendisto: Jen mi havas ardeajn plumojn; por granda ĉapelo mi rekomendas al vi tiun ĉi blankan strutan plumon, kiu estas longa pli ol unu metron.

Sinjorino: Ne, mi dankas. Ĝi estos tro multekosta; mi nur volas ornami simplan vojaĝĉapelon.

Vendisto: Tiam mi rekomendas plumojn de fazanviro aŭ artefaritan flugilon.

# MAMBESTOJ.



1. leono
2. kolharoj
3. vosto
4. piedego (kun ungegoj)
5. tigro
6. faŭko
7. urso
8. simio
9. ŝakalo
10. lupo
11. elefanto
12. rostro

13. rinocero
14. ĝirafo
15. dromedaro
16. kamelo
17. ĝibo
18. zebro
19. azeno
20. alko
21. vulpo
22. rangifero
23. ĉamo
24. vesperto

25. mustelo
26. sciuro
27. apro
28. erinaco
29. melo
30. leporo
31. talpo
32. kuniklo
33. baleno
34. foko
35. kastoro

## MAMBESTOJ.

---

La reĝo de la bestoj estas la <sup>1</sup>. La belaj <sup>2</sup> estas kvazaŭ lia reĝa mantelo. La <sup>11</sup> havas longan <sup>12</sup> kaj du grandajn dentojn, kiuj liveras la eburon. La <sup>5</sup> estas tre danĝera rabobesto. Ĝi havas striitan felon. Ankaŭ la <sup>18</sup> havas tian. La <sup>7</sup> estas karnivora (t. e. viandon manĝanta) besto; sed ĝi ankaŭ satas la mielon de la abeloj. La <sup>15</sup> kaj <sup>16</sup> estas tre utilaj por la loĝantoj de la dezertaj regionoj. La <sup>15</sup> havas unu, la <sup>16</sup> du <sup>17</sup>. La <sup>14</sup> havas tre longan kolon. La <sup>8</sup> estas la besto, kiu plejmulte similas la homon. Ĝi tre bone scipovas suprenrampi la arbojn. La <sup>10</sup> kaj <sup>9</sup> apartenas al la familio de hundoj. Ili atakas ankaŭ la homojn, precipe kiam ili estas malsataj. La <sup>35</sup> havas tre valoran felon; ĝi vivas en la bordoj de riveroj. La <sup>34</sup> kaj <sup>33</sup> vivas en la maro. La <sup>33</sup> estas la plej granda mambesto. La <sup>22</sup> anstataŭas por la nordlandanoj la bovon. La <sup>21</sup>, la <sup>27</sup> kaj la <sup>25</sup> estas bestoj de niaj arbaroj. <sup>26</sup>, <sup>28</sup>, <sup>30</sup>, <sup>32</sup> kaj <sup>31</sup> estas mordetuloj. La <sup>30</sup> kaj <sup>32</sup> kuras tre rapide; la viando de la <sup>30</sup> estas tre bongusta.

La dombestoj estas tre utilaj kaj valoraj por la homoj. Al ili ankaŭ la <sup>19</sup> apartenas, kiu portas pezajn ŝarĝojn kaj tiras veturilojn. Tre ofte ĝi anstataŭas la ĉevalon kiel rajdbesto. En siaj hejmlandoj, en Afriko kaj Hindujo ankaŭ la <sup>16</sup> kaj la <sup>11</sup> estas helpantoj de la homo. Sed ankaŭ multaj sovaĝaj <sup>11</sup> ekzistas, kiujn oni ĉasas pro ilia eburo. La plej multaj bestoj sur nia bildo estas sovaĝaj bestoj, kiuj en libereco vivas en arbaroj, dezertoj, gungloj, stepoj. — La <sup>10</sup> kaj la <sup>21</sup> bojas kiel hundo, la <sup>9</sup> blekegas, la <sup>8</sup> krias, la <sup>18</sup> ĉevalblekas, la <sup>11</sup> trumpetas, la <sup>7</sup> murmuregas, la <sup>27</sup> gruntas.

---

*Ĉu la elefanto estas utila besto?* — La <sup>11</sup> tiras kaj portas la plej pezajn ŝarĝojn. Ĝi ankaŭ estas uzata kiel rajdbesto. Malproksime de sia naskiĝlando, en la grandurboj de Eŭropo ĝi estas ekspoziciata en la zoologiaj ĝardenoj. Tie ĝi amuzas la vizitantojn, precipe la infanojn, per sia lerteco kaj prudenteco.

*Kiamaniere la bestoj sin movas?* — La <sup>5</sup> saltas kiel kato, la <sup>1</sup> paŝas majestece, la <sup>30</sup>, la <sup>18</sup>, la <sup>14</sup> kuras, la <sup>8</sup> kaj la <sup>26</sup> suprenrampas la arbojn, la <sup>23</sup> supreniras la plej altajn rokojn, la <sup>31</sup> fosas, la <sup>33</sup> kaj <sup>34</sup> naĝas.

---

## DEMANDOJ.

Per kio elefanto sin defendas? (rostro) la rinocero? (korno) la leono? (ungegoj) la baleno? (vosto.) En kiu kontinento la tigro vivas? (Afriko, Azio.)

En kiu lando alko vivas? (Rusujo.) Kie oni ĉasas la ĉamojn? (montegaro.) Kiuj bestoj en Eŭropo estas tre oftaj? Kion manĝas la elefanto? (herboj, folioj, rizo), la leono? (viando), la sciuro? (nuksoj). Kia besto estas la sciuro? (vigla, ŝerca), la vulpo? (ruza), la kamelo? (persistema), la ŝakalo? (manĝegema), la foko? (prudenta kaj instruebla). Kion liveras la baleno? (fiŝoleo, barto.)

---

## LA PARTO DE LA LEONO.

Leono, vulpo kaj azeno ĉasis kune kaj kaptis cervon. Tiam la leono ordonis, ke la azeno dispartigu la ĉasaĵon. La azeno faris tri partojn; pro tio la leono koleriĝis kaj deŝiris la felon al la azeno tiel, ke li staris tute sangokovrita, kaj poste li ordonis, ke la vulpo dispartigu la ĉasaĵon. La vulpo ree kunmetis la tri partojn kaj donis ilin al la leono. Nun la leono ridis kaj diris: „Kiu instruis vin dispartigi tiel?“ La vulpo montris al la azeno dirante „Tie la magistro kun ruĝa bireto.“

# FIŜOJ. – REPTILIOJ. – KRUSTACOJ.



1. moruo  
2. naĝilo  
3. skombro  
4. ezoko  
5. salmo  
6. blanko  
7. soleo  
8. angilo

9. haringo  
10. skvamo  
11. platikareno (krabo)  
12. kankro  
13. salikoko  
14. omaro  
15. pinĉilo  
16. ostro

17. ŝelo  
18. konko  
19. testudo  
20. kiraso  
21. bufo  
22. rano  
23. krokodilo  
24. serpento

## FIŜOJ. — REPTILIOJ. — KRUSTACOJ.

La fiŝoj spiras per <sup>6</sup>; ili naĝas movante la <sup>2</sup>. La <sup>4</sup> estas fiŝo, kiu vivas en sensala akvo. La <sup>5</sup> havas karnon precipe belan, helruĝan. La <sup>8</sup> havas glatan korpon, kiu similas al <sup>24</sup>. La <sup>7</sup> estas plata fiŝo; ĝiaj ambaŭ okuloj kuŝas sur la sama korpflanko. La <sup>3</sup> havas brilantajn <sup>10</sup>. En multaj landoj la <sup>9</sup> estas ĉiutaga nutraĵo. Ĝi venas en sennombraj amasoj al la bordoj kaj tie estas kaptata. Ĝi estas salata kaj fumajata, antaŭ kiam ĝi estas vendata. La <sup>11</sup>, la <sup>12</sup>, la <sup>14</sup> estas krustacoj, kiujn oni manĝas. La <sup>16</sup> por multaj homoj estas bongustaĵo. La <sup>19</sup> estas ŝirmita per <sup>20</sup>. La <sup>23</sup> vivas en la riveroj de la pli varmaj landoj; ĝi atakas la homojn. La <sup>24</sup> ofte estas venenaj. Ili havas malplenajn vangodentojn, malantaŭ kiuj estas venenglandoj. La veneno povas mortigi homon ofte post tre mallonga tempo.

### INTERPAROLADO.

*Per kio la rano kaj la serpento sin nutras?* — La <sup>22</sup> manĝas muŝojn kaj malgrandajn papiliojn, araneojn kaj skarabojn; la <sup>24</sup> manĝas musojn, malgrandajn birdojn kaj bufojn.

*Kiu estas koloro de la moruo kaj ezoko?* — La <sup>1</sup> estas verdeta aŭ bruneta kun multnombraj makuloj kaj hela ventro; la <sup>4</sup> estas grizverda kun nigraj punktoj kaj hela ventro.

*Kiel oni kaptas la fiŝojn?* — Ili estas kaptataj aŭ per hokoj aŭ en retoj aŭ ankaŭ per harpuno. La harpuno estas lanco provizita per kontraŭhoko.

*Kion oni faras el konkoj?* — El la konkoj oni faras diversajn ornamaĵojn ekz.: butonojn, cindruojn ktp.

*Kiel la fiŝoj, vivantaj en sensala akvo, sekse pliiĝas?* — La fiŝvirinoj dum certaj tempoj naĝas proksimen de la bordo kaj tie naskas ovojn. La ovoj, kiujn oni nomas „fraĵo“, estas kovataj per la sunvarmo. La junaj fiŝoj estas ĉiam metataj en danĝeron per la grandaj fiŝoj kaj ankaŭ per la gruoj, cikonioj, mevoj kaj fiŝagloj.

*Kiel oni preparas la fiŝojn por ke ili fariĝu manĝeblaj?* — Oni ilin ricevas aŭ freŝajn aŭ salitajn. La freŝajn oni purigas forprenante la skvamojn kaj elprenante la intestojn; poste ili estas bakataj aŭ boligataj en bolanta akvo. La salitaj fiŝoj (kiel ekz. soleo, angilo, haringo) povas esti manĝataj tuj post la forpreno de la haŭto.

### DEMANDOJ.

Kie vivas la krokodilo? (Nilo.) Per kio ĝi fariĝas danĝera por la homo? Kien kankro sin movas? (Malantaŭen, „kankre“.) Per kiuj iloj ĝi defendas sin aŭ kaptas la rabaĵon? (Pinĉiloj.) Kiun koloron ĝi ricevas boligita? Kiu speco de ranoj bone anoncas la veteron? Kiel oni nomas la danĝeran serpenton, kiu estas tre ofta en la meza Eŭropo? (Peliado.) Ĉu vi konas eksterlandajn serpentojn, kiuj estas venenaj? Kiuj krustacoj estas satataj kiel bongustaĵoj kaj pro tio preparataj en la kuirejo? (Ostro, kankro, testudo.) Ili liveras bongustajn supojn bonajn saŭcojn ktp. Ĉu vere „drakoj“ ekzistas? (bestoj de krokodila tipo kun grandaj flugiloj.)

### KION ONI DEVAS SCII.

La krokodilo, kiu krias kiel infano kaj havas malmolan haŭton, estas vundebla nur je la ventro. La testudoj, kiam ili estas turnitaj dorsen, ne povas returni sin sen helpo. La ostroj, kies ŝeloj restas malfermitaj, ne plu estas freŝaj, kaj pro tio oni sin gardu, manĝi ilin. El la haŭto de la krokodilo oni preparas tre bonan ledon, el la kiraso de la testudo la testudŝelon, el la faŭkosto de la baleno la barton.

La rano kvakas, la serpento mordas aŭ pikas, la angilo trapas, la kankro pinĉas, la fiŝoj fraĵas, t. e. naskas ovojn.

# LA ARBARO.



- |                      |                          |                       |                                |
|----------------------|--------------------------|-----------------------|--------------------------------|
| 1. arbo              | 13. fago                 | 25. kokcino           | 37. lacerto <i>lacerto</i>     |
| 2. branĉo            | 14. hedero               | 26. muŝo              | 38. papilio <i>papilio</i>     |
| 3. branĉeto          | 15. betulo               | 27. serpento (aspido) | 39. flugilo <i>flugilo</i>     |
| 4. trunko            | 16. kverko               | 28. majskarabo        | 40. forfikulo <i>forfikulo</i> |
| 5. radiko            | 17. glano <i>glano</i>   | 29. anteno (palpilo)  | 41. akrido <i>akrido</i>       |
| 6. cigno             | 18. tilio <i>tilio</i>   | 30. limako            | 42. libelo                     |
| 7. lago              | 19. folio                | 31. limakdomo         | 43. piedo                      |
| 8. janko <i>sit</i>  | 20. kratago              | 32. cervino           | 44. kulo <i>kulo</i>           |
| 9. arbostumpo        | 21. araneo <i>araneo</i> | 33. cervo             | 45. pikilo                     |
| 10. knabo            | 22. araneaĵo             | 34. kornoj            | 46. fungo                      |
| 11. abio <i>abio</i> | 23. raŭpo                | 35. damcervo          |                                |
| 12. abifrukto        | 24. formiko              | 36. vipero            |                                |

# LA ARBARO.

## INTERPAROLADO.

- Ernesto : Frederiko, hodiaŭ la vetero estas bel-ega por iri en la arbaron. Venn do, ni volas iri por preni verdajn<sup>3</sup> por la patrino; ŝi ŝatas ilin.
- Frederiko: Tie apud la<sup>7</sup> bela<sup>13</sup> staras.
- Ernesto : Jen! hodiaŭ la<sup>6</sup> estas sur la<sup>7</sup>.
- Frederiko: Mi havas panon por manĝigi ilin. Ni sidu tien sur la<sup>9</sup>, tiam ili venos.
- Ernesto : Mi proponas, kolekti iom da<sup>8</sup>, por ornamo la ĉambron.
- Frederiko: Pst, silentu, Ernesto! Tie mi vidas aron da<sup>33</sup>. Mi opinias, ke venas<sup>32</sup> kaj<sup>33</sup> kun belegaj<sup>34</sup>.
- Ernesto : Bedaŭrinde ili jam rimarkis nin.
- Frederiko: Fil' ĵus mi piedpremis<sup>30</sup>; ĝi rampas tiom malrapide kun sia<sup>31</sup> sur la dorso.
- Ernesto : Frederiko, ne iru tro malproksimen en la densaĵon; tie estas tre multaj<sup>27</sup>, precipe venenaj peliadoj.
- Frederiko: Mi nur volas ankoraŭ detranĉi kelkajn branĉetojn el la<sup>16</sup> kaj<sup>15</sup>.
- Ernesto : Ĉu en tiu ĉi jaro vi jam vidis<sup>28</sup>?
- Frederiko: Jes, mia amiko jam alportis unu en la lernejon.
- Ernesto: Nun estas necese, ke ni iru hejmen; la suno jam malleviĝas.
- Frederiko: Baldaŭ la vespera ĉielruĝo aperos.

*Kia la foliaro estas en la printempo?* — Delikata, bonodora, helverda. En la somero? — Sukplena, malhelverda, unukolora. En la aŭtuno? — Multkolora, flava, bruna, ruĝa.

*Nomu al mi la partojn de la arbo!* — Per la<sup>5</sup> ĝi prenas la sukon el la tero. El la radikoj la<sup>4</sup> kreskas, kiu estas kovrita per ŝelo. La<sup>4</sup> disiĝas en<sup>2</sup> kaj<sup>3</sup>. Per la<sup>19</sup> la arbo spiras.

*Kial plaĉas al ni en la arbaro?* — En la varmega somero la arbaro donacas al ni refreŝigantan ombbron. La<sup>3</sup> de la<sup>1</sup> formas belan tegmenton, kiu ŝirmas kontraŭ la varmegaj sunradioj. Sur la mola musko oni povas ripozi post longa promenado. La bestoj de la arbaro bone distras nin. La sciuro gaje saltas de arbo al arbo serĉante<sup>12</sup> kaj<sup>17</sup>. La bela<sup>33</sup> kun imponaj<sup>34</sup> majestece paŝas tra la arbaro. La<sup>37</sup> kaŝas sin sub ŝtonetaro, kiam danĝero minacas. La brilantaj<sup>42</sup> flugas super la bordo de la<sup>7</sup> kaj trinkas mielon el floroj. En la<sup>8</sup> la vento murmuras. Cetere tie kvazaŭ dimanĉa kvieteco regas, nur tre malofte interrompita per pafo de la ĉasisto kaj bojo de la hundaro.

## DEMANDOJ.

Kiuj insektoj flugas en la arbaro? (Libeloj, muŝoj, papilioj, skaraboj.) Kiuj insektoj rampas sur la arbara musko? (Formikoj, skaraboj, raŭpoĵoj.) Per kio la arbaro utilas? Kiuj beroj kreskas en la arbaro? (Frambo, rubuso, mirtelo, vakcinio, frago.) Kiuj fungoj? (Morĥelo, kantarelo ktp.) Kiu pafas en la arbaro? (Ĉasisto.) Kiujn specojn de arboj oni diferencigas? (Arboj kun foliaro, arboj kun pingloj, „koniferoj“). Kion vi preferas, folian aŭ koniferan arbaron? Kion oni faras el la ligno de la arbotrunkoj? (Trabo, tabulo, meblo, hejtadmateriale.)

## DIALOGO.

*Ĉu mi povas preni tiun fungon?* — Ne, ĝi estas venena.

*Ĝi havas tiel belan, ruĝan koloron, kiel ĝi estas nomata?* — Estas la muŝamanito; kelkaj specoj de fungoj estas venenaj aŭ nemanĝeblaj.

*Mi volas ripozi sur la arbarmusko, ĉu estas permesate?* — Jes, tamen estu singardema! La verda mola musko ofte estas malseka, tie ofte ankaŭ serpentoj sin kaŝas.

*El kio la malsupraĵo de la arbaro konsistas?* — Filikoj tie etendas densaĵojn kune kun juniperoj, framboj, rubusoj.

*Kiu zorgas la arbaron kaj la bestojn en ĝi?* — La forstisto; li loĝas en la forstistodomo kaj zorgas la arbaron kaj ties ĉasaĵojn.

# LA NATURO.



- |              |                |               |                 |
|--------------|----------------|---------------|-----------------|
| 1. ĉielo     | 12. bordo      | 23. maro      | 34. flagrubando |
| 2. suno      | 13. monteto    | 24. ondo      | 35. kablo       |
| 3. sunradio  | 14. riverbordo | 25. vaporsipo | 36. boato       |
| 4. luno      | 15. rivero     | 26. flago     | 37. remilo      |
| 5. stelo     | 16. bordo      | 27. fumo      | 38. ĉielarko    |
| 6. nubo      | 17. ponto      | 28. velŝipo   | 39. pluvo       |
| 7. monto     | 18. balustrado | 29. direktilo | 40. fulmo       |
| 8. pinto     | 19. ŝtono      | 30. ferdeko   | 41. lorneto     |
| 9. horizonto | 20. sablo      | 31. kajuto    | 42. lorno       |
| 10. deklivo  | 21. bordo      | 32. masto     |                 |
| 11. roko     | 22. ŝtoneto    | 33. velo      |                 |



## LA NATURO.

K.: Ĉu vi volas veturi kun mi, mia <sup>36</sup> estas sur la akvo. Ni povas riski tion, ĉar la pluvo ĉesas.

M.: Jes, K., mi volonte akompanos vin. Certe estas belege sur la akvo.

K.: Kiom bela la <sup>23</sup> estas hodiaŭ. Rigardu, kiel la <sup>2</sup> lumas malantaŭ la malhelaj <sup>6</sup> kaj kolorigas la <sup>11</sup> per ruĝa ardo. Jen ankoraŭ <sup>38</sup>, sed la tondro jam preskaŭ ne aŭdiĝas. La <sup>23</sup> havas nur malgrandajn <sup>24</sup>. Ni rapidu iri al la

M.: Donu al mi la <sup>37</sup>! [bordo.]

K.: Bone, mi direktos la boaton.

M.: Al kiu apartenas tiu <sup>28</sup>, kiu tie ĉi haltas?

K.: Estas dana ŝipo, vi vidas la <sup>34</sup> super la <sup>33</sup>. Atentu, tie <sup>25</sup> venas rekte al ni.

M.: Kien ni volas veturi?

K.: Mi proponas, remi al la bordo malantaŭ la <sup>7</sup>. Antaŭ tri semajnoj mi vidis de tie belegan lunleviĝon. La argenta sfero malrapide supreniris la <sup>1</sup>. Unu <sup>5</sup> post la alia aperis, por saluti ĝin. Malfrue mi remis hejmen. La radioj de la <sup>4</sup> rebrilis el la ondoj kiel argenta rubando.

M.: Ĉu tie ventegoj estas oftaj?

K.: Jes, precipe en la printempo ili venas kun multe da pluvo. Ĉu vi povas vidi tiun malgrandan <sup>17</sup> super la <sup>15</sup>? Dum la lasta printempo ĝi estis detruita, ĉar la <sup>15</sup> enhavis tro multe da akvo.

*Vizitinte Norvegujon en la lasta somero, ĉu vi tien veturis per la fervojo? — Ne, ni veturis per <sup>25</sup>.*

*Vi neniam ĝis nun parolis al mi pri tiu ĉi vojaĝo; rakontu do iom! — Tre volonte. La ŝipveturado estis tre interesa. La unuan tagon ni havis belegan veteron. La <sup>3</sup> de la <sup>2</sup> brilis tiel forte, ke estis necese, serĉi ŝirmon sub etenditaj <sup>33</sup>. De tie ni havis vidon ravantan: la svedan bordon orumitan per <sup>2</sup>. La <sup>23</sup> estis grandioza, kiam la <sup>2</sup> mallevigis. — Oni ne povis imagi, ke terura nokto sekvis tiun pacan tagon. Ĉar, jam dormantaj en niaj <sup>31</sup>, ni estis vekataj per ekscitanta bruo. La <sup>25</sup>, ruliĝanta, tien kaj reen ĵetata per la <sup>24</sup>, ŝajnis ludilo de la <sup>24</sup>. Estis neeble por mi, resti kuŝanta. Terura marmalsano estis kaptinta min, kaj mi ne povis resti en la malvasta <sup>31</sup>. Mi rapide surmetis miajn vestaĵojn kaj supreniris sur la <sup>30</sup>. Sed, kia aspekto! La <sup>40</sup> seninterrompe heligis la nigran <sup>1</sup>, timindaj tondroj sekvis ilin, kaj la <sup>39</sup> pliiĝis la gravecon kaj malagrablecon de la situacio. De tempo al tempo <sup>40</sup> falis flanken de la <sup>25</sup> en la <sup>23</sup> kaj la bruo de la tondro, kiu sekvis ĝin, estis tiel fortega, ke oni ne povis aŭdi ion alian. La uragano daŭris du horojn, kiujn mi neniam forgesos, ĉar ili ŝajnis al mi daŭri eterne! Kaj miro! Du horojn poste la <sup>23</sup> estis denove glata kaj lumigita — nek per <sup>2</sup>, nek per <sup>40</sup> — sed nun la <sup>4</sup> kaj la <sup>5</sup> brilis, kaj la lumo de la luno estis tiom brila, ke oni bone vidis de malproksime la <sup>11</sup>, la konatajn norvegajn „fjordojn“, al kiuj la <sup>25</sup> alproksimiĝis tre rapide. Dum kelke da horoj la sama <sup>23</sup> kaj la sama <sup>1</sup> tute aliĝis. Tiu ŝanĝo estas la ĉarmo de la naturo.*

## ESPLOROJ DE LA MARO.

(ZAMENHOF.)

Profesoro Agassiz publikigis la rezultatojn de siaj esploroj pri la floro kaj faŭno de la Silenta Oceano. Kiel oni vidas el la raporto, vivaj kreitaĵoj ekzistas en la maro nur ĝis certa profundeco, nome ne pli malsupre ol 171 klaftoj sub la supraĵo de la akvo. Pli malsupre komenciĝas jam la regno de absoluta morto, kiu sin etendas ĝis la spaco trovanta sin en malproksimeco de 50—60 klaftoj de la fundo de la maro. Tie ĉi denove komencas montriĝi vivaj kreitaĵoj. Kompreneble, la konstruo de tiuj ĉi bestoj kaj maraj kreskaĵoj estas konformigita al la grandega pezo de la akvo, kiun tiuj ĉi kreitaĵoj devas porti sur si.

# FUNDAMENTA GRAMATIKO. \*)

## A. ALFABETO.

		Rimarkoj por:			
		Angloj	Francoj	Germanoj	Rusoj
A a	a	as in „last“	â	a	а
B b	b	as in „be“	b	b	б
C c	ts	as in „wits“	ts (tsar)	c, z	ц
Ĉ ĉ	ch	as in „church“	tch (tchèque)	tsch	ч
D d	d	as in „do“	d	d	д
E e	a	as in „make“	é	e	э
F f	f	as in „fly“	f	f	ф
G g	g	as in „gun“	g dur (gant)	g	г
Ĝ ĝ	j	as in „join“	dj (adjutant)	dsch	дж
H h	h	as in „half“	h (légèrement aspiré)	h	(г, х)
Ĥ ĥ	strongly aspirated h, „ch“ in „loch“ (scotch)		h (fortement aspiré)	ch	х
I i	i	as in „marine“	i	i	и
J j	y	as in „yoke“	y (veux)	j	й
Ĵ ĵ	z	as in „azure“	j	sh, j { (wie in „Journal“)	ж
K k	k	as in „key“	k	k	к
L l	l	as in „line“	l	l	л
M m	m	as in „make“	m	m	м
N n	n	as in „now“	n	n	н
O o	o	as in „not“	o	o	о
P p	p	as in „pair“	p	p	п
R r	r	as in „rare“	r	r	р
S s	s	as in „see“	ss, ç	ss	с
Ŝ ŝ	sh	as in „show“	ch (chat)	sch	ш
T t	t	as in „tea“	t	t	т
U u	u	as in „bull“	ou	u	у
Ŭ ŭ	u	as in „mount“ (used in diphtongs)	ou bref (dans l'alle- mand „laut“)	kurzes u	у
V v	v	as in „very“	v	w	в
Z z	z	as in „zeal“	z	s (wie in „lesen“)	з

Remark. If it be found impracticable to print work with the diacritical signs (^, ˇ), the letter h may be substituted for the sign (^), and the sign (ˇ), may be altogether omitted.

Remarque. Les typographies qui n'ont pas les caractères ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, peuvent les remplacer par ch, gh, hh, jh, sh, u.  
Anmerkung. ĝ lautet wie das englische „g“ in „gentleman“; ĵ — wie das französische „j“ in „journal“; u — wie das kurze „u“ in „glauben“ (wird nur nach einem Vokal gebraucht). Bei mangelnden Typen im Druck ersetzt man ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ durch ch, gh, hh, jh, sh, u.

Примѣчаніе I. Буква h произносится какъ h въ языкахъ нѣмецкомъ, латинскомъ и другихъ; буква ŭ (которая употребляется только послѣ гласной), произносится какъ короткое u въ нѣмецкомъ словѣ kaufen или въ латинскомъ laudo. Лица, не знающія никакой другой азбуки кромѣ русской, могутъ на первыхъ порахъ произносить h какъ русское х, а ŭ какъ русское у.

Примѣчаніе II. Типографин, не имѣющія буквъ ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ могутъ на первыхъ порахъ употреблять ch, gh, hh, jh, sh, u.

\*) En la „Fundamento“, [kiu enhavas la fundamentan gramatikon, la „Ekzercaron“ kaj la „Universalan Vortaron“], la gramatiko estas donita en kvin lingvoj (nome: angla, franca, germana, rusa, pola). Mi esperantigis ĝin por servi la celojn de nia libro. La alfabeton mi donas en la kvar ĉefaj lingvoj, por ke ĉiu havu la eblecon, kontroli sian elparoladon.  
La eldonanto.

## B. PARTOJ DE LA PAROLADO.

1. La difinita **artikolo** estas „la“, por ĉiuj seksoj kaj kazoj, por la singularo (ununombro) kaj la pluralo (multnombro).

Nedifinita artikolo ne ekzistas.

2. La **substantivo** ĉiam ricevas la finiĝon „o“. La pluralo ricevas la finiĝon „j“. Nur du kazoj ekzistas: nominativo kaj akuzativo, la akuzativo fariĝas el la nominativo, kiam oni aligas la finiĝon „n“. La ceteraj kazoj estas formataj per prepozicioj; la genitivo per „de“, la dativo per „al“, la ablativo per „kun“, aŭ aliaj prepozicioj, laŭ la senco.

Ekz.: La patr'o	la patr'o'j
de la patr'o	de la patr'o'j
al la patr'o	al la patr'o'j
la patr'o'n	la patr'o'j'n
kun la patr'o	kun la patr'o'j

3. La **adjektivo** ĉiam finiĝas per „a“.

La kazoj kaj nombroj estas markataj sammaniere kiel tiuj de la substantivo.

La **komparativo** estas formata helpe de la vorto „pli“, la **superlativo** helpe de la vorto „plej“.

La kompara partikolo de la komparativo estas „ol“, de la superlativo „el“. Ekz.: pli blank'a ol neg'o; mi hav'as la plej bel'a'n patr'in'o'n el ĉiu'j.

4. La **kardinalaj nombroj** (nedeklinacieblaj) estas jenaj:

unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil.

La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la nombroj; ekz. kvin'cent'-tri'-dek tri = 533.

Por havi la **ordinalajn nombrojn** oni aldonas al la kardinalaj la finiĝon „a“, ekz. „kvar'a“ — por havi la **multiplikativajn nombrojn** la finiĝon „obl“, ekz. „tri'obl'a“, por havi la **kolektivajn nombrojn** la finiĝon „op“, ekz. „du'op'e“, por havi la **frakciajn nombrojn**, la finiĝon „on“, ekz.: „kvar'on'o“ =  $\frac{1}{4}$ . Por formi la **distributivajn nombrojn** oni uzas la vorton „po“; ekz.: „po kvin“.

Krom tio oni povas uzi la kardinalajn vortojn substantive aŭ adverbe; ekz.: „unu'o“, „sep'e“.

5. La **pronomoj personaj** estas:

mi	ni	si (refleks.)
vi	vi	oni (senpersone).
li, ŝi, ĝi	ili	
(m.) (f.) (n.)		

Por formi **adjektivajn aŭ posesivajn pronomojn** oni aldonas la finiĝon de la adjektivo („a“).

La pronomoj estas deklinaciaj kiel la substantivo, ekz.: „mi'n mi'a, la vi'a'j, de vi, al ili.“

6. La **verbo** ne estas ŝanĝata, nek pro la personoj, nek pro la nombroj. Ekz.: „mi far'as“, „la patr'o far'as“, „ili far'as“.

Formoj de la verbo:

- a) La estanteco estas karakterizata per „as“  
(presento) ekz.: „mi far'as“.
- b) la estinteco „ „ per „is“  
(perfekto) ekz.: „li far'is“.
- c) la estonteco „ „ per „os“  
(futuro) ekz.: „ili far'os“.
- ĉ) la kondicionalo „ „ per „us“  
(kondiĉa formo) ekz.: „ŝi far'us“.

d) la imperativo estas karakterizata per „u“ (ordona formo)		ekz.: „far'u“.
e) la infinitivo	per „i“	ekz.: „far'i“.
f) la presenta participo de la aktiva formo	per „ant“	ekz.: „far'ant'a, far'ant'e“.
g) la perfekta participo	per „int“	ekz.: „far'int'a“.
ĝ) la futura participo	per „ont“	ekz.: „far'ont'a“.
h) la partic. pres. en la pasiva formo	per „at“	ekz.: „far'at'a“
ĥ) la partic. perf. en la pasiva formo	per „it“	ekz.: „far'it'a“
i) la partic. futura en la pasiva formo	per „ot“	ekz.: „far'ot'a“.

Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj helpe de la respondaj formoj de la vorto „est“ -- kaj de la pasiva participo de la donita verbo.

La prepozicio „de“ signifas la direkton, el kiu venas la agado; ekz.: „si est'as am'at'a de ĉiu'j.“

7. La **adverbo** finiĝas per „e“. La komparacio estas la sama kiel ĉe la adjektivo; ekz.: mi'a frat'o pli bon'e kant'as ol mi.
8. Ĉiu **prepozicio** regas la nominativon.

### C. ĜENERALAJ REGULOJ.

9. Ĉiu vorto estas legata tiel, kiel ĝi estas skribata.
10. Ĉiam la antaŭlasta silabo havas la akcenton.
11. Kunmetitaj vortoj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj, (la ĉefa vorto staras en la fino). (Ili estas skribataj en unu vorto, sed, en verkoj por komencantoj, disigataj per mallarĝa streko); ekz.: vapor'sip'o konsistas el „vapor“-„sip“-„o“ (substant. finiĝo).
12. Kiam en frazo jam enestas alia vorto, kiu havas negativan sencon, oni ne uzas la vorton „ne“; ekz.: „mi nenio'n vidis“.
13. Kiam vorto markas la lokon, kien oni iras, ĝi prenas la finiĝon de la akuzativo;
 

ekz.: kie vi estas?  
kie'n vi ir'as? — Pariz'o'n.
14. Ĉiu prepozicio havas certan konstantan signifon; sed, kiam la senco de la frazo ne tute klare montras, kiun prepozicion oni devas elekti, tiam oni uzas la prepozicion „je“, kiu ne havas memstaran signifon; ekz.: ĝoj'i je tio; rid'i je tio; enu'o je la patr'uj'o.

La lingva klareco ne malpliĝas pro tio, ĉar la sama afero okazas en ĉiuj lingvoj — oni uzas iun ajn prepozicion, se ĝi nur estas sankciita per la uzado. Tiukaze en la internacia lingvo oni uzas ĉiam nur la unu prepozicion „je“. Anstataŭ tiu prepozicio „je“ oni povas uzi la akuzativon ĉie, kie la senco pro tio ne malklariĝos.

15. Fremdaj vortoj, t. e. tiaj vortoj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el la sama fonto, en la internacia lingvo estas uzataj neŝanĝitaj; sed ili devas esti skribataj en internacia ortografio. Kiam en unu kategorio kelkaj diversaj vortoj venas el sama radiko, tiam estas preferinde, uzi sole la ĉefan vorton neŝanĝitan, kaj formi la aliajn vortojn laŭ la reguloj de la internacia lingvo; ekz. teatr'o, teatr'a — tragedi'o, tragedi'a.
16. La finiĝoj de la substantivo kaj artikolo povas esti eligataj kaj anstataŭataj per apostrofo. Ekz.: „Šiller“ anstataŭ „Šiller'o“; „de l'mondo“ anstataŭ „de la mondo“.

## HELPILOJ POR LA GRAMATIKA INSTRUADO.

### 1. Substantivo sen artikolo.

viro	viroj
de viro	de viroj
al viro	al viroj
viron	virojn

### 2. Substantivo kun artikolo.

la viro	la viroj
de la viro	de la viroj
al la viro	al la viroj
la viron	la virojn

### 3. Substantivo kun adjektivo sen artikolo.

granda viro	grandaj viroj
de granda viro	de grandaj viroj
al granda viro	al grandaj viroj
grandan viron	grandajn virojn

### 4. Substantivo kun adjektivo kun artikolo.

la granda viro	la grandaj viroj
de la granda viro	de la grandaj viroj
al la granda viro	al la grandaj viroj
la grandan viron	la grandajn virojn

## ALDONA TABELO

por la § 30 de la ekzercaro (vidu paĝon 93).

	-u personaj	-o nepersonaj	-a adjektivaj	-es posesivaj	-om kvanto	-e loko	-el maniero	-am tempo	-al kaŭzo
<b>ti-</b> montraj vortoj	ti-u	ti-o	ti-a	ti-es	ti-om	ti-e	ti-el	ti-am	ti-al
<b>ki-</b> rilataj aŭ deman- daj vortoj	ki-u	ki-o	ki-a	ki-es	ki-om	ki-e	ki-el	ki-am	ki-al
<b>i-</b> nedifinitaj vortoj	i-u	i-o	i-a	i-es	i-om	i-e	i-el	i-am	i-al
<b>ĉi-</b> komunaj vortoj	ĉi-u	ĉi-o	ĉi-a	ĉi-es	ĉi-om	ĉi-e	ĉi-el	ĉi-am	ĉi-al
<b>neni-</b> neaj vortoj	neni-u	neni-o	neni-a	neni-es	neni-om	neni-e	neni-el	neni-am	neni-al

## VERBO.

### La simplaj aktivaj formoj.

mi estas	mi estos	estu
mi amas	mi amos	amu
mi estis	mi estus	
mi amis	mi amus	

### La pasivaj formoj.

mi estas amata	mi estos amata
mi estas amita	mi estos amita
mi estas amota	mi estos amota
mi estis amata	mi estus amata
mi estis amita	mi estus amita
mi estis amota	mi estus amota

Formoj eblaj helpe de la vorto „esti“  
(kunmetitaj formoj.)

mi estas iranta	mi estos iranta
mi estas amanta	mi estos amanta
mi estas irinta	mi estos irinta
mi estas aminta	mi estos aminta
mi estas ironta	mi estos ironta
mi estas amonta	mi estos amonta
mi estis iranta	mi estus iranta
mi estis amanta	mi estus amanta
mi estis irinta	mi estus irinta
mi estis aminta	mi estus aminta
mi estis ironta	mi estus ironta
mi estis amonta	mi estus amonta

Por la komencantoj tute sufiĉas  
la jenaj formoj:

mi iras	mi amas
mi iris	mi amis
mi estis irinta	mi estis aminta
mi iros	mi amos
mi estos irinta	mi estos aminta
mi irus	mi amus
mi estus irinta	mi estus aminta

## NOMBROJ.

1 unu	4 kvar
2 du	5 kvin
3 tri	6 ses

7 sep	70 *sepdek
8 ok	80 okdek
9 naŭ	90 naŭdek
10 dek	100 cent
11 dekunu	200 ducent
12 dekdu	300 tricent
13 dektri	400 kvarcent
14 dekkvar	500 kvincent
15 dekkvin	600 sescent
16 deksex	700 sepcent
17 deksep	800 okcent
18 dekok	900 naŭcent
19 deknaŭ	1000 mil
20 dudek	2000 dumil
21 dudek unu	3000 trimil
22 dudek du ktp.	4000 kvarmil
30 tridek	100000 cent mil
40 kvardek	500000 kvincent mil
50 kvindek	1000000 miliono
60 sesdek	

## PREPOZICIOJ.

al	en	post
anstataŭ	ĝis	preter
antaŭ	inter	pri
apud	je	pro
ĉe	kontraŭ	sen
ĉirkaŭ	krom	spite
da	kun	sub
de	laŭ	super
depost	malgraŭ	sur
dum	per	tra
ekster		trans
el	por	

## KONJUNKCIOJ.

ankaŭ	eĉ	kvazaŭ
ankoraŭ	ja	nek - nek
aŭ.	ju - des	por ke
aŭ - aŭ	kaj	se
ĉar	kaj - kaj	sed
ĉu	ke	tamen
do	kiam	
dum	kvankam	

## INTERJEKCIOJ.

hal	hol	jen!	do!	fi!	hura!	vel!
-----	-----	------	-----	-----	-------	------

## PREFIKSOJ

bo	= prefikso	montranta personon, kun kiu oni parenĉigis per edziĝo.
dis	= „	esprimanta: meton, dividon, apartigon, forigon en diversajn flankojn.
ek	= „	esprimanta komencon de ago, montranta agon.
eks	= „	iama: sed ne estas plu.
ge	= „	por derivi nomojn esprimantajn ambaŭ seksojn kune, precipe edziĝan paron.
mal	= „	por derivi vortojn kun kontraŭa senco.
pra	= „	montranta personon aŭ objekton, kiu ekzistis antaŭ tre longa tempo aŭ kiu ekzistas de tre longa tempo.
re	= „	por derivi vortojn, esprimantajn venon al la loko, stato, de kiu oni foriris; ripeton.

## SUFIKSOJ.

ad	= sufikso,	esprimanta agon ripetitan aŭ longdaŭran.
aĵ	= „	por derivi nomon de objekto, afero farita el tio, devenanta de tio, kion esprimas la radiko.
an	= „	por esprimi membron, loĝanton, adepton.
ar	= „	esprimanta kolekton de objektoj, formantaj unu tuton.
ĉj	= „	por formi karesajn virajn nomojn; oni aligas ĝin al la 2—5 unuaj literoj de la nomo.
ebl	= „	esprimanta, ke io povas esti farata.
ec	= „	esprimanta abstraktan ideon de kvalito.
eg	= „	esprimanta pli altan, pli fortan gradon.
ej	= „	esprimanta lokon, destinitan por io.
em	= „	esprimanta inklinon, amon, kutimon al io.
er	= „	esprimanta ĉiun el la unuoj, malgrandaj partoj, elementoj, el kiuj konsistas tuto.
et	= „	esprimanta malaltigon, malfortigon de l' grado.
id	= „	por derivi nomojn kun la signifo: infano, filo, naskito.
ig	= „	por derivi vortojn kun la senco: fari ion ia; kaŭzi, ke io estu ia.
iĝ	= „	por derivi vortojn kun la neŭtra senco: esti farata io, esti farata iu.
il	= „	por derivi nomojn de l' objektoj, kiuj estas uzataj por plenumi agon, esprimantan de la radiko.
in	= „	por derivi de la viraj nomoj tiujn de la alia (virina) sekso.
ind	= „	por derivi vortojn kun la senco: kiu meritas, meritanta.
ing	= „	por derivi vortojn, esprimantajn objekton, en kiun oni enigas, fiksas ekstremon de alia objekto.
ist	= „	por derivi nomojn de la personoj, kies konstanta okupo, profesio, metio, specialo estas tio, kion esprimas la radiko.
nj	= „	por derivi virinajn karesajn nomojn.
uj	= „	por derivi: <ol style="list-style-type: none"> <li>1. nomon de objekto, de l' vazo servanta por porti, konservi la objektojn, esprimantajn de la radiko.</li> <li>2. nomon de l' arbo donanta la fruktojn, esprimantajn de la radiko.</li> <li>3. nomon de la lando, de l' popolo, esprimita de la radiko.</li> </ol>
ul	= „	por derivi nomojn de personoj aŭ estaĵoj, kiuj estas karakterizitaj per tio, kion esprimas la radiko.
um	= „	sen fiksita signifo por derivi vortojn, kies rilato al la radiko ne povas esti esprimita per aliaj afiksoj.

# EKZERCARO.

*Antaŭrimarko:* La ekzercaro de D.ro Zamenhof estas nepre necesa por ĉiuj komencantoj kaj la plej bona okazo, kontroli, kiamaniere nia majstro mem interpretis sian fundamentan gramatikon.

Se oni legos atente la ekzercaron, oni rimarkos, ke ĝi pritraktas la fundamentan gramatikon laŭ certa ordo, kiun mi signis per la surskriboj metitaj super la paragrafojn. [Tiu surskriboj ne estas ŝanĝo de la ekzercaro, sed nur volas plifaciligi ties uzadon.]

## § 1.

### Nomoj de la literoj.

A, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.

## § 2.

### Vortoj por ekzerci la legadon.

Al. Bá-lo. Pát-ro. Nú-bo. Cé-lo. Ci-tró-no. Cén-to. Sén-to. Scé-no. Sci-o. Kó-lo. O-fi-ci-ro. Fa-ci-la. Lá-ca. Pa-cú-lo. Ĉar. Ĉe-mi-zo. Ĉi-ka-no. Ĉi-é-lo. Ĉu. Fe-li-ĉa. Ĉia. Cia. Pro-cé-so. Sen-ĉé-sa. Ec. Eĉ. Ek. Da. Lú-do. Dén-to. Plén-di. El. En. De. Té-ni. Sen. Vé-ro. Fá-li. Fi-dé-la. Trá-fi. Gá-lo. Grán-da. Gén-to. Gip-so. Gús-to. Lé-gi. Pá-go. Lé-ĝo. Ĝis. Ĝús-ta. Ré-ĝi. Ĝar-dé-no. Lón-ga. Rég-no. Sig-ni. Gvar-di-o. Ling-vo. Ĝu-á-do. Há-ro. Hi-rún-do. Há-ki. Ne-hé-la. Pac-hó-ro. Ses-hó-ra. Bat-hú-fo. Hó-ro. Ĥó-ro. Kó-ro. Ĥo-lé-ro. Ĥe-mi-o. I-mi-ti. Fi-lo. Bir-do. Tró-vi. Prin-tém-po. Fo-i-ro. Fe-i-no. I-el. I-am. In. Jam. Ju. Jes. Ju-ris-to. Kra-jó-no. Ma-jés-ta. Tuj. Dó-moj. Ru-i-no. Prúj-no. Ba-lá-i. Pá-laj. De-i-no. Vėj-no. Pe-ré-i. Mál-plej. Jús-ta. Ĵus. Ĵe-ti. Ĵa-lú-za. Ĵur-ná-lo. Má-jo. Ba-ná-ĵo. Ká-po. Ma-kú-lo. Kés-to. Su-ké-ro. Ak-vo. Ko-ké-to. Lik-vó-ro. Pac-ká-po.

## § 3.

### Vortoj por ekzerci la legadon.

Lá-vi. Le-vi-lo. Pa-ró-li. Mem. Im-pli-ki. Em-ba-rá-so. Nó-mo. In-di-fe-rén-ta. In-ter-na-ci-a. Ol. He-ró-i. He-ro-i-no. Fój-no. Pi-a. Pál-pi. Ri-pé-ti. Ar-bá-ro. Sá-ma. Stá-ri. Si-gé-lo. Sis-té-mo. Pe-si-lo. Sén-ti. So-fis-mo. Ci-pré-so. Ŝi. Pá-ŝo. Stá-lo. Ŝtá-lo. Vés-to. Dis-ŝi-ri. Ŝan-cé-li. Ta-pi-ŝo. Te-o-ri-o. Pa-tén-to. U-ti-la. Un-go. Plú-mo. Tu-múl-to. Plu. Lú-i. Ki-u. Ba-lá-u. Tra-ú-lo. Pe-ré-u. Ne-ú-lo. Fráŭ-lo. Paŭ-li-no. Láŭ-di. Eŭ-ró-po. Tro-ú-zi. Ho-di-aŭ. Vá-na. Vér-so. Sól-vi. Zór-gi. Ze-ni-to. Zo-o-lo-gi-o. A-zé-no. Me-zú-ro. Ná-zo. Tre-zó-ro. Mez-nók-to. Zú-mo. Sú-mo. Zó-no. Só-no. Pé-zo. Pé-so. Ne-ni-o. A-di-aŭ. Fi-zi-ko. Ge-o-gra-fi-o. Spi-ri-to. Lip-há-ro. In-dig-ni. Ne-ni-el. Spe-gú-lo. Spi-no. Ŝpi-no. Né-i. Ré-e. He-ró-o. Kon-sci-i. Tra-e-té-ra. He-ro-é-to. Lú-e. Mó-le. Pá-le. Tra-i-re. Pa-si-e. Me-ti-o. In-ĝe-ni-é-ro. In-sék-to. Re-sér-vi. Re-zér-vi.

## § 4.

### Vortoj por ekzerci la legadon.

Citrono. Cento. Sceno. Scio. Balau. Ŝanceli. Neniel. Embaraso. Zoologio. Reservi. Traire. Hodiaŭ. Dissiri. Nenlo. Majesta. Packapo. Heroino. Pezo. Internacia. Seshora. Cipreso. Stalo.



Feino. Plu. Sukero. Gento. Indigni. Sigelo. Kraĵono. Ruino. Pesilo. Lipharo. Metio. Ĝardeno. Sono. Laŭdi. Pale. Facila. Insekto. Kiu. Zorgi. Ĉikano. Traetera. Sofismo. Domoj. Spino. Majo. Signi. Ec. Bonaĵo. Legi. Iel. Juristo. Ĉielo. Ĥemio.

### § 5.

#### La substantivo.

Patro kaj frato. — Leono estas besto. — Rozo estas floro, kaj kolombo estas birdo. — La rozo apartenas al Teodoro. — La suno brilas. — La patro estas sana. — La patro estas tajloro.

### § 6.

#### La substantivo.

Infano ne estas matura homo. — La infano jam ne ploras. — La ĉielo estas blua. — Kie estas la libro kaj la kraĵono? — La libro estas sur la tablo, kaj la kraĵono kuŝas sur la fenestro. — Sur la fenestro kuŝas kraĵono kaj plumo. — Jen estas pomo. — Jen estas la pomo, kiun mi trovis. — Sur la tero kuŝas ŝtono.

### § 7.

#### La substantivo.

Leono estas forta. — La dentoj de leono estas akraj. — Al leono ne donu la manon. — Mi vidas leonon. — Resti kun leono estas danĝera — Kiu kuraĝas rajdi sur leono? — Mi parolas pri leono.

### § 8.

#### La substantivo.

La patro estas bona. — Jen kuŝas la ĉapelo de la patro. — Diru al la patro, ke mi estas diligenta. — Mi amas la patron. — Venu kun la patro. — La filo staras apud la patro. — La mano de Johano estas pura. — Mi konas Johanon. — Ludoviko, donu al mi panon! — Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo — Antaŭ la domo staras arbo. — La patro estas en la ĉambro.

### § 9.

#### La substantivo.

La birdoj flugas. — La kanto de la birdoj estas agrabla. — Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki. — La knabo forpelis la birdojn. — Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj. — Bonaj infanoj lernas diligente. — Aleksandro ne volas lerni, kaj tial mi batas Aleksandron. — De la patro mi ricevis libron, kaj de la frato mi ricevis plumon. — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo. — Mi legas libron. — La patro ne legas libron, sed li skribas leteron.

### § 10.

#### La adjektivo (komparativo, superlativo).

Papero estas blanka. — Blanka papero kuŝas sur la tablo. — La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo. — Jen estas kajero de la juna fraŭlino. — La patro donis al mi dolĉan pomon. — Rakontu al mia juna amiko belan historion! — Mi ne amas obstinajn homojn. — Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! — Bonan matenon! — Ĝojan feston! (mi deziras al vi). — Kia ĝoja festo? (estas hodiaŭ). — Sur la ĉielo staras la bela suno. — En

la tago ni vidas la belan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn. — Lakto estas pli nutra ol vino. — Mi havas pli freŝan panon, ol vi. — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa ol mia. — El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna. — Mi estas tiel forta, kiel vi. — El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.

### § 11.

#### La feino.

(Unu) vidvino havis du filinojn. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.

### § 12.

#### La nombro.

Du homoj povas pli multe fari ol unu. — Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn. — Li promenas kun tri hundoj. — Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj. — El siaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj. — Kvin kaj sep faras dekdu. — Dek kaj dek faras dudek. — Kvar kaj dekok faras dudek du. — Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin. — Mil okcent naŭdek tri. — Li havas dek unu infanojn. — Sesdek minutojn faras unu horon, kaj unu minuto konsistas el sesdek sekundoj. — Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro la dek-unua, Decembro estas la dek-dua. — La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro. — La sepan tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses unuaj tagoj. — Kion Dio kreis en la sesa tago? — Kiun daton ni havas hodiaŭ? — Hodiaŭ estas la dudek sepa (tago) de Marto. — Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek du.

### § 13.

#### La feino (Daŭrigo).

Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis ŝian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti doman plenan grandan kruĉon.

### § 14.

#### La nombro.

Mi havas cent pomojn. — Mi havas centon da pomoj. — Tiu ĉi urbo havas milionon da loĝantoj. — Mi aĉetis dekduon (aŭ dek-duon) da kuleroj kaj du dekduojn da forkoj. — Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras miljaron. — Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin pro la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon. — Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (tio estas) dek frankojn. — Kvinoble sep estas tridek kvin. — Tri estas duono de ses. — Ok estas kvar kvinonoj de dek. — Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tiel du metroj kostas kvar kaj duonan frankon (aŭ da frankoj). — Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono aŭ tricent-sesdek-sesono de jaro. — Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope. — Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn. — Por

miaj kvar infanoj mi aĉetis dekdu pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomojn. — Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legas en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.

### § 15.

#### La feino (Daŭrigo).

En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki. „Tre volonte, mia bona,“ diris la bela knabino. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon el la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino: „Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon“ (ĉar [tio ĉi] estis feino, kiu prenis sur ŝin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino). „Mi faras al vi donacon,“ daŭrigis la feino, „ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta stono.“

### § 16.

#### La pronomo (persona).

Mi legas. — Ci skribas (anstataŭ „ci“ oni uzas ordinare „vi“). — Li estas knabo, kaj ŝi estas knabino. — La tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra. — Ni estas homoj. — Vi estas infanoj. — Ili estas rusoj. — Kie estas la knaboj? — Ili estas en la ĝardeno. — Kie estas la knabinoj? — Ili ankaŭ estas en la ĝardeno. — Kie estas la tranĉiloj? — Ili kuŝas sur la tablo. — Mi vokas la knabon, kaj li venas. — Mi vokas la knabinon, kaj ŝi venas. — La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi. — La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi. — Knabo, vi estas neĝentila. — Sinjoro, vi estas neĝentila. — Sinjoroj, vi estas neĝentilaj. — Mia hundo, vi estas tre fidela. — Oni diras, ke la vero ĉiam venkas. — En la vintro oni hejtas la fornojn. — Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn.

### § 17.

#### La feino (Daŭrigo).

Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. „Pardonu al mi, patrino“, diris la malfeliĉa knabino, „ke mi restis tiel longe.“ Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri diamantoj. „Kion mi vidas!“ diris ŝia patrino kun grandega miro. „Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj! De kio tio ĉi venas, mia filino?“ (Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin ŝia filino). La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj. „Se estas tiel,“ diris la patrino, mi devas tien sendi mian filinon. Marinjo, rigardu kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile.“

### § 18.

#### La pronomo (posesiva).

Li amas min, sed mi lin ne amas. — Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi. — Diru al mi vian nomon. — Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn. — Venu al mi hodiaŭ vespere. — Mi rakontos al vi historion. — Ĉu vi diros al mi la veron? — La domo apartenas al li. — Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato. — Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn). — Montru al ili vian novan veston. —

Mi amas min mem, vi amas vin mem, ili amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem. — Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem. — Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri ŝi kaj tute sin ne gardas. — Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo. — Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian. — Mi lavis min en mia ĉambro: kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro. — La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo. — Oni ne forgesas facile sian unuan amon.

## § 19.

### La feino (Daŭrigo).

„Estus tre bele,“ respondis la filino malĝentile, „ke mi iru al la fonto!“ — „Mi volas, ke vi tien iru,“ diris la patrino, „kaj iru tuj!“ La filino iris, sed ĉiam murmurante. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis (unu) sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki (tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino). „Ĉu mi venis tien ĉi,“ diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, „por doni al vi trinki? Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki.“ — „Vi tute ne estas ĝentila,“ diris la feino sen kolero. „Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano.“

## § 20.

### La verbo. Aktiva formo. (Ĉefaj tempoj, kondicionalo, imperativo, infinitivo.)

Nun mi legas, vi legas kaj li legas; ni ĉiuj legas. — Vi skribas kaj la infanoj skribas; ili ĉiuj sidas silente kaj skribas. — Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min. — Hodiaŭ estas sabato, kaj morgaŭ estos dimanĉo. — Hieraŭ estis vendredo, kaj postmorgaŭ estos lundo. — Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron. — Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? — Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos. — Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis. — Se mi estus sana, mi estus feliĉa. — Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi. — Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus. — Kial vi ne respondas al mi? Ĉu vi estas surda aŭ muta? — Iru for! — Infano, ne tuŝu la spegulon! — Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj! — Li venu, kaj mi pardonos al li. — Ordonu al li, ke li ne babilu! — Petu ŝin, ke ŝi sendu al mi kandelon. — Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa! — Ŝi volas donaci. — Morti por la patrujo estas agrable. — La infano ne ĉesas petoli.

## § 21.

### La feino (Daŭrigo).

Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: „Nu, mia filino?“ — „Jes, patrino,“ respondis al ŝi la malĝentulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon. — „Ho, ĉielo!“ ekkriis la patrino, „kion mi vidas? Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi por tio ĉi!“ — Kaj ŝi tuj kuris bati ŝin. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro. La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras. — „Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo.“

## § 22.

### La partícipo.

Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo, starante senmove. — Promenante sur la strato, mi falis. — Kiam Nikodemo batas Josefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Josefo estas la batato. — Al homo, pekinta senintence, Dio facile pardonas. — Trovinte pomon, mi ĝin manĝis. — La falinta homo ne povis sin levi. — Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem pli multe meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto. — La tempo pasinta jam neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas. — Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo. — En la lingvo „Esperanto“ ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo. — Aŭgusto estas mia plej amata filo. — Mono havata estas pli grava ol havita. — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota. — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj. — Li venis al mi tute ne atendite. — Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto.

## § 23.

### La feino (Fino).

La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis sin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas. Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, forkondukis ŝin al la palaco de ŝia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi. Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de ŝi; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volas ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro.

## § 24.

### La kunmetitaj tempoj. Uzado de „kiam“ kaj „se“.

Nun li diras al mi la veron. — Hieraŭ li diris al mi la veron. — Li ĉiam diradis al mi la veron. — Kiam vi vidis min en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron). Li diros al mi la veron. — Kiam vi venos al mi, li jam antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron). — Se mi petus lin, li dirus al mi la veron. — Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ se li estus dirinta al mi la veron). Kiam mi venos, diru al mi la veron. — Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (aŭ estu dirinta al mi la veron). Mi volas diri al vi la veron. — Mi volas, ke tio, kion mi diras, estu vera (aŭ mi volas esti dirinta la veron).

## § 25.

### La verbo — pasiva formo.

Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Mi estus amata. Estu amata. Esti amata. — Vi estas lavita. Vi estis lavita. Vi estos lavita. Vi estus lavita. Estu lavita. Esti lavita. — Li estas invitota. Li estis invitota. Li estos invitota. Li estus invitota. Estu invitota. Esti invitota. — Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi. — La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi. — Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita. — Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi. — Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ. — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi. — Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn. — Honesta homo agas honeste. — La pastro, kiu mortis

antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo. — Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? — Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono; el la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo; tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton.

## § 26.

### Prepozicioj. Konjunkcioj. Interjekcioj.

Kie vi estas? — Mi estas en la ĝardeno. — Kien vi iras? — Mi iras en la ĝardenon. — La birdo flugas en la ĉambro (— ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi). — La birdo flugas en la ĉambro (— ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin). — Mi vojaĝas en Hispanujo. — Mi vojaĝas Hispanujon. — Mi sidas sur la seĝo kaj tenas la piedojn sur benketeto. — Mi metas mian manon sur la tablon. — El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito. — Super la tero sin trovas aero. — Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo. — Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne. — En la salono estis neniu krom li kaj lia fianĉino. — La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj. — Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro. — Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro. — Li diras, ke mi estas atenta. — Li petas, ke mi estu atenta. — Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu vi estas feliĉa. — Se vi sciis, kiu li estas, vi lin pli estimus. — Se li jam venis, petu lin al mi. — Ho, Dio! kion vi faras! — Ha, kiel bele! — For de tie ĉi! — Fi, kiel abomene! — Nu, iru pli rapide!

## § 27.

### Pri la uzado de la difinita artikolo kaj pri kunmetitaj vortoj.

La artikolo „la“ estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Ĝia uzado estas tia sama kiel en aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa. Anstataŭ „la“ oni povas ankaŭ diri „l“ (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo). — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo. Ekzemploj: skribtablo aŭ skribotablo (— tablo, sur kiu oni skribas); internacia (— kiu estas inter diversaj nacioj); tutmonda (— de la tuta mondo); unutaga (— kiu daŭras unu tagon); unuataga (— kiu estas en la unua tago); vaporsipo (— ŝipo, kiu sin movas per vaporo); matenmanĝi, tagmanĝi, vespermanĝi; abonpago (— pago por la abono).

## § 28.

### Pri la uzado de la prepozicioj.

Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. Ekzemple: por esprimi direkton, mi aldonas al la vorto la finon „n“; sekve: tie (— en tiu loko), tien (— al tiu loko); tiel same ni ankaŭ diras: „la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon“, kaj la vortoj „ĝardenon“, „tablon“ staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj „en“ kaj „sur“ tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon „n“, tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. — Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon). — Mi restos hodiaŭ dome. —

Jam estas tempo iri domen. — Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren. — Flanken, sinjoro! — Mi konas neniun en tiu ĉi urbo. — Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas. — Mi renkontis nek lin, nek lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton).

#### § 29.

##### **Pri la prepozicio „je“ kaj pri la uzado de la akuzativo post verboj.**

Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion „je“. Sed estas bone uzadi la vorton „je“ kiel eble plej malofte. Anstataŭ la vorto „je“ ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ mi ridas lian naivecon). — Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon). — Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon). — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri „obei al la patro“ kaj „obei la patron“ (anstataŭ „obei je la patro“). Sed mi ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas; ekzemple: ni povas diri „pardoni al la malamiko“ kaj „pardonu la malamikon“, sed ni devas diri ĉiam „pardonu al la malamiko lian kulpon“.

#### § 30.

##### **La serio de pronomoj kaj adverboj ktp., kiujn oni povas fari el la plej simplaj elementoj (komparu la tabelon sur la 83a paĝo.)**

Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. — La montratajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj. Se ni aldonas al ili la literon „k“, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu. Se ni aldonas la literon „t“, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu. Aldonante la literon „ĉ“, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu. Aldonante la prefikson „nen“, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nential, neniama, nenie, neniela, nenies, nenio, nenioma, neniua. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi“, ni ricevas montron pli proksiman; ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi aŭ ĉi tiu (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime). Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn“ ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankaŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi tiea, tieulo, tiamulo ktp. (= kaj tiel plu).

#### § 31.

##### **La ĝusta uzado de la adverbo kaj adjektivo.**

Lia kolero longe daŭris. — Li estas hodiaŭ en kolera humoro. — Li koleras kaj insultas. — Li fermis kolere la pordon. — Lia filo mortis kaj estas nun malviva. — La korpo estas morta, la animo estas senmorta. — Li estas morte malsana, li ne vivos pli ol unu tagon. — Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable. — Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole. — Li estas bona parolanto. — Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo. — Li loĝas ekster la urbo. — La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno. — Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro. — Kia granda brulo! kio brulas? — Ligno estas bona brula materialo. — La fera bastono, kiu kuŝas en la forno, estas nun brule varmega. — Ĉu li donis al vi jesan respondon aŭ nean? — Li iris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron. — La birdo ne forflugis: ĝi nur

deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton. — Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero. — Lernolibron oni ne devas tralegi, sed tralerni. — Li portas rozokoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon. — En mia skribtablo sin trovas kvar tirkestoj. — Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj.

### § 32.

#### La uzado de „de“ kaj „da“.

Teatroamanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn. — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto. — Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem. — La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografajon al mia patro. — Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino. — Alportu al mi metron da nigra drapo (metro de drapo signifas metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo). — Mi aĉetis dekon da ovoj. — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo. — Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj. — Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn. — Sur la arbaro sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj. — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj. — En la ĉambro sidis nur kelke da homoj. — „Da“ post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.

### § 33.

#### La prefiksoj „mal“ kaj la sufikso „in“.

Mia frato ne estas granda, sed li ankaŭ ne estas malgranda: li estas de meza kresko. — Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo. — Haro estas tre maldika. — La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ ne antaŭ nia nazo. — Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola kiel ŝtono. — Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn. — Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estas naskita. — Mi forte malestimas tiun ĉi malnoblan homon. — La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove malfermis. — Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba. — La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversigos. — Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon. — Malamiko venis en nian landon. — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron. — La edzino de mia patro estas mia patrino kaj la avino de miaj infanoj. — Sur la korto staras koko kun tri kokinoj. — Mia fratino estas tre bela knabino. — Mia onklino estas bona virino. — Mi vidis vian avinon kun siaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino. — Lia duonpatrino estas mia bofratino. — Mi havas bovon kaj bovinon. — La juna vidvino fariĝis denove fianĉino.

### § 34.

#### La sufiksoj „il“ kaj „ar“.

La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon. — Ĉu vi havas korktirilon, por malstopi la botelon? — Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon. — Ŝi kombas al si la harojn per argenta kombilo. — En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo. — Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti. — Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas. — Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo. — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo. — En varmega



tago mi amas promeni en arbaro. — Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava. — Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo. — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron. — Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj.

### § 35.

#### La sufiksoj „aj“ kaj „ee“.

Vi parolas sensecaĵon, mia amiko. — Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo. — Akvo estas fluidaĵo. — Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon. — Sur la tablo staris diversaj sukeraĵoj. — En tiuj ĉi boteletoj sin trovas diversaj acidoj: vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj. — Via vino estas nur ia abomena acidaĵo. — La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta. — Mi manĝis bongustan ovaĵon. — Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto. — La alteco de tiu ĉi monto ne estas tre granda. — Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo. — Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo. — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo. — La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda. — Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco. — Lia heroeco tre plaĉis al mi. — La tuta supraĵo de la lago estis kovrita de naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj. — Mi vivas kun li en granda amikeco.

### § 36.

#### La prefiksoj „ge“, „bo“, „pra“ kaj la sufikso „id“.

Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj. — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj. — Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni. — Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn. — La gefianĉoj staris apud la altaro. — La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino. — Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj, sekve ŝia frato estas mia bofrato, ŝia fratino estas mia bofratino; mia frato kaj fratinoj (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino. — La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj. — Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino. — La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P. — Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo. — La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj. — La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo. — Ĉevalido estas nematura ĉevalo, kokido — nematura koko, bovido — nematura bovo, birdido — nematura birdo.

### § 37.

#### La sufiksoj „an“, „estr“, „ist“.

La ŝipanoj devas obei la ŝipestron. — Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnantoj. — Urbanoj estas ordinaraj pli ruzaj, ol vilaĝanoj. — La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo. — La Parizanoj estas gajaj homoj. — Nia provincestro estas severa, sed justa. — Nia urbo havas bonajn policianojn, sed ne sufiĉe energian policestron. — Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj. — Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj. — Li estas nelerta kaj naŭva provincano. — La loĝantoj de unu regno estas samregnantoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj. — Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro. — La botisto faras botojn kaj ŝuojn. — La lignisto vendas lignon, kaj la lignajisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn. — Ŝteliston neniu lasas en sian domon. — La kuraĝa maristo dronis en la maro. — Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn. — Ni havas diversajn servantojn.

kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston. — La riĉulo havas multe da mono. — Malsaĝulon ĉiu batas. — Timulo timas eĉ sian propran ombron. — Li estas mensogisto kaj malnoblulo. — Preĝu al la Sankta Virgulino!

### § 38.

#### La sufiksoj „et“, „eg“, „ĉj“, „nj“.

Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj. — En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj. — Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj, ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma. — En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj. — Li sidas apud la tablo kaj dormetas. — Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo. — Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton. — Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton. — Tio ĉi estis jam ne simpla pluvo, sed pluvego. — Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari. — Antaŭ nia militistaro staris granda serio da paflegoj. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo aŭ Vilĉjo aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo).

### § 39.

#### La sufiksoj „ig“ kaj „iĝ“.

En la kota vetero mia vesto forte malpurigis; tial mi prenis broson kaj purigis la veston. — Li paligis de timo kaj poste li ruĝigis de honto. — Li fianĉigis kun fraŭlino Berto; post tri monatoj estos la edziĝo; la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo, kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj. — Tiu ĉi maljunulo tute maŝaĝigis kaj infanigis. — Post infekta malsano oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo. — Forigu vian fraton, ĉar li malhelpas al ni. — Ŝi edzinigis kun sia kuzo, kvankam siaj gepatroj volis sin edzinigi kun alia persono. — En la printempo la glacio kaj la neĝo fluidiĝas. — Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana. — Li venigis al si el Berlino multajn librojn. — Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; unu tagon, promenante apud la reloĵ de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortigis. — Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendigis sur la branĉoj de la arbeto. — Sidigu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro! — La junulo aliĝis al mia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj.

### § 40.

#### La sufiksoj „ad“, „ej“, „uj“, „ing“.

En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn. — La pafado daŭris tre longe. — Mi eksaltis de surprizo. — Mi saltas tre lerte. — Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko. — Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin. — Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompigis. — Li kantas tre belan kanton. — La kantado estas agrabla okupo. — La diamanto havas belan brilon. — Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo. — La domo, en kiu oni lernas, estas la lernejo, kaj la domo en kiu oni preĝas, estas preĝejo. — La kuiristo sidas en la kuirejo. — La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon. — Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo; skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo; tubeto, en kiun oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo. — Skatolo, en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo, kaj bastoneto, sur kiu oni tenas plumon

por skribado, estas plumingo. — En la kandelingo sidis brulanta kandelo. — En la poŝo de mia pantalone mi portas monujon, kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon; pli grandan paperujon mi portas sub la brako. — La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo.

#### § 41.

##### La sufiksoj „ebl“, „ind“, „em“, „ec“, „er“.

Ŝtalo estas fleksebla, sed fero ne estas fleksebla. — Vitro estas rompebla kaj travidebla. — Ne ĉiu kreskaĵo estas manĝebla. — Via parolo estas tute nekomprenebla, kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble. — Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povas helpi al vi. — Li rakontis al mi historion tute nekredeblan. — Ĉu vi amas vian patron? Kia demando! kompreneble, ke mi lin amas. — Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn. — Li estas homo ne kredinda. — Via ago estas tre laŭdinda. — Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda. — Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema. — Li estas tre ekkolerema kaj ekscitigas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo; tamen li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas vengema. — Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas. — Centimo, pfenigo kaj kopeko estas moneroj. — Sablero enfalis en mian okulon. — Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto. — Unu fajrero estas sufiĉa, por eksplodigi pulvon.

#### § 42.

##### a) La prefiksoj „dis“, „re“; uzado de la vorto „moŝto“; la sufikso „um“.

Ni ĉiuj kunvenis, por preparoli tre gravan aferon; sed ni ne povis atingi ian rezulton, kaj ni disiris. — Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin. — Mi dissiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro. — Li donis al mi monon, sed mi ĝin tuj redonis al li. — Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi baldaŭ revenos. — La suno rebrilas en la klara akvo de la rivero. — Mi diris al la reĝo: via reĝa moŝto, pardonu min! — El la tri leteroj unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D. — La sufikso „um“ ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun „um“ oni devas lerni, kiel simplaj vortoj. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo. — Mi volonte plenumis lian deziron. — En malbona vetero oni povas facile malvarmumi.

##### b) Ekzemplo, kiamaniere oni povas formi el simpla radiko amason da novaj vortoj.

Sano, sana, sane, sani, sanu, saniga, saneco, sanilo, sanigi, saniĝi, sanejo, sanisto, sanulo, malsano, malsana, malsane, malsani, malsanulo, malsaniga, malsaniĝi, malsaneta, malsanema, malsanulejo, malsanulisto, malsanero, malsaneraro, sanigebla, sanigisto, sanigilo, resanigi, resaniĝanto, sanigilejo, sanigejo, malsanemulo, sanilaro, malsanaro, malsanulido, nesana, malsanado, sanulaĵo, malsaneco, malsanemeco, saniginda, sanilujo, sanigilujo, remalsano, remalsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsanulista ktp.

## TRI POEMOJ DE L. ZAMENHOFF.

### I.

#### LA ESPERO.

(Esperanto-himno.)

En la mondon venis nova sento,	Sub la sankta signo de l' espero
Tra la mondo iris forta voko;	Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Per flugiloj de facila vento	Kaj rapide kreskas la afero
Nun de loko flugu ĝi al loko.	Per laboro de la esperantoj.
Ne al glavo sangon soifanta	Forte staras muroj de miljaroj
Ĝi la homan tiras familion:	Inter la popoloj dividitaj;
Al la mond' eterne militanta	Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Ĝi promesas sanktan harmonion.	Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faras en konsento  
Unu grandan rondon familian.  
Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos,  
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
Por eterna ben' efektivigis.

### II.

#### LA VOJO.

Tra densa mallumo briletas la celo,	Nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankiĝante
Al kiu kuraĝe ni iras.	Ni iru la vojon celitan!
Simile al stelo en nokta ĉielo,	Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Al ni la direkton ĝi diras.	Traboras la monton granitan.
Kaj nin ne timiĝas la noktaj fantomoj,	L' espero, l' obstino kaj la pacienco
Nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj,	Jen estas la signoj, per kies potenco
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita	Ni, paŝo post paŝo, post longa laboro,
Ĝi estas, la voj' elektita.	Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,  
Pri l' tempoj estontaj pensante.  
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —  
Ni semas kaj semas konstante.  
„Ho, ĉesu!“ mokante la homoj admonas, —  
„Ne ĉesu, ne ĉesu!“ en kor' al ni sonas:  
„Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
Se vi pacience eltenos“.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj  
Velkantajn foliojn deŝiras,  
Ni dankas la venton, kaj repurigitaj,  
Ni forton pli freŝan akiras.  
Ne mortos jam nia bravega anaro,  
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro.  
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,  
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda konstante frapante,  
Traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco, —  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.

---

### III.

## PREĜO

(per kiu D<sup>ro</sup> Zamenhof finis sian alparoladon en la unua kongreso).

Al vi, ho potenca senkorpa mistero,  
Fortego, la mondon reganta,  
Al vi, granda fonto de l' amo kaj vero  
Kaj fonto de vivo konstanta,  
Al vi, kiun ĉiu malsame prezentas,  
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas.  
Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas,  
Hodiaŭ\*ni preĝas.

Al vi ni ne venas kun kredo nacia,  
Kun dogmoj de blinda fervoro:  
Silentas nun ĉiu disput' religia  
Kaj regas nur kredo de koro.  
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,  
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,  
Ni staras nun, floj de l' tuta homaro  
Ĉe via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,  
Sed ĝi sin dividis batale;  
Popolo popolon atakas kruele,  
Frat' fraton atakas ŝakale.  
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,  
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,  
Redonu la pacon al la infanaro  
De l' granda homaro!

Ni juris labori, ni juris batali,  
Por reunuigi l' homaron.  
Subtenu nin, forto, ne lasu nin fali,  
Sed lasu nin venki la baron;  
Donacu Vi benon al nia laboro,  
Donacu Vi forton al nia fervoro,  
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj  
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos:  
Ĝi signas la bonon kaj belon.  
La forto mistera de l' mondo nin benos,  
Kaj nian atingos ni celoz.  
Ni inter popoloj la murojn detruos,  
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos,  
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero  
Ekregos sur tero.

## PRI LA GENEZO DE NIA LINGVO.

(Eltiro el privata letero de L. Zamenhof al N. Borovko. Tradukita el la lingvo rusa.)

... La tuta publika historio de la lingvo, t. e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al vi plimalpli konata; cetere tiun ĉi periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi; mi rakontos al vi tial en ĝeneralaj trajtoj sole la historion de la naskiĝo de la lingvo.

Estos por mi malfacile, rakonti al vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis. La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infana tempo kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasis; mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris por ĝi kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.

Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de post mia naskiĝo kaj miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: Rusoj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi „doloro pro la mondo“ ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la „grandaĝaj“ posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.

Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ĉio ne fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentigis al la infano; unu post la alia mi forĵetis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉiu okazo sufiĉe frue; ĉe mi formiĝis la konscio ke la sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniun el la nun vivantaj nacioj. Kiam el la Bjelostoka reala lernejo mi transiris en la Varsovian gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de la lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturos en la tuta mondo kaj per flamaj paroloj inklinos la homojn, revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas neeble, kaj mi komencis malklare revii pri nova, arta lingvo. Mi ofte tiam komencis iajn provojn, elpensis riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn ktp. — Sed homa lingvo kun sia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun siaj centoj da miloj da vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tiel artifika kaj kolosa maŝino, ke mi ofte diris al mi: „for la revojn, tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj“, — kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

Germanan kaj francan lingvojn mi ellernis en la infanaĝo, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5a klaso de l' gimnazio, mi komencis lerni la lingvon anglan, la simpleco de la gramatiko surprizis min precipe dank' al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelis en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze min fordoni al mia revo. Sed la grandegaj vortaroj ne lasis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6a aŭ 7a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al surskribo „Ŝvejcarskaja“ (Trinkejo), kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo „Konditorskaja“ (Sukeraĵejo). Tiu ĉi „skaja“ ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiuja oni ne devas aparte ellerni. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

„La problemo estas solvita!“ diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikis nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn, kaj ĉiutage mi forĵetis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭante ĝin per unu sufikso, kiu signifas certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure „radikaj“ (ekz.: „patrono“, „mallarĝa“, „tranĉilo“ ktp.) povas esti facile transformitaj en vortojn „formitajn“ kaj malaperi el la vortaro. La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam skribis tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Tie ĉi mi diros ĝustatempe kelkajn vortojn pri la materialo por la vortaro. Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj elĵetis ĉion nebezonan el la gramatiko, mi deziris uzi la principojn de la ekonomio ankaŭ por la vortoj, kaj, konvinkita, ke estas tute egale, kian formon havos tiu aŭ alia vorto, se ni nur „konsentos“ ke ĝi esprimu la donitan ideon, mi simple „elpensis“ vortojn, penante ke ili estu kiel eble plej mallongaj kaj ne havu nebezonan nombron da literoj. Mi diris al mi, ke anstataŭ ia 11-litera „interparoli“ ni tute bone povas esprimi la saman ideon per ia ekz. 2-litera „pa“. Tial mi simple skribis la matematikan serion da plej mallongaj, sed facile elparoleblaj kunigoj de literoj kaj al ĉiu el ili mi donis la signifon de definitiva vorto (ekz. a, ab, ac, ad, . . . ba, ca, da, . . . e, eb, ec, . . . be, ce, . . . aba, aca . . . ktp.) Sed tiun ĉi penson mi tuj forĵetis, ĉar la provoj kun mi mem montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankaŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkigis ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandan provizon da pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia — kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli malpli preta, kvankam inter la tiama „lingwe uniwersala“ kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kunlernantoj (mi estis tiam en la 8a klaso de la gimnazio). La plimulto da ili estis forlogitaj de la ideo kaj de la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin lerni. La 5an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la ekvivigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni etuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

Malamikete de las nacjes  
Kadó, kadó, jam temp' está!  
La tot' homoze in familje  
Konunigare so debá

(En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: „Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en unu devas unuiĝi familion“).

Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj en la nova lingvo.

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5—6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de la 5/17a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri „nova lingvo“ kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5<sup>1</sup>/<sub>2</sub> jaroj de mia estado en la universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝi miajn pensojn kaj planojn mi preskaŭ nenien iris, en nenio partoprenis, kaj la plej bela tempo de la vivo — la jaroj de studento — pasis por mi plej malgaje. Mi provis ifoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo kaj foriris, kaj de tempo al tempo faciligis mian koron per ia versaĵo en la lingvo prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj „Mia penso“ mi metis poste en la unuan broŝuron eldonitan de mi; sed al la legantoj, kiuj ne scias, en kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ekŝajnis stranga kaj nekomprenebla.

Dum ses jaroj mi laboris perfektigaute kaj provaute la lingvon, — kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi jam ŝajnis, ke la lingvo estas tute preta. Mi multe tradukis en nian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio „je“, la elasta verbo „meti“, la neŭtrala, sed difinita finiĝo „aŭ“ ktp. kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz. mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn. En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas por la lingvo sufiĉe, havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribis nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas; sed la praktiko ĉiam pli kaj pli konvinkis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan ion, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan spiriton. (La nescio pri la spirito de la lingvo estas la kaŭzo, ke kelkaj esperantistoj, tre malmulte legintaj en la lingvo Esperanto, skribas senerare, sed per multepeza, malagrabla stilo, — dume la esperantistoj pli spertaj skribas per stilo bona kaj tute egala, al kiu ajn nacio ili apartenas. La spirito de la lingvo sendube kun la tempo multe, kvankam iom post iom kaj nerimarkite, ŝanĝiĝos; sed se la unuaj esperantistoj, homoj de diversaj nacioj, ne rekontus en la lingvo tute difinitan fundamentan spiriton, ĉiu komencus tiri en sian flankon kaj la lingvo restus eterne, aŭ almenaŭ dum tre longa tempo, malgracia kaj senviva kolekto da vortoj). — Mi komencis tiam eviti laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte pensi en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj jam ĉesis esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevis sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran, difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo jam mem fluis flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: „Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo“. Sed ĉar la „mondo“ ne estas ebla sen antaŭaj apartaj „unuoj“, la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam ĝia utileco fariĝos por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu la lingvo jam estas akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensadis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, — kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu, kaj donas al tute nedediĉita adresato la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la ŝlosilon, — alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia „ŝlosilo“, kiu, enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabeto ordigitaj elementoj, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio, tuj kompreni vian leteron.

Mi finis la universitatstudojn kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi ekpensis jam pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro („D<sup>ro</sup> Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro“) kaj komencis serĉi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la financan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj laste — rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ ĉio ĉi; mi sentis, ke mi staris antaŭ Rubikono kaj de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi ne havos plu la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, t. e. homon, kiu sin okupas je „flankaj aferoj“; mi sentis, ke mi metis sur nur unu karton la tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian kapon kaj saŭgon kaj . . . mi transiris Rubikonon.



Estas necese, ke ĉiu Esperantisto sciu ion pri la

## INTERNACIA SISTEMO POR MONAJ VALOROJ.

La alpreno de internacia mono estas urĝa, precipe ĉe la Esperantistoj. Ne estas necese, ke ekzistu realaj moneroj de la proponata mono internacia; monunuo teoria kaj artefarita tute sufiĉas.

Tiujn, kiuj volas instrui sin pli detale pri ĉi tiu afero, mi atentigas pri la broŝuro, kiun René de Saussure kribis „Projekto pri internacia monsystemo“. (Internacia Scienca Revuo 4a Jaro Majo 1907).

Tie sufiĉas resumi, ke oni proponis (kaj por la praktikaj aferoj de la Esperantistoj jam akceptis kaj uzis):

du praktikajn unuojn (la spesmilo kaj la spesdeko) tiajn ke:

1 Spesmilo = 100 spesdekoj (1 Sm. = 100 Sd.)

kaj unu teorian unuon (la speso) tian ke:

1 Spesmilo = 1000 spesoj (1 Sm. = 1000 S.)

1 Spesdeko = 10 spesoj (1 Sd. = 10 S.)

Kaj oni fiksas la teorian valoron de la speso per la valoro de la spesmilo, kiu estas tiamaniere elektita, ke ĝi egalvaloras kiel eble plej proksime la diversajn naciajn unuojn aŭ iliajn oblojn.

Jen tabelo, kiu montras la valoron de la diversaj naciaj monunuoj rilate la internacian:

1 Spesmilo	= 2.5260	frankoj	Latina unuiĝo (= Svisujo, Francujo,
1 „	= 2.5260	„ liroj	Belgujo, Italujo,
1 „	= 2.5260	pesetoj	Hispanujo.)
1 „	= 0.1001548	liv. st.	} Anglujo
1 „	= 2.0031	silingoj	
1 „	= 24.037	pencoj	} Usono
1 „	= 0.4875	dolaroj	
1 „	= 2.0461	markoj	Germanujo
1 „	= 2.40	kronoj	Aŭstrujo
1 „	= 0.974	rubloj	Rusujo
1 „	= 1.82	kronoj	Skandin.
1 „	= 1.21	floretoj	Holando
1 „	= 0.450	milrejsoj	Portugalo
1 „	= 2.5260	drakmoj	Grekujo
1 „	= 2.5260	lejoj	Rumanujo
1 „	= 2.5260	dinaroj	Serbujo
1 „	= 2.5260	levoj	Bulgarujo
1 „	= 0.505	pesoj	Argentino, Kolumbio, Uruguajo
1 „	= 0.893	milrejsoj	Brazilujo
1 „	= 0.679	pesoj	Ĉilio
1 „	= 0.308	taĉloj	Ĥinujo
1 „	= 0.09715	Eg. liv.	Egiptujo
1 „	= 9.715	piastroj	Egiptujo
1 „	= 1.031	rupioj	Hindujo
1 „	= 0.979	jenoj	Japanujo
1 „	= 0.495	pesoj	Meksikujo
1 „	= 0.2832	tomanoj	Persujo
1 „	= 0.505	sunoj	Peruo
1 „	= 0.10983	Turk. liv.	Turkujo
1 „	= 10.983	piastroj	Turkujo
1 „	= 2.5260	bolivaroj	Venezuelo

Kiam vi volas aliformigi internacian monvaloron en nacian, sufiĉas la jena tabelo:  
(mi citas nur la plej grandajn ŝtatojn.)

Spesmiloj:	Latina Unuiĝo frankoj:	Granda Britujo ŝilingoj:	Germanujo markoj:	Usono dolaroj:	Rusujo rubloj:	Aŭstrujo kronoj:
1	2.53	2	2.05	0.49	0.95	2.40
10	25.26	20.03	20.46	4.88	9.47	24.05
20	50.52	40.06	40.92	9.75	18.94	48.10
30	75.78	60.09	61.38	14.62	28.41	72.16
40	101.03	80.12	81.84	19.49	37.88	96.21
50	126.30	100.15	102.30	24.37	47.35	120.26
60	151.55	120.18	122.76	29.24	56.82	144.32
70	176.81	140.21	143.22	34.12	66.29	168.37
80	202.07	160.24	163.68	38.99	75.76	192.42
90	227.33	180.27	184.14	43.86	85.23	216.48
100	252.59	200.30	204.60	48.74	94.72	240.53

Kiam vi volas aliformigi nacian monvaloron en internacian komparu la jenan tabelon:


	frankoj: Latina Unuiĝo	ŝilingoj: Anglujo	markoj: Germanujo	dolaroj: Usono	rubloj: Rusujo	kronoj: Aŭstrujo
1	0.40 Sm.	0.50 Sm.	0.49 Sm.	2.05 Sm.	1.06 Sm.	0.415 Sm.
10	3.96 „	4.99 „	4.89 „	20.52 „	10.56 „	4.16 „
20	7.92 „	9.99 „	9.78 „	41.04 „	21.12 „	8.13 „
30	11.88 „	14.98 „	14.67 „	61.55 „	31.68 „	12.47 „
40	15.84 „	19.97 „	19.55 „	82.07 „	42.24 „	16.63 „
50	19.80 „	24.96 „	24.44 „	102.59 „	52.79 „	20.79 „
60	23.76 „	29.95 „	29.33 „	123.11 „	63.35 „	24.94 „
70	27.72 „	34.94 „	34.21 „	143.62 „	73.91 „	29.10 „
80	31.68 „	39.94 „	39.22 „	164.14 „	84.47 „	33.26 „
90	35.64 „	44.93 „	44.01 „	184.66 „	95.02 „	37.42 „
100	39.59 „	49.92 „	48.88 „	205.18 „	105.58 „	41.57 „

## ĈIU ESPERANTISTO

atentu la jenajn vortojn (per kiuj D<sup>ro</sup> Zamenhof finas la antaŭparolon de la „Fundamento“):

1. pro la unueco de nia afero ĉiu bona Esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo;
2. la fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla;
3. ĝis la tempo, kiam aŭtoritata centra institucio decidus pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“ devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata.

Ebwa. Jek



Biblioteka Główna UMK



300001850963

✓

# THORA GOLDSCHMIDT

**Français par Intuition et images** sans l'emploi de la langue maternelle. 31 tableaux auxiliaires avec texte explicatif et un vocabulaire arrangé d'après la signification des mots. 14<sup>ième</sup> et 15<sup>ième</sup> édition. 1922.

**English by Intuition and pictures** without employment of the native language. 31 auxiliary pictures with explaining words and a vocabulary arranged according to the signification of the words, 11<sup>th</sup> edition. 1922.

**L'Italiano insegnato a base d'intuito e di illustrazioni** senza l'uso della lingua materna. 35 Illustrazioni ausiliari con Esercizi relativi, un breve Compendio di Grammatica e un Vocabolario ordinato secondo il Significato delle Parole. Quarta edizione. 1920.

**La Lengua Española enseñada por la intuición y la vista, sin auxilio de la lengua propia.** 37 cuadros auxiliares con texto explicativo, modelos de ejercicios, un compendio de la gramática castellana y un vocabulario ordenado sistemáticamente en grupos. 1921.

**Język polski. Tabliczki obrazowe dla uczących się po polsku.** 34 tabliczki obrazowe z objaśniającym polskim tekstem, ćwiczeniami, zarysem gramatyki i systematycznie ułożonym spisem wyrazów. 1921.

**Bildertafeln für den Unterricht im Deutschen.** 36 Anschauungsbilder mit erläuterndem Text, Übungsbeispielen, einem Abriss der Grammatik und einem systematisch geordneten Wörterverzeichnis. 5. Aufl. 1922.

**Bildotabuloj por la instruado de Esperanto.** 36 bildoj kun klariganta teksto, ekzercoj, ekzemploj kaj gravaj aldonoj (fundamenta gramatiko kaj ekzerco de Dro. Zamenhof, nonsistemaj tabeloj kaj esperantaj dokumentoj). 3a, korektita eldono 1923.

**Petit à Petit** ou Premières Leçons de Français par A. HERDING. Pour les enfants de cinq à dix ans. Ouvrage illustré de 206 gravures, dessinées par Fedor Flinzer, et une planche, en couleurs. 27<sup>ième</sup> édition. 1922.

**Little by Little** or First English Lesson-Book for Children from five to ten years of age. An adaptation of A. Herding's «Petit à Petit» by HEDWIG KNITTEL. With 206 illustrations designed by Fedor Flinzer and a coloured frontispiece. 12<sup>th</sup> edition. 1922.

**Schritt für Schritt.** Lehrbuch der deutschen Sprache für Anfänger, besonders im Alter von 6 bis 10 Jahren. Bearbeitet von H. HERDING auf Grund von A. Herdings «Petit à Petit». Mit vielen Abbildungen im Text von Fedor Flinzer, Otto Kubel u. a. und einer Farbentafel. 3. Auflage. 1921.

**Spracheigenheiten,** die jeder lernen kann und sollte. Von M. Bergmann.  
Englisch-Deutsch (Anglicisms-Germanisms). In 2 Teilen.  
Französisch-Deutsch (Gallicisms-Germanisms). In 2 Teilen.

25 ✓  
**THORA GOLDSCHMIDT**

**Français par Intuition et images** sans l'emploi de la langue maternelle. 31 tableaux auxiliaires avec texte explicatif et un vocabulaire arrangé d'après la signification des mots. 14<sup>ième</sup> et 15<sup>ième</sup> édition. 1922.

**English by Intuition and pictures** without employment of the native language. 31 auxiliary pictures with explaining words and a vocabulary arranged according to the signification of the words, 11<sup>th</sup> edition. 1922.

**L'Italiano insegnato a base d'intuito e di illustrazioni** senza l'uso della lingua materna. 35 Illustrazioni ausiliari con Esercizi relativi, un vocabolario ordinato secondo il Significato delle Parole. Quarta edizione.

**La Lengua Española en su propia lengua** a vista, sin auxilio de la lengua propia. Modelos de ejercicios, un vocabolario ordenado sistemáticamente en grupos. 1921.

**Język polski. Tabliczki obrazowe** z objaśniającym spisem wyrazów. 34 tabliczki obrazowe z objaśniającym spisem wyrazów. 1921.

**Bildertafeln für den Unterricht** der Grammatik und einem systematischen Aufbau. Bauungsbilder mit erläuternden Beispielen, einem Abriss.

**Bildotabuloj por la instruadon** gramatiko kaj ekzerco de Dro. 3a, korektita eldono 1923.

**Petit à Petit** ou Premières Leçons. Ouvrage illustré de couleurs. Pour les enfants de cinq à dix ans.

**Little by Little** or First English. An adaptation of A. Herding's «Petit à Petit» by HEDWIG KNITTEL. With 206 illustrations designed by Fedor Flinzer and a coloured frontispiece. 12<sup>th</sup> edition. 1922.

**Schritt für Schritt.** Lehrbuch der deutschen Sprache für Anfänger, besonders im Alter von 6 bis 10 Jahren. Bearbeitet von H. HERDING auf Grund von A. Herdings «Petit à Petit». Mit vielen Abbildungen im Text von Fedor Flinzer, Otto Kubel u. a. und einer Farbentafel. 3. Auflage. 1921.

**Spracheigenheiten,** die jeder lernen kann und sollte. Von M. Bergmann.  
Englisch-Deutsch (Anglicisms-Germanisms). In 2 Teilen.  
Französisch-Deutsch (Gallicisms-Germanisms). In 2 Teilen.

